Jozef Borský

# 1111 ANEKDOTOJ EN ESPERANTO



espero

**Jozef Borský**

# 1111 ANEKDOTOJ EN ESPERANTO

espero

**2009**

# Antaŭparolo al la nova eldono

Karaj ridemuloj,
havante en manoj tiun ĉi verkon mi kuraĝas alparoli vin tiel. Se vi ne emus ridi kaj ne ŝatus anekdotojn, ŝercojn, spritaĵojn – ĝenerale humuron – verŝajne vi ne legus jenan verkon.
Tiu ĉi libro estas jam dua eldono de la verko, tamen iom modifita. Ja tempo neeviteble pasas kaj pluraj ŝercoj, kiel ajn bonaj, iom eksmodiĝis ekde la unua eldono. Pro tio bonvenis helpo de juna ŝerco-kolektantino – Katarína Nosková. Danke al ŝi do por nuna eldono sekvis severa kontrolado kaj provlegado, kun la celo lasi daŭre aktualajn ŝercojn kaj anstataŭigi kelkajn eksmodajn anekdotojn per novaj. Ĉu ni tiun taskon plenumis bone, vi povos taksi mem – plej bone tion malkaŝos al ni via ridanta vizaĝo :).
Permesu al mi, kuraĝulo, deziri al vi agrablan kaj ĉefe amuzan legadon, kiu espereble alportos iom da rideto al via vizaĝo kaj kontribuos al via bona humoro.

Peter Baláž, eldonisto

# Antaŭparolo al la origina eldono

Estimataj gelegantoj!
Mia granda danko apartenas al sinjoro J. Vondroušek, kiu korektis afable ĉi tiun verketon.
Antaŭ kelkaj jaroj mi komencis kolekti spritaĵojn kaj aforismojn. Post iom da tempo ekestis ideo esperantigi iujn el ili kun supozo, ke ĉie sur la Tero ekzistas homoj, kiuj ŝatas ridi.
Ne ĉiuj spritaĵoj el la kolekto estis tradukitaj, ĉar ne ĉiu spritaĵo estas tradukebla. La kerno de la afero povas soni nur en iu lingvo kaj en la alia povas doni nekompreneblan sensencaĵon.
Diferencoj inter diversaj nacioj estas iam pli, iam malpli grandaj, kaj kio estas ridinda por unu homo, pri tio iu alia eĉ ne ekridetos. Kaj aforismoj estas fiksitaj pli al cerbumo ol al rido.
Plu – iuj homoj estas superstiĉaj – ili kredas, ke iuj aĵoj kaj numeroj alportas feliĉon aŭ malfeliĉon. Ekzemple ĉe ni tio estas „malfeliĉa 13“. En aliaj landoj tio certe estas io alia. Mi petas vin tial, kiam vi legos ĉi tiun tradukon, ke vi notojn en mia antaŭparolo konsideru. Dankante al vi por kompreno, mi deziras al vi bonhumoron.

Via
Inĝ. Borský

# Aforismoj

1. Malsaĝon male ol saĝon oni ne kapablas simuli.

**2. La plej malsaĝaj estas demandoj, kiujn mi ne scipovas respondi.**

3. Tio, pri kio ridas ajna stultulo, ne nepre devas esti humuro.

**4. Impertinento direktita al iu alia estas bona spritaĵo. Bona spritaĵo al mia konto estas impertinento.**

5. Pri ĉio ridas homoj ridemaj, pri nenio la malsaĝaj.

**6. Humuro estas la plej demokrata el ĉiuj homaj kutimoj.**

7. Se stulta homo faras ion hontindan, li ĉiam deklaras ke estas lia devo.

**8. Unusola afero, por kiu estas neniam malfrue, estas bona vorto.**

9. La sola maniero forigi tenton estas cedi al ĝi.

10. Al la fieraj ĉiam mankas iom da intelekto.

11. Kiam infano havas ĉion, kion li deziras, evidente al li mankas tio, kion li bezonas.

**12. Ĉiam pardonu viajn malamikojn; nenio iritas ilin pli.**

13. Oni mensogas tial, ĉar iuj homoj ne scipovas diri veron kaj aliaj ne ŝatas aŭdi ĝin.

**14. Manko da laboro estas por iuj ĝuego, por aliaj sufero.**

15. Plej multe da helpantoj havas tiu, kiu dronas en mono.

**16. Malsaĝajn ideojn havas ĉiu, sed la saĝa homo silentas pri ili.**

17. Iu homo lavas sian kolon nur interne.

**18. Kiam vi kaplablas moki vin mem, moko de enviemuloj ne ĝenos vin.**

19. La plej ofta obstaklo, kiun homo renkontas survoje de la vivo, estas gastejo.

**20. Honesta trovanto estas homo, kiu ĉe trovo de multekosta aĵo konstatas, ke iu vidis lin.**

21. Memoru, ke post virinoj kaj taksio oni ne kuras, post momento aperos pluaj.

**22. Klereco estas diferenco inter tio, kion ni ellernis, kaj tio, kion ni forgesis.**

23. Homoj aplaŭdas al kantisto tial, ĉar li bele kantis, aŭ tial, ke li jam finis.

**24. Intelekto havas kontraŭ varo grandan malavantaĝon – en kazo de manko ne eblas importi ĝin.**

25. Amo estas nenio krom amoro misliterumata.

**26. Se vi fermas la pordon je ĉiuj eraroj, ankaŭ la vero restos ekstere.**

27. Amo: pensi pri iu, senpripense.

**28. Plej ofte ni tranĉas nin per malakra tranĉilo.**

29. Malsata koro estas malpli bona ol malsataj intestoj.

**30. Eĉ por pomo putranta troviĝas amanto.**

31. Politikistoj ekas fajron de militoj, kaj la ceteron plenumas idiotoj.

**32. Plej ofta kaŭzo de perdo de optimismo estas gajno de spertoj.**

33. Kritikon mi ne evitas, male, kritikistojn.

**34. Vorto al batalo povas esti ankaŭ silentado.**

35. El naturleĝoj multaj homoj agnoskas nur leĝon de ĝangalo.

**36. Ideala estro estas kiel morto. Ĝi forgesas neniun.**

37. Vero estas kiel medikamento. Kaj tial ĝi havas ankaŭ apudajn efikojn.

**38. Unueco de opinioj estas kutime tie, kie ĉiu lasis sian opinion por si.**

39. Ekzistas ateistoj, kiuj sentas sin kiel dioj.

**40. Aforismo estas unu linio, kies signifon oni legas inter linioj.**

41. Oni apartigis grenon de glumo. Por iuj grenon, por aliaj glumon.

**42. La diferenco inter homo kaj besto nuntempe estas plimalpli la vesto.**

43. Kiu havas pli multe da intelekto, faras stultaĵojn, dum li estas juna.

**44. Vojo de la malplej granda rezisto estas ĉiam troplenigita.**

45. Komputilo ja ĉion elkalkulas, sed por priŝtelado estos ĉiam necesa homa faktoro.

**46. Kun realeco estas problemoj – ĝi estas ĉiam vera.**

# Alkoholo

47. „Por ne forgesi: mi bondeziras al vi feliĉan Novjaron.“
„Ĉu vi frenezas? Ja estas jam marto.“
„Kia malfeliĉo, tiel malfrue el la finjara festo mi ankoraŭ ne revenis.“

**48. Revenas du viroj el gastejo kaj unu volas malŝlosi pordon per cigaredo. Lia kunulo atentigis lin pri tio kaj la ebriigito ektimas: „Ĉu eble mi forfumis ŝlosilon?**

49. Demandas ĉe pordo viro sinjorinon, kiu malfermis: „Ĉu estas via edzo hejme?“
„Jes.“
„Li redonu al mi la 100 kronojn, kiujn al mi li ŝuldas.“
„Ho, ĉu li sidus hejme, se li havus en poŝo 100 kronojn?“

**50. Najbarino: „Mi petas, ĉu vi povas akvumi niajn florojn dum nia libertempo?“**
„Mi ne, sed mi diros tion al mia edzo.“
„Kaj ĉu li volontos?“
„Ho, li scias tre bone, kio estas soifo!“

51. Inter amikinoj: „Hieraŭ revenis mia edzo hejmen ebria kaj mi tiris lin je la haroj.“
„Tion mi ne povus fari al mia edzo.“
„Kial, ĉu vi timas lin?“
„Ne, li estas kalva.“

**52. „Kiel vi fartis dum dimanĉa ekskurso?“**
„Malbone. Kiam ni eliris el stacidomo, ni ne povis trovi gastejon, kaj kiam ni eliris el la gastejo, ni ne povis trovi la stacidomon.“

53. Koleras sinjorino Nová: „Ĉu vi ne povas ordoni al vi kaj ĉesi trinki alkoholaĵojn?“
„Ordoni al mi mi scipovas, sed obei ne.“

**54. Konstanta gasto plendas al kelnero: „Tiu sklerozo! Neniam mi scias, ĉu mia edzino diris, ke mi mendu unu bieron kaj venu je la oka aŭ mendu ok bierojn kaj venu je la unua.“**

55. „Ho, vi trinkas mineralan akvon! Mi vidas ke vi aktive batalas kontraŭ alkoholo...“
„Jes, kontraŭ la hieraŭa.“

**56. „Sinjoro Novák, vi asertis, ke vi batalas kontraŭ alkoholaĵoj.“**
**„Jes, sed ĉiam ili venkas min.“**

57. „Kion diras al vi la edzino, kiam vi venas hejmen el gastejo ebria?“
„Nenion, ŝi nur tremas la kapon.“
„Kies kapon?“

**58. „Ĉe ni estas tre difekta akvo. Kiam mi deziras trinki, mi precipe filtras ĝin, poste kuiras ĝin kaj fine, por certeco, mi trinkas vinon.“**

59. „Kiel vi deziras kolorigi tiun loĝĉambron?“
„Mi deziras, ke ĉi tie plaĉu al mia edzo. Eble tiel, kiel estas kolorigite en la plej proksima gastejo.“

**60. „Mia edzo ĉiuvespere iras en la drinkejon.“**
**„Kaj ĉu vi permesas tion al ŝi?“**
**„Kompreneble! Ja kiu kondukus min hejmen, se ŝi ne venus?“**

61. Ĉe drinkeja tablo: „Ne drinku tiom, vi komencas havi disŝmiritan kapon.“

**62. „Ĉu vi scias, ke post alkoholdrinko oni malrapide idiotiĝas?“**
**„Ne gravas, mi havas sufiĉe da tempo.“**

63. Gastigantino: „Ĉu vi trinkas kafon kun konjako aŭ sen ĝi?“
Vizitanto: „Konjakon sen kafo.“

**64. „Ĉu vi fakte intencas serioze tiun promeson ĉesi drinki?“**
**„Memkompreneble. Jam mi faris la unuan paŝon. Mi aĉetis al mi poŝtranĉilon sen korktirilo.“**

65. Ebriulo demandas preteriranton: „Kiom da ŝvelaĵoj mi havas sur la kapo?“
„Kvar.“
„Do ankoraŭ du kolonojn kaj mi estos hejme.“

**66. Eniras grupo da viroj el gastejo en aŭton. Unu el ili decidas: „Franĉjo, vi ŝoforos. Ĉar vi estas tiel ebria, ke vi ne povus kanti.“**

67. Eniras ebria homo en gastejon kaj deziras rumon. Kelnero ne volas verŝi ĝin al li, ĉar al ebriuloj oni ne rajtas vendi alkoholaĵon. La gasto diras: „Tio ne estas por mi, sed por mia amiko.“
„Kaj kie estas tiu via amiko?“
„Li kuŝas antaŭ la gastejo en koto.“

**68. „Hieraŭ vi venis hejmen denove ebria.“**
**„Ĉu vi ne rimarkis, ke oni alportis min?!**

69. „Franĉjo, vi estis hieraŭ tiom ebria, ke mi devis alporti vin hejmen.“
„Ĉu vi ne estis ebria?“
„Tute ne.“
„Do kial vi alportis min al najbaroj?“

**70. Du iom ebriaj viroj veturas per aŭto. Unu iomete vekiĝas kaj time diras: „Kien vi veturas?“**
**La dua viro ankaŭ vekiĝas kaj miras: „Ĉu mi? Mi pensis, ke ŝoforas vi.“**

71. „Kion diris al vi la edzino, kiam vi revenis el trinkejo hejmen nur matene?“
„Nenion. Mi retroiris en la dormoĉambron kaj kiam ŝi vekiĝis, ŝi pensis, ke jam mi foriras en laborejon.“

**72. En vino estas vero. Ĉu tial estas ĉe ni tia batalo kontraŭ alkoholismo?**

73. „Kia bruo estas en koridoro?“
„Najbaro falis de sur ŝtuparo, kiam li portis rumon.“
„Ĉu li disverŝis ĝin?“
„Ne, li havis fermitan buŝon.“

**74. „Ĝis noktomezo ni eminente amuziĝis. Poste oni elĵetis nin.“**

75. Edzino al la edzo: „Ĉesu kun la drinkado. Ĉu vi scias, kiel estas alkoholaĵo malutila?“
„Sed ĉiuj epidemioj estas ja de akvo.“

**76. Vinon, kanton, virinojn, haringon, aspirinon... kaj jam ni havas la Novan jaron.**

77. Edzo al la edzino ĉe malfrua reveno el gastejo: „Pardonu min, sed en la gastejo malfruis horloĝo.“

**78. „Ke mi perdis mian domon, tion kaŭzis alkoholo.“**
**„Kiel?! Ĉu vi tiel multe drinkis?“**
**„Ne. Eksplodis nia alkohol-distililo kaj la domo forbrulis.“**

79. „Mia edzo havas novan laboron. Li estas en alkoholfabriko jam tri monatojn.“
„Ĉu plaĉas al li tie?“
„Mi ne scias, mi ne vidis lin dum tri monatoj.“

**80. En gastejo: „Hejme mi malhelpas, en laboro mi estas superflua, nur ĉe kartludado mi havas impreson, ke mi sin-realigas.“**

81. Viro apud pordo de sia loĝejo: „Ĉu vi ne rekonas min, Manjo? Jen mi, Franĉjo, nur mi estas sobra.“

**82. „Mi ne estas abstinulo, sed alkoholaĵon mi trinkas nur tiam, kiam mi por tio havas motivon. Kaj tio estas ĉiam, kiam mi havas monon.“**

83. Diras unu marvirgulino al la alia: „Ke estas maristo tre ebria vi ekkonas laŭ tio, kiam li diras al vi, ke vi havas belajn gambojn.“

**84. Viroj havas malmolajn ne korojn, sed hepatojn.**

85. Edzo venas malfrue hejmen, falas sur la liton kaj grumblas: „Pardonu, mia karulino, sed ni vetis kun amiko, kiu pli multe eltrinkos.“
La edzino: „Kiu estas tiu, kiu finis kiel la dua?“

# Amo

**86. Patrino al la filino: „Kie vi estis hieraŭ?“**
**„Je vespermanĝo ĉe Karlo.“**
**„Ĉu nur je vespermanĝo? Kaj kion vi faris post tio?“**
**„Post tio – ni matenmanĝis.“**

87. Li al juna belulino en kazino: „Mi ne scias, karulino, kion vi je mi, maljunega, malsanega multimilionulo fakte vidas.“

**88. En fajroestingistejo sonoras telefono kaj virina voĉo petas: „Helpu, al mia fenestro per ŝtupetaro supreniras viro.“**
**„Fraŭlino, ĉi tie estas fajroestingistejo, vi voku policon.“**
**„Mi scias, sed li havas mallongan ŝtupetaron.“**

89. Demandas raportistino faman aktoron: „Niajn legantinojn interesus, kiujn pasiojn vi havis en juneco?“
„Kaptadon kaj virinojn.“
„Kaj kion vi kaptadis?“
„Virinojn.“

**90. Sonas telefono. La patro de tri plenkreskaj filinoj levas la aŭskultilon.**
**„Ĉu estas vi, fiŝeto mia?“ - aŭdas li en la aŭskultilo.**
**„Ne, ĉi tie estas la gardisto de la fiŝlago!“ – respondas la patro.**

91. Edzino hejme plendas:
„Do edzo mia, kio pri la sekso hodiaŭ? Ĉu ĉion en tiu ĉi hejmo mi devas fari mem?“

**92. Li en hotelĉambro: „Pluvas kaj pluvas, kia terura vetero, kion ni faros?“**
**Ŝi: „Dum tiu ĉi vetero eblas fari nur du agojn, sed mi atentigas vin, ke kartojn mi ne ludas.“**

93. Vespere vokas patro el fenestro al la filino:
„Diru al via amanto, ke li ne apogu vin al sonorileto!“

**94. „Franĉjo havas sklerozon.“**
**„Kial?“**
**„El deĵorvojaĝo li portis al sia edzino bonbonujon kaj al sia sekretariino malpurajn ĉemizojn.“**

95. „Via nova fianĉo ne plaĉas al mi," – diras patrino al sia filino.
„Bonŝance ankaŭ vi ne plaĉas al li."

**96. „Ĉu mi povas nomi vin Manjo?"**
**„Kial?"**
**„Por ke mi hejme ne eraru."**

97. ""Petro, ĉu vi amos min ĉiam, ankaŭ kiam ni geedziĝos?"
„Mi pensas ke jes, ĉiam logis min edziniĝintaj virinoj."

**98. Li al ŝi: „Ĉu vi kredas je amo je la unua rigardo?"**
**„Ne."**
**„Do mi venos morgaŭ denove."**

99. Arbaristo kaptis viron, kiu staris antaŭ arbo kun malfermita tranĉilo.
„Ĉu vi ne scias, ke estas malpermesite gravuri amdeklaron en arboŝelon?"
„Mi ne volas gravuri, sed forstreki."

**100. „Manjo, estas majo – amtempo, kaj vi estas tia timindulino."**
„Ne miru, post la tria ido mi devas jam esti singarda."

101. Viro dum rendevuo al juna fraŭlino: „Vi estas tia bela kaj agrabla, ke mi plenumus al vi la plej sekretan deziron."
„Vi senmoralulo!"

**102. Diras juna virino en ĉirkaŭbrako: „Amo estas potenca sorĉistineto, mia karulo, ĉu?"**
**Ŝia pli aĝa amiko: „Jes, sed nun mi devas foriri al mia maljuna sorĉistino."**

103. Instruas patrino la filinon: „Memoru, ke en la vivo ekzistas nur unu granda amo!"
„Kaj kiu estis via granda amo?"
„Maristoj, filineto, maristoj."

**104. Patro venas en ĉambron de sia filino kaj diras: „Iru eksteren, ĉe pordo estas via adoranto."**
**„Kiel vi ekkonis, ke li estas mia adoranto?"**
**„Ĉar li havas miajn manumbutonojn."**

105. Dum filmado vokas reĝisoro al aktorino:
„Metu pli multe da ardo en tiun kantadon. Ĉu vi neniam amis?"
„Jes, sed neniam dum tio mi kantis."

**106. Ŝi publikigis anoncon por interkonatiĝo kaj demandis: „Kiom da mi pagu?“
„Neniom, ankoraŭ vi ricevos honorarion por bona spritaĵo.“**

107. Diras unu najbarino al la alia: „Tiu hodiaŭa junularo ne havas moralon! Mia edzo kuraĝis kisi min nur post la kvara infano.“

**108. Frapas junulo sur fenestron de sia amatino: „Malfermu, mia karulino!“
„Mi ne povas.“
„Kial?“
„Mi estas malvestita.“
„Ne gravas, mi estas ĉi tie sola.“
„Sed mi ne.“**

109. Du gepensiuloj sidas sur parkbenko. Li diras: „Mi invitas vin en mian hejmon.“
Ŝi honte: „Sed ni konas nin nur mallonge.“
Li: „Mi demonstros al vi mian kolekton de medikamentoj.“

**110. Dum spektado de televida programo demandas filo: „Kion faras aktoro kun tiu aktorino?“
Patro grumblas: „Mi havas impreson, ke li deziras sendi ŝin patrinlibertempi.“**

111. „Mia patrino estas principe kontraŭ la kisado.“
„Karulino, vere neniam mi pensis pri kisado de via patrino.“

**112. Pentristo: „Mi ĵuras, ke vi estas la unua modelo, kiun mi kisas.“
Poste evidentiĝis, ke ĝis nun li pentris nur pejzaĝojn.**

113. Gastigantino al malfrua gasto: „Vi malbonŝancas, ĉiuj belaj, spritaj virinoj estas jam for.“
Gasto: „Mi ne venis ja pro belaj kaj spritaj virinoj, mi venis pro vi.“

**114. Filino prezentas al siaj gepatroj sian amindumanton:
„Tio estas Roman, mia estonta unua edzo.“**

115. Fraŭlino al sia amindumanto: „Mi ne matenmanĝas, ĉar mi pensas pri vi, mi ne tagmanĝas, ĉar mi pensas pri vi, mi ne vespermanĝas, ĉar mi pensas pri vi kaj nokte mi ne povas ekdormi... pro malsato.“

**116. Suspiras sinjoro Novák: „Tiu nuntempa modo tro rapidas. Mia patrino memoris, kie ŝi ricevis de la patro la unuan kison kaj mia filino preskaŭ ne scias plu, kiu estis ŝia unua edzo.“**

117. Junulo: „Fraŭlino, ĉu mi povas akompani vin?“
Fraŭlino: „Ne, hejmen mi iradas principe sola. Se vi ne kredas al mi, vi iru konvinkiĝi.“

**118. „En Danio laŭdire virinoj dum interkonatiĝo evoluigas neniun iniciaton. Ili atendas nur, kiam viroj petas ilin pri geedzeco.“
„Nun mi scias, kial estas tiel malmulte da danoj!“**

**119. Inter amikinoj: „Ĉu vi interrilatas kun tiu svedo el reprezentejo? Kiel vi interkonsentiĝas?“
„Do, kion deziras li, tion mi scias, kaj kion deziras mi, tion mi aĉetas en luksaj vendejoj.“**

**120. Inter amikinoj: „Vi tute ne devas maltrankviliĝi, memkompreneble Franĉjo amas vin. Ĉu vi pensas, ke nur ĉe vi li farus escepton?“**

121. „Ĉu vi havas jam iun amantinon?“
„Tiel duone.“
„???“
„Vizitadas ŝin ankoraŭ unu.“

**122. Junulo karese premiĝas al fraŭlino en parko kaj deziras kisi ŝin.
Ŝi protestas: „Nur post la geedizĝo.“
La junulo: „Bone, mi atendos. Kaj kiam vi edziniĝos?“**

123. „Maria, kion vi faradas en la kelo tiom longe?“
„Ni amindumas tie, panjo“
„Do bone, mi jam timis, ke vi tie fumadas!“

**124. „Fraŭlino, kion mi devus doni al vi, por ke mi povu kisi vin?“
„Narkotaĵon.“**

125. Iom da tempo post geedziĝfesto:
„Karulino, mi daŭre tre tre amas vin. Ĉu ankaŭ vi min?
„Jes, ankaŭ vin.“

**126. Ĵurnalisto demandas mariston, kiom da infanoj li havas. La maristo respondas: „Bedaŭrinde, tion mi ne povas diri al vi, mi jam tri jarojn ne estis hejme...“**

127. Ŝi: „Ĉu vi scias, ke vi estas la unua viro, kiun mi amas?“
Li: „Tion mi ne kredas.“
Ŝi: „Do almenaŭ la unua, kiu ne kredas tion.“

128. Adam kaj Eva promenas en paradizo. Eva demandas: „Ĉu vi amas min vere?“
„Kia demando! Ĉu mi povas elekti?“

129. Geamantoj sidas sur sofo kaj observas la noktan ĉielon.
Ŝi: „Ĉu vi opinias, ke estas sur la luno homoj?“
Li: „Certe ne, sed se vi timas, mi povas subentiri la rulkurtenon.“

**130. Adiaŭas vespere amanto la amatinon: „Transdonu saluton al via edzo kaj nia infano.“**

131. „Ĉu mi estas la unua viro, kiun vi amis?“
„Ĉu vi scias, ke povas esti tiel? Vi ŝajnis al mi iel konata!“

**132. Ŝi: „Ĉu vi memoras? Antaŭ dek jaroj ni konatiĝis – tiam estis forta fulmotondro.“**
**Li: „Tiam mi ne komprenis, ke la naturo avertas min.“**

133. „Karulo, kiam vi povos veni al ni tagmanĝi?“
„Atendu – lunde mi tagmanĝos ĉe kolego, marde mi sentos min malbone. Merkrede mi tagmanĝos ĉe estro, ĵaŭde mi sentos min malbone. Ĉu taŭgas por vi vendredo?“

**134. Inter amikinoj: „Tiu mia nova amanto estas netolereble ĵaluzema.“**
**„Kiel tio montriĝas?“**
**„Kiam ni estas kune, li parolas nur pri tio, ke li dezirus scii, kion faras lia edzino.“**

135. „Ĉu vi rifuzas min, fraŭlino? Min, kiu estis idealo de virinoj?“
„En kiu jarcento?“

**136. Ŝi: „Ĉu vi irus kun mi ĝis fino de la mondo?“**
**Li: „Memkompreneble, karulino. Sed je la sepa mi devas esti hejme.“**

137. „Peĉjo, ĉu vi amas min?“
„Jes, karulino, ege.“
„Ĉu vi pro mi oferus vian vivon?“
„Ho, ne, kiu poste amus vin?“

**138. Inter junaj amikinoj: „Kuracistoj asertas, ke kisado mallongigas la vivon.“**
**„Stultaĵo! Nur tempo dum tio pli rapide pasas.“**

139. Inter junaj amikoj: „Hieraŭ mi interkonatiĝis kun virga fraŭlino.“
„Ĉu vere? Ĉu vi povus interkonatigi min kun ŝi?“
„Mi povus, sed hodiaŭ jam estas malfrue.“

# Bestoj

**140. „Elefanto, iru batali kun ni!“ - vokas ĝin du formikoj.**
**„Hoho, mi ne konsentas! Du kontraŭ unu?“**

141. Rimarkas du kokidoj kamparaninon, kiu portas rostitan kokidon kaj unu diras: „Ne estu tiel sentimentala, ĉu vi scias, kiom da ni el finas kiel kuiritaj ovoj?“

**142. Du paseroj rimarkas ĵet-aviadilon kaj unu diras:**
**„Ĉu ne ŝajnas al vi, ke ĝi flugas iom kvazaŭ timigita?“**
**„Ĉu vi miras pri tio? Kiel vi flugus, se brulus via vosto?“**

143. Du katoj parolas pri pentristoj: „Al mi plej plaĉas Walt Disney.“
„Kial?“
„Li scipovas tiel belege pentri musojn.“

**144. Leporo kun leporino spektas sorĉiston, kiu tiras el ĉapelo leporon post leporo. Leporo diras: „Tiu ĉi maniero estas ankaŭ bona, sed mi opinias, ke nia malnova metodo estas pli agrabla.“**

145. „Kial tiu poŝtkolombo hieraŭ flugis tiom malrapide kaj hodiaŭ tiom fulme?
„Hieraŭ ĝi portis nur ordinaran, sed hodiaŭ ekspresan leteron“

**146. „Delfenoj estas tre inteligentaj bestoj.“**
**„Ĉu vere?“**
**„Jes, imagu, ke ili dum kelkaj tagoj tiel dresis zorgiston, ke li trifoje tage alvenas sur randon de baseno kaj ĵetas al ili fiŝojn.“**

147. „Paĉjo, kiel amindumas erinacoj?“
„Tre, tre, tre atenteme, filo mia“

**148. „Kion vi pensas avo, ĉu estis pli frue ovo aŭ kokino?“**
**„Ovo. Tiun mi havis por matenmanĝo, kokinon havos nur por tagmanĝo.“**

149. En foiro: „Por tiu bovo vi postulas 20.000 kronojn. Rigardu, kiel ĝi palpebrumas. Ĉu tio ne estas tro multekosta?“
„Ne, ĝi signalas al mi, ke mi ne vendu ĝin tiel malmultekoste.“

**150. „Kiam ni estis pasintjare ĉe maro, estis tiel varme, ke oni devis malvarmigi kokinojn per glacio, por ke ili ellasu kuiritajn ovojn.“**

151. Kokino al kokidoj: „Se via patro vidus, kiel vi estas neobeemaj, sur rostilo li turniĝus!“

**152. Terkulturistino al najbarino: „Verŝajne mi sendos nian virkokon al ekspozicio de kortbirdaro.“**
**„Sendu. Ĝi informiĝu, kiel aspektu ĝusta virkoko!“**

153. „Mi miras, ke iu povas preferi hundon anstataŭ kato. Kato estas agrabla, kvieta, ŝatas karesojn.“
„Jes, sed ĉu vi iam vidis polican katon?“

**154. Simio fanfaronas: „Mi havas tri infanojn kaj ĉiuj havas bonan postenon. Unu estas en zoologia ĝardeno, la dua en cirko kaj la tria ludas en filmo.“**

155. „Kiel eblas, ke tiu hundo trinkas bieron?“
„Ĝi jam rajtas, ĝi estas pli aĝa ol 18 jaroj.“

**156. „Kiel fama dresisto de leonoj vi estas tre malgrasa.“**
**„En tio estas mistero de sukceso. Leonoj atendas ĝis mi grasiĝos.“**

157. Plendas edzino: „Imagu, nia hundo sukcesis veni en manĝoĉambron kaj devoris ĉion, nur hundbiskvitojn ĝi eĉ ne tuŝis.“

**158. En subtegmento de sur trabo pendas kvin vespertoj. La sesa staras apude. Alflugas la sepa kaj demandas: „Kio okazis al ĝi?“**
**„Tiun ne atentu. Ĝi ekzercas jogon.“**

159. „Ĉu vi scias, ke eĉ sen frostujo vi konservos porkviandon dum du monatoj en perfekta stato?“
„Kiel?“
„Lasu tiun porkon ankoraŭ du monantojn vivi.“

**160. „Sinjorino, via hundo ĵus pelas iun homon sur biciklo.“**
**„Sensencaĵo, nia hundo ne scipovas bicikli.“**

161. Inter amikoj: „Mia hundo estas tiel inteligenta, ke kiam ni revenas el promenado, ĝi mem sonorigas ĉe pordo.“
„Kaj la mia havas propran ŝlosilon.“

**162. „Kial vi donas al tiu hundo post vespermanĝo nigran kafon?“**
**„Por ke ĝi ne dormu kaj bone gardu.“**

163. „Sinjoro, via hundo mordis mian maleolon."
„Ĉu vi miras? Pli alten ĝi ne atingas."

**164. Miras dommastrino: „Kia bruego aŭdiĝas el la antaŭĉambro? Tiun katon mi jam elĵetis eksteren."**
**Ŝia edzo: „Vi devas elĵeti ĝin ankaŭ kun vosto."**

165. Renkontas serpento serpenton kaj demandas: „Ĉu vi scias, ĉu mi estas venena?"
„Kial vi volas scii tion?"
„Antaŭ mallonga tempo mi mordis min en langon."

**166. „Kial havas ĝirafo tiom longan kolon?"**
**„Ĉar ĝi havas tro for la kapon!"**

167. „Mastro, ĉu tio estas via bovino?"
„Fraŭlino, ĉu vi ne vidas, ke tio estas bovo?"
„Pardonu min, mi ne rimarkis, ke ĝi ne havas kornojn."

**168. „Sinjoro, se mi pagos al vi por tiu hundo tiom, kiom vi deziras, por mi ĝi ne plu valoros."**
**„Kial?"**
**„Restos nenio, kion li gardu."**

# Dungitoj kaj vendistoj

169. Oficisto venis malfrue el laborloko hejmen kaj lia edzino kolere demandas:
„Ĉu vi havis ree kunvenon, aŭ ĉu vi laboris superhore?"
„Ne, ĉiuj finis ĝustatempe, sed ili forgesis veki min."

**170. Diras garaĝmajstro: „Fidinde mi ekkonas, ke komencis kreski fungoj – laŭ plimultigo de postuloj pri deĵorvojaĝoj."**

171. Estro al sekretariino: „Ĝis nun vi faris en diktaĵo nur tri erarojn."
„Mi ĝojas pri tio, sinjoro estro!"
„Bone, do jam komencu tajpi la duan vorton!"

**172. Raportisto dum intervjuo: „Kaj kion vi faras, kiam vi komencas manki al vi materialo?"**
**„Mi rekomendas al laborisoj malpli ŝteladi."**

173. En oficejo diras matene oficistino al sia kolego: „Ĉi nokte mi sonĝis pri vi."
„Kion mi faris?"
„Nenion."
„Do tio estis vere mi."

**174. „Imagu, ke ĉi-nokte oni ŝtelis ĉion de nia ofico."**
**„Kaj gardisto?"**
**„Tiun oni lasis tie.**"

175. „Kie estas la ŝlosilo al tiu ĉi seruro?" – demandas aĉetanto al vendisto.
„Tio estas rabatita seruro, ĉar al ĝi mankas ŝlosilo."

**176. "Kial vi estas tiel malgaja?"**
**„Nia brava direktoro pensiiĝis."**
**„Ne gravas, venos nova direktoro kaj eble estos ankaŭ brava."**
**„Sed la nova ne plu estos frato de mia patrino."**

177. „Mi aĉetis en bazaro novan horloĝon," fieras Jozefo al amiko.
„Kaj ĉu bone funkcias?"
„Bonege. Tiu ĉi estas ĝis nun la plej rapida!"

**178. Vizitanto ĉe giĉeto demandas pordiston: „Ĉu laboras ĉe vi sinjoro Nový?"**
**„Li ne laboras, li estas estro."**

179. Aĉetanto petas en vendejo botelon da vino. Vendisto demandas:
„Ĉu blankan aŭ ruĝan?“
„Ne gravas. Mi iras gratuli al amiko kaj li estas kolorblinda.“

**180. „Juna sinjoro, vi havas ĉe ni altan salajron, sed vi devas esti laborema kaj diligenta.“**
**„Mi sciis, ke en tio estos iu problemo.“**

181. „Mi petas iun aktualan libron, sed sen sekso, perforto kaj krimoj.“
„Tiukaze aĉetu la trajn-horaron.“

**182. Parolas du homoj el diversaj entreprenoj: „Ĉe ni estis terura labormoralo. Unu duono da homoj laboras kaj la dua faras tute nenion.“**
**„Ĉe ni tio estas pli bona, tute inverse.“**

183. Viro sidas ĉe matenmanĝo nekutime longe. La edzino demandas lin: „Ĉu hodiaŭ vi ne iros al laborejo?
„Diable, mi pensis, ke mi jam estas tie.“

**184. „En nia entrepreno laboras du veraj idiotoj.“**
**„Kiu estas la dua?“**

185. „Mi bezonus iun horloĝon por oficejo.“
„Ĉu vekhorloĝon?“

**186. Direktoro al sekretariino: „Kie mi havas skribilon?“**
**„En via poŝo.“**
**„Ĉu en la dekstra aŭ maldekstra?“**

187. Klientino surprovas peltmantelon. Ŝi demandas vendiston: „Ĉu vi opinias, ke ĝi eltenos ankaŭ pluvon?“
„Memkompreneble. Ĉu vi jam vidis vulpon kun pluvombrelo?“

**188. Aspiranto dum dung-intervjuo: „Mi dezirus iun supran postenon kun bona salajro kaj sekretariino.“**
**„Ĉu vi freneziĝis?“**
**„Ne, ĉu tio estas kondiĉo?“**

189. Diras kliento al horloĝisto: „Majstro, ĝi tiktakas.“
„Kaj kial tio malbonas?“
„Mi ne scias, sed antaŭ riparo ĝi estis barometro.“

**190. „Mi volus aĉeti ĉemizon," – petas aĉetanto.**
**„Ĉu similan kiel mi havas?"**
**„Ne, pli puran."**

191. Horloĝisto: „Ĉi tiun vekhorloĝon aĉetu. Ĝi estas fidinda. Ĝi tiktakas tiel laŭte, ke vi tute ne ekdormos."

**192. „Pardonu, kiom kostas tiu ĉi ĉemizo?"**
**„Dudek eŭrojn"**
**„Kaj ĉu vi ne havas ion malpli kostan?"**
**„Jes, ni havas. Ŝtrumpojn."**

193. „Mi petas kremon por ŝuoj"
„Por kiaj ŝuoj?"
„Numero 43."

**194. „Ĉe ni oni malliberigis kvindek homojn pro ŝtelado."**
**„Tio ĉe ni ne povas okazi."**
**„Kial? Ĉu ĉe vi oni ne ŝtelas?"**
**„Jes, sed en nia fabriko ni estas nur kvardek."**

195. Petas direktoro sian konaton, direktoron en alia entrepreno, ke li aranĝu postenon por lia filo, kiu havas neniun kvalifikon.
„Tio estas tute senprobleme, almenaŭ ni ne devas lin re-instrui."

**196. „Paĉjo, ĉu vintre kreskas pomoj?"**
**„Ne fileto, vintre kreskas nur ilia prezo."**

197. Ĵurnalisto: „Kion vi faras dum libera tempo?"
Oficisto: „Kion vi precize celas – en labortempo aŭ poste?"

**198. Direktoro al aspirantino je okupo de sekretariino: „Vi bone tajpas, ni dungos vin. Vi ricevos 400 € kaj poste ni eĉ pligrandigos vian salajron"**
**„Do dungu min poste."**

199. Stacidom-estro en Prago al nova laboristo: „Prenu lubrikilon kaj iru olei relkomutilojn."
Post semajno venis telegramo: „Mi estas en Budapeŝto, sendu pli da oleo."

**200. „Ĉu vi diris al la ĉefo, ke mi estas stultulo?"**
**„Ne, li jam sciis tion."**

201. En vendejo: „Sinjorino, tiun televidilon aĉetu, ĝi estas japana."
„Mi ne povas, ĉe ni neniu scipovas la japanan lingvon."

**202. Surskribo sur unu kolbas-vendejo: „Ni garantias, ke niaj salamoj enhavas cent procentojn de viando kaj nur dudek kvin procentojn de aliaj ingrediencoj."**

203. Direktoro al sia dungito: „Ĉu vi aŭdis iun novan spritaĵon?"
„Jes, kelkajn pri estroj, sed ili tute ne estas ridindaj."

**204. „La plej galanta viro el mia oficejo estas Franĉjo."**
**„Kial?"**
**„Kiam li liberigas sidlokon, povas sidiĝi tuj tri virinoj."**

205. „Mi petas kristnaskan arbon."
„Ili jam elĉerpiĝis, sed provu veni post la Kristnasko."

**206. Plendas unu amikino al alia:**
**„Konstante oni parolas pri kvalito de varoj. Kaj mi aĉetis termometron, kiu ĉiun momenton montras aliel!"**

207. Edzino al duone vekiĝinta edzo, kiu matene leviĝas: „Konsideru jene: denove unu tagon pli proksime al pensio."

**208. Kliento: „Ĉu eltenos tiuj ŝuoj longe?"**
**Vendisto: „Certe. Mi ne memoras, ke iu venus aĉeti la duan paron."**

209. Oni alveturigas pomojn al vendejo. Estro post iu momento diras: „La tria-kvalitajn mi miksos en la duan, la dua-kvalitajn mi vendos kiel la unuan, nur la unua kvalito faros al mi zorgojn."

**210. Demandas ĵurnalisto vojripariston: „Ĉu vi bone prepariĝis por vintro?"**
**„Jes, bone, nur neĝo ne surprizu nin!"**

211. Estas vero, ke ni havas mankon de rezervaj partoj, sed kontraŭe ni havas superfluon de rezervaj solvoj.

**212. Ĉu vi pruntus al mi 1500 kronojn?"**
**„Ĉu vi frenezas? Nun, tri tagoj antaŭ salajro?"**

213. „En nia entrepreno ni estas kiel unu familio. Ni ne toleras unu la alian."

**214. „Sinjoro estro, pardonu min, sed mi havas tre malgrandan salajron.“**
**„Bone. Mi pardonas vin.“**

215. Ĉe fotografisto: „Kiom kostus 216 fotografaĵoj?“
„Tion mi diros al vi poste. Nun sidiĝu kaj ridetu.“

**216. Klaŭno: „Sinjoro direktoro, imagu, ke nun mi trovis tiun trikotĉemizon, kiun mi jam duonjaron serĉis!“**
**„Kie vi trovis ĝin?“**
**„Sub mia ĉemizo!“**

217. „Sinjoro direktoro, kial vi translokigis tiun belan kaj agrablan sekretariinon en alian sekcion kaj havas nun sekretarion?“
„Mi ne plu povis elteni konduti kiel ĝentlemano.“

**218. Laboro plinobligas homon. Iun ankaŭ vivtenas ĝi.**

219. En administrejo: „Ĉi tie ni ĉiam kun io luktas, sed iam ni ne scias, kun kio.“

# Fiŝkaptistoj kaj ĉasistoj

**220. Plendas fiŝkaptisto: „Ĉi jare mi kaptis nur unu malgrandan karpeton. Se ĉion mi sumigas, ĝi kostis min 3000 kronojn.“
„Kaj imagu, se vi kaptus du karpojn!“**

221. Vetis du fiŝkaptistoj, kiu kaptos fiŝon la unua. Unu falis tuj komence en akvon kaj la dua krias: „Tio ne validas, per manoj oni ne rajtas.“

**222. Fanfaronas ĉasisto: „Hieraŭ mi pafmortigis 15 anserojn.“
Lia amiko: „Mi supozas, ke tio estis sovaĝanseroj.“
„Ne, sed vi devus vidi, kiel sovaĝiĝis ilia posedantino.“**

223. „Vi iras fiŝi ĉiutage. Kion vi faras kun fiŝoj?“
„Mi rostas ilin por vespermanĝo.“
„Unufoje jare tio ja ne povas malutili.“

**224. Viro sukcesis malaperi de oficejo kaj iris fiŝi. Post iom da tempo veturas sur rivero motorboato. Viro rapide kaŝas sin en alta herbaro. Kiam la boato forveturis, li diras: „Mi havis feliĉon, nek la estro, nek mia edzino vidis min.“**

225. Du ĉasistoj kuŝas en tendo. Subite ekblekegas leono. Sinjoro Novák diras al sia amiko: „Vetu pri mil kronoj, ke dum duonhoro ĝi estos mia.“ Kun pafilo li eliras el tendo. Post iom da tempo puŝas leono kapon en tendon kaj demandas: „Ĉu vi konas sinjoron Novák? Ĵus li perdis vetmonon.“

**226. Revenas du fiŝkaptistoj de rivero sen fiŝoj. Unu diras: „Mi ne komprenas, kiel povis niaj antaŭuloj vivteni sin per fiŝkaptado.“**

227. „Kion vi mortpafis en Afriko?“ demandas unu ĉasisto la duan.
„Nu, tri leonojn, kvar krokodilojn kaj ĉirkaŭ kvardek noŭplisulojn.“
„Ĉu noŭplisulojn? Dio mia, kio estas tio?“
„Nu, ĝi estas preskaŭ tiom granda kiel mi, nigra kaj kiam ĝi forkuras, krias: ‚no, please, no...‘“

**228. „Kie ĉi tie estas entute la plej bona loko por fiŝkaptado?“
„Tie malantaŭ la arbo. De tie videblas, kiam venas fiŝgardisto.“**

229. Fiŝgardisto: „Kial vi fiŝkaptas je pasintjara permesilo?“
„Mi kaptas nur tiujn fiŝojn, kiujn mi ne kaptis pasintjare.“

**230. „Tiuj vulpoj estas ruzaj bestoj. Antaŭ nelonge mi unu pafmortigis kaj kiam mi venis al ĝi, ĝi estis hundo."**

231. Inter ĉasistoj: „Ĉu vi jam pafmortigis cervon?"
„Ne, sed unun mi tre timigis."

**232. „Dimanĉe fiŝkaptistoj havos konkurson."**
**„Kaj kien ili kuros?"**

233. „Laŭdire vi kun via edzo fiŝkaptas?"
„Ne plu. Parte mi tie bruis per ilo, dufoje mi laŭte ekparolis, dum mia vivo mi ne ellernis ĝuste tredi logaĵon, ambaŭ manojn mi havas maldekstrajn kaj krome mi fine kaptis fiŝon!"

**234. Diras fiŝkaptisto al nikso: „Aĉetu al tiuj viaj najadoj iun biĵuterion, por ke ili ne ŝtelu de mi trembrililojn."**

235. „Kial vi por logi fiŝojn kunprenas pomojn?"
„Ĉar en ili estas vermo."

# Geedzeco

**236. „Nuntempe estas ĉe geedzoj nova modo libertempi sole. Ĉu vi provis jam tion?"**
**„Jes, mia edzo provis tion antaŭ tri jaroj."**
**„Kaj kiel tio plaĉis al via edzo?"**
**„Mi ne scias, li ankoraŭ ne revenis."**

237. Geedziĝa nokto. „Karulo, mi devas diri ion al vi - antaŭ geedziĝo mi jam estis en lito kun alia viro."
„Ne gravas, karulino, mi ankaŭ."

**238. „Johano, kion diris al vi edzino, kiam vi venis hejmen nur matene?"**
**„Nek unu vorton. Kaj tiujn 3 dentojn mi ĉiukaze volis lasi eltiri."**

239. Juna virino en sukeraĵejo: „Ĉu vi povus vendi al mi bruligitan torton kun acida kremo?"
„Pardonu, tian varon ni ne vendas. Kaj kial vi bezonas tian torton?"
„Mi deziras kredigi mian edzon, ke ĝin faris mi mem."

**240. Demandas vespere malgranda lernantino sian patrinon, kio estas katastrofo.**
**Patrino hezite: „Mi ne scias, kiel tion priskribi."**
**Patro el najbara ĉambro vokas: „Ne priskribu, montru!"**

241. Edzino al edzo la 8-an de marto: „Ĉiuj edzoj ĝojigas siajn edzinojn almenaŭ je Internacia tago de virinoj, kaj de vi - nenio."
Edzo: „Ja mi manĝis tiun tre trosalitan vespermanĝon sen unu sola kontraŭdiro!"

**242. Ŝi kaj li en la lito. Sonoras telefono. Ŝi: „Jes, jes... bone, ĝis poste."**
**Li: „Kiu telefonis al vi?"**
**Ŝi: „Tio estis nur mia edzo, li diris, ke li ne venos ĉi-nokte hejmen, ĉar li ludas ŝakon kun vi."**

243. Venas lezita viro al doktoro kaj tiu demandas lin: „Kie tio okazis al vi?"
La paciento: „Mi estas migranta vendisto. Mi revenis hejmen, jam kun la edzino ni kuŝis en lito, iu sonorigis, mia edzino ekkriis: ‚Tio estas mia edzo!' Kaj mi saltis el fenestro."

**244. Viro gajnis en loterio 100.000 kronojn. Lia amiko demandas: „Kaj kion pri tio diris via edzino?"**
**„Ŝi tute perdis voĉon."**
**„Ho, tiom da feliĉo samtempe!"**

245. „Vi diras, ke geedzoj Novák interkonatiĝis per gazet-anonco. Kaj ĉu ili estas feliĉaj?"
„Mi ne scias, sed tiun gazeton ili malabonis."

**246. El kuirejo aŭdiĝas terura tintego. Edzino venas en loĝĉambron kaj diras trankvile al edzo: „Nenio okazis, nur tiu garnituro de kuirejvazaro, kiu havis 40 partojn ekde nun havas 180 partojn."**

247. „Kiom vi donas al via edzino el via salajro?"
„Kaj se mi tion diros, ĉu vi ne diros al ŝi, kiom mi ricevas?"

**248. „Ĉu estas via edzino blondulino?"**
**„Kiam mi lastfoje vidi ŝin, ankoraŭ ŝi estis."**

249. „Ĉu vi povas iri sabate ien sola, sen edzino?"
„Jes, al la laborejo por superhore labori."

**250. „Geedzeco estas kiel loterio" opinias iu viro ĉe biero.**
**„Ho ne," diras la alia, „en loterio ekzistas ebleco gajni!"**

251. Ŝi diras riproĉe al edzo: „Mi konas viron, kiu portas ĉiutage al sia edzino florojn!"
Li: „Diru titolon de tiu romano!"

**252. „Imagu, ke Franĉjo gajnis tri semajnojn post edziĝfesto en loterio 500 000 kronojn."**
**„Ho, mi diris al li, ke kun la edziĝo li tiom ne hastu."**

253. Malgranda knabineto demandas patrinon: „Kial mi ne rajtas naĝi en rivero kaj patro tie banas naĝas?"
Patrino: „Ĉar la patro estas asekurita."

**254. Edzino: „Ĉu estas vero, ke en la paradizo estas edzoj apartigitaj de edzinoj?"**
**Edzo: „Memkompreneble, aliekaze ĝi ne estus paradizo."**

255. Edzino: „Ĉu vi jam parolis kun tiu viro, kiu savis min kontraŭ dronmorto?"
Edzo: „Jes, tuj hieraŭ, dum tri horoj li pardonpetadis min."

**256. Virino: „Hieraŭ mi devis trioble vangofrapi mian edzon."**
**Amikino: „Kial, ĉu li kontraŭstaris?"**
**Virino: „Ne, por ke li vekiĝu."**

257. Eblas harmonii kun ĉiu virino, kiam oni ne kontraŭas al ŝi.

**258. Inter najbarinoj: „Mia edzo revenis el banejo sen geedzringo. Mi nun ne scias, ĉu li ĝin fordrinkis aŭ kaŝante perdis.“**

259. Telefonas al riparejestro lia edzino: „Sendu ĉi tien ripariston de akvotubo.“
„Mi sendos al vi Karlon.
„Tiun ne.“
„Kial?“
„Li estas tro maljuna.“

**260. Demandas edzo sian edzinon: „Kial vi ŝminkas vin?“**
**„Por ke mi estu bela.“**
**„Kaj kial vi ne estas?“**

261. Plendas iu fraŭlino: „Tio estas terure, ĉiam, kiam mi deziras edziniĝi pro amo, mi konstatas, ke mia elektito estas tute senmona.“

**262. „Kiam vi ekkonis vian edzinon?“**
**„Bedaŭrinde nur post kiam mi edziĝis kun ŝi.“**

263. Filo al la patro: „Kial ĉe ni ne rajtas viro edziĝi kun pluraj virinoj?“
„Mi ne scias, kiel tion klarigi. Sed kiam vi estos pli aĝa, vi mem komprenos, ke tiu ĉi leĝo ja protektas virojn.“

**264. Al pentristo venis pozistino. Sed li ne volis labori, tial ili tempeton sidas kaj parolas ĉe kafo. Iu ekfrapas la pordon. La pentristo ektimis kaj diras: „Rapide senvestigu vin, tio estas mia edzino.“**

265. Post lia reveno el banloko ŝi elpakas lian malpuran tolaĵon el kofro kaj ekĝemas: „Almenaŭ ion vi alportis al mi.“

**266. Venas viro al ĉapel-vendejo:**
**„Mi serĉas iun ĉapelon por bopatrino.“**
**„Kian kapon havas la sinjorino?“**
**„Teruregan!“**

267. Staras geedzoj antaŭ peltvendejo kaj li diras: „Vi ja ne dezirus en tempo, kiam oni flugas en kosmon, vestiĝi per pelto de besto kiel iam dum pratempo...“

**268. „Kiel vi amuziĝis dum Novjara balo, Zuzana?“**
**„Bonege. Mi ricevis kvin ĝeedziĝ-proponojn kaj mi ĉiujn akceptis!“**

269. Li estas atentinda homo. Eĉ en la geedzeco li ne perdis bonhumoron.

**270. „Ŝajnas al mi, ke mia edzino estas lastatempe iel malatentema.“**
**„Tio estas interesa, al mi tiel tute ne ŝajnas.“**

271. „Mia filino estas tute kiel mi.“
„Ĉu ŝi planas edziniĝi ankaŭ neplenaĝa?“

**272. Juna edzino al la edzo:**
**„Se mi ankoraŭfoje sonĝos ke vi kisas fremdan inon, mi divorcos kun vi!“**

273. Oni demandis novedzon: „Kia estis la geedziĝa nokto?“
„Terura. Mi forveturigis mian edzinon en akuŝejon.“

**274. „Pro kio vi lastatempe plej multe ĝojis?“**
**„Ke mia najbaro ankaŭ edziĝis.“**

275. Amiko demandas amikon: „Kio nova?“
„Mia edzino kokras min.“
„Sed mi demandis, kio estas nova.“

**276. Demandas terkulturisto la alian: „Kiel vi estas ĉi jare kontenta pri abeloj?“**
**„Tre bone.“**
**„Ĉu ili amasigis multe da mielo?“**
**„Ne, sed jam kvinfoje ili pikis mian bopatrinon.“**

277. Pli aĝaj geedzoj iras tra parko. Ŝi diras: „Ĉu vi memoras, ke vi kisis min ĉi tie antaŭ tridek jaroj?“
„Jes, mi memoras.“
„Kaj ĉu vi tiam pensis, ke vi edziĝos al mi?“
„Kiu pensus tuj pri la plej malbona afero?“

**278. Iras du kolegoj el oficejo kune, subite unu trenas la duan en trairejon kaj time diras: „Ni devas kaŝi nin, sur la kontraŭa trotuaro staras mia edzino kun mia amatino kaj babilas.“**
**Lia kolego ekrigardas el al trairejo kaj diras: „Kion vi vidas, tie staras mia edzino kun mia amatino.“**

279. Knabino, rekontante pri vespero ĉe sia amanto, konfidas al amikino:
„Mi ja sciis, ke mi ne devus konatiĝi kun lia familio. Lia edzino faris skandalon!“

**280. „Ĉu vi do fine ne edziĝos je fraŭlino Terezio? Ŝi estas ja riĉa, kaj ankaŭ ne malbela."**
**„Nu jes, sed ŝia pasinteco..."**
**„Mi certigas vin, ke ŝia estinteco estas senmakula kaj pura."**
**„Ho amiko, tion ĉi mi kredas, sed ĝi estas tre longa..."**

281. Edzino revenis hejmen post novjara vizito de siaj gepatroj kaj demandas: „Kiel ĉi tie aperis tiu amaso da malplenaj boteloj?"
Edzo: „Mi ne scias, dum mia vivo mi aĉetis neniun malplenan botelon."

**282. „Kial vi kun edzo ĉiam antaŭ Kristnasko tiel terure kverelas?"**
**„Li devas ĉiam bati tapiŝon kaj kiam li estas kolerigita, li batas pli forte."**

283. Fieras najbarino: „Mi dekutimigis mian edzon mordi siajn ungojn."
„Kiel?"
„Mi kaŝis liajn dentojn."

**284. Edzino al la edzo: „Kion vi aĉetis al nia filino por la naskiĝtago?"**
**„Kompaktdiskon."**
**„Ĉu tio ne estas iom malmulte?"**
**„Ja tie ludas sesdek muzikistoj!"**

285. Ĉe krucenigmo: „Ĉu vi scias, kio ĝi estas? Ĝi vivas kun mastro, bojas kaj la vorto konsistas el kvin literoj."
„Se ĝi estus el ses literoj, do tio estus mia edzino."

**286. Ŝi flustras tenere: „Kiam ni geedziĝos, mi volas dividi kun vi ĉiujn malfacilaĵojn kaj suferojn."**
**„Sed mi havas neniujn malfacilaĵojn."**
**„Ja mi diras – kiam ni geedziĝos."**

287. Inter amikinoj: „Verŝajne mi eksedziĝos, Karlo ne plenumas la edzajn devojn."
„Ĉu tia bela, forta viro? Almenaŭ taskigu lin gladi tolaĵojn."

**288. Edzino: „Ni jam devas komenci ŝpari por libertempo."**
**„Sed kiel ni faros tion?"**
**„Simple. Vi finos trinki alkoholaĵon kaj mi dekutimigos vin fumi."**

289. Inter amikinoj: „Laŭdire vi eksedziniĝas, ĉu vi deziras advokaton? Mi havas unu konatulon."
„Ne, mi havas jam instaliston."

**290. Kvarobla spritaĵo**
**Renkontiĝas du amikoj kaj unu demandas:**
**„Kial vi estas tiel malgaja?**

**a/ Ĉe Balatono: „Mi eksedziĝos, mia edzino estas je kapo pli alta ol mi.“**
**„Ĉu tio gravas?“**
**„Ĉu vi vidis jam tiun kapon?“**

**b/ En Skotlando: „Mi eksedziĝos, mia edzino estas je kapo pli alta ol mi.“**
**„Mi komprenas, tiom multe da ŝtofo por vesto!“**

**c/ En Sicilio:**
**„Mi estis dek jarojn arestita. Mia edzino estis je kapo pli alta ol mi kaj mi mallongigis ŝin.“**

**d/ En Bohemio: „Mi eksedziĝis. Mia edzino estis je kapo pli alta ol mi.“**
**„???“**
**„Tio ne helpis. Ŝi estas konstante pli alta ol mi.“**

291. Apotekisto al kliento: „Se vi deziras ciankalion(cianidon?), vi devas havi recepton. Foto de via bopatrino ne sufiĉas.“

**292. Flustras novedzino dum geedziĝnokto: „Ĉu vi scias, ke vi estas mia unua viro?“**
**La novedzo: „Ĉu vi volas diri, ke ĉion-ĉi vi ellernis per televidilo?“**

293. Patro konsilante al filo: „Edziĝi pro mono estas malsaĝo. Vi ja povas puntepreni ĝin kun multe malpli granda risko.“

**294. Inter pensiuloj: „Kial vi daŭre ne laboras?“**
**„Mi ne devas.“**
**„Ĉu vi estas vidvo?“**

295. Inter amikoj: „Ĉu via edzino estas vere tute orfo?“
„Jes.“
„Mi neniam edziĝus al orfo.“
„Kial?“
„Estus neniu, kiu zorgus pri niaj infanoj.“

**296. Patrino surprovas sur la fileto vestaĵon. Ŝi longe ne povas decidiĝi. La patro: „Rapidu, alimaniere la knabo dume elkreskos el ĝi!“**

297. Inter amikinoj: „Mi povas de mia edzo nenion atingi."
„Do transiru al hidroterapio."
„????"
„Vi devas persiste plori."

**298. Sinjoro Novák gratas pordon de loĝejo kaj najbarino miras, kion li faras. Sinjoro Novák mallaŭte: „Ie mi perdis ŝlosilojn kaj mi deziras, ke la edzino opiniu, ke tio estas nia kato."**

299. „Kial vi aĉetas al la edzino novan veston, dum vi planas eksedziĝi?"
„Alimaniere mi ne devigos ŝin veni al juĝejo."

**300. Inter amikoj: „Kial vi estas tiel nervoza?"**
**„Mi gajnis 10 000 kronojn kaj timas diri tion al mia edzino, ke ŝi min ne suspektu, ke mi gajnis 20 000 kronojn.**

301. „Al mia unua edzino mi estas dankema por kariero kaj al la kariero por mia dua edzino."

**302. Inter kolegoj: „Ekde tiu tempo, kiam mi perdis ŝlosilon de kelo, ni tute ne kverelas kun la edzino."**
**„Kaj ĉu via edzino ne koleras, ke vi perdis la ŝlosilon?"**
**„Mi ne scias, ŝi restis en la kelo."**

303. Salono, kie estas konversacio. Subite maljuna sinjorino diras kolere:
„Mi estas certa ke ĉiuj viroj estas idiotoj!"
„Ne ĉiuj," - mezvoĉe respondas ridetante sinjoro. „Multaj viroj neniam edziniĝis."

**304. Riproĉas edzino al la edzo: „Daŭre vi rigardas en televido futbalon aŭ hokeon. Tio estas aĉa vivo!"**
**La edzo trankviligas ŝin: „Ja mi tamen amas vin pli multe ol akvopoloon aŭ ŝakludon."**

305. Novedzo fanfaronas en drinkejo: „Mi tre bone edziĝis. Mia edzino estas agrabla, saĝa kaj fidela al mi."
Amikoj mokas lin: „Kiel vi povas scii tion?"
La novedzo: „Ja ŝi mem diris tion al mi."

**306. Koleras patro: „Tiu knabo aĉa, li eltiris el mia monujo monon!"**
**La patrino: „Ĉu ne povis fari tion mi?"**
**La patro: „Ne, li lasis al mi tie ion."**

307. „Ĉu vi opinias, ke estas ebla harmonia kunvivo inter viro kaj virino?“
„Ne.“
„Kaj kial?“
„Mi estas edziniĝinta.“

**308. Anonceto: „Nesukcesinta geedzeco kun tri neobeemaj infanoj kaj unu kriema vindinfano serĉas loĝejon.“**

309. Edzino: „Iru aĉeti buteron.“
La edzo: „Ĉu en tia pluvo? Eĉ hundon oni ne elpelus.“
La edzino: „Kial vi iru kun hundo?“

**310. Inter najbarinoj: „Mia edzo foje diras eĉ nek unu vorton dum la tuta tago. Do mi ne scias, ĉu li havas nenion por diri al mi, aŭ li devas ion prisilenti.“**

311. „Ĉu povas esti io malpli bona ol tro frua edziĝo?“
„Jes, malfrua eksedziĝo.“

**312. „Ĉi-jare mi havis belegan libertempon.“**
**„Ĉu vi pasis ĝin ĉe la maro?“**
**„Mi ne, sed la edzino kaj la bopatrino.“**

313. Patrino instruas la filinon, kiu estas ekde nelonge edziniĝinta: „Kun la edzo tro ne diskutu. Tuj komencu plori.“

**314. Juna viro malkviete telefonas al sia karulino: „Sensacio, mia kara. Direktoro faris min sia vicdirektoro, altigis al mi salajron je mil kronoj, post duonjaro, ricevos ni loĝejon, ĉu vi deziras fariĝi mia edzino?“**
**„Jes, mi deziras, karulo. Sed, kiu fakte telefonas?“**

315. Geedzoj partoprenas ĉasadon de rinoceroj. Al la edzo ekmalfunkciis pafilo. La edzino celas la rinoceron, kiu kuregas al ili.
La edzo krias: „Pafu, do pafu!“
La edzino: „Sed nur kondiĉe, ke vi ne mokos min, se mi hazarde ne trafos.“

**316. Edzino: „Kial vi dum manĝo legas? Vi ne scias do, kion vi manĝas.“**
**La edzo: „Ja ĝuste tial mi legas.“**

317. Edzo: „Tio estas bonega gulaŝo. De kie vi havas recepton?“
„El iu detektiva romano.“

**318. „Ĉu vi kredas je amo je la unua rigardo?“**
**„Certe! Ĉu mi povus edziniĝi al mia edzo, se mi lin rigardus ankoraŭ unufoje?“**

319. „Mi havis idealojn. Havis, ĝis mi al unu edziĝis.“

**320. Atleto en stadiono prepariĝas por lancĵeto kaj diras al kolego: „Mi devas strebi, en tribuno sidas la bopatrino.“**
**La kolego: „Vana klopodo, tiel malproksimen vi ne ĵetos.“**

321. Edzino: „Mi kapablas imagi, kiel terurajn ideojn vi havis, kiam mi hieraŭ foriris kaj lasis al vi neniun informon.“
„Jes, ke vi revenos.“

**322. „Amiko, serioze mi avertas vin. Se ankoraŭ unufoje mi kaptos vin kun mia edzino, vi devos edziĝi al ŝi.“**

323. Diras sinjoro Novák: „Mi havas neniujn problemojn pri mia libertempo. Kiam mi iros, fiksos la estro. Kien mi iros, fiksos mia edzino. Por mi restas nur decido, kie mi akiru monon por tio.“

**324. „Ĉu vi scias, ke geedzoj N. veturos ĉirkaŭ la mondo? Ŝi veturos norden kaj li suden.“**

325. „Ĉu vi vere edziniĝis al Roberto? Mi opiniis, ke vi deziris neniam edziniĝi?“
„Tion opiniis, kompatindulo Roberto, ankaŭ.“

**326. „Estas nekredeble, kiel stulta estas tiu nia filo,“ – rimarkas edzo.**
**„Almenaŭ vi povas esti certa, ke li estas via.“ – reagas edzino.**

327. „Tiom da paroloj, ke forflugis via kanario! Kion vi dirus, se mi forkurus de vi?“
„Kaj ĉu vi estis jam trifoje honorigita en ekspozicio?“

**328. Revenis edzino al sia edzo post iom da tempo kaj demandas: „Ĉu vi povas pardoni al mi, ke mi foriris de vi kun alia?“**
**„Tion jes, sed neniam mi pardonos al vi, ke vi revenis.“**

329. Telefonas filino al la patro: „Kion mi faru, mia edzo estas al mi malfidela.“
La patro: „Telefonu vespere, la patrino havas pri tio pli grandan sperton.“

**330. „Kio estas ĉefa malavantaĝo de poligamio?“**
**„Bopatrinoj.“**

331. Novedzo du semajnojn post geedziĝfesto: „La edzino estas rilate al mi tre dolĉa, sed ĉiun manĝon ŝi trosaligas.“

**332. „Ĉu vi kredas, ke ekzistas ĉiopova forto?“**
**„Memkompreneble, ja mi edziĝis al ŝi.“**

333. Kvar sekretoj de feliĉa geedzeco:
1. Estas grave trovi tian virinon, kiu kapablas bone kuiri kaj ordigi.
2. Estas grave trovi tian virinon, kiu kapablas perlabori monon.
3. Estas grave trovi tian virinon, kiu ŝatas seksumi.
4. Estas grave, ke ĉi tiuj tri virinoj ne renkontu unu la alian.

**334. Edzino al la edzo: „Vi ne plu amas min. Antaŭe, kiam vi venis hejmen, vi rigardis en ŝrankojn, ĉu tie mi havas kaŝitan amanton. Nun vi enrigardas fridujon, kio estas tie por manĝi.“**

335. Gefianĉoj vespermanĝas. Ŝi miele:
„Sciu mia kara, mi scipovas kuiri nur torton kaj fiŝon.“
„Tio ne tro gravas, sed diru al mi, kion de tiuj du ni manĝas nun?“

**336. „Mi edziniĝis kun viro, kiun mi deziris. Ĉu povas esti iu pli feliĉa?“**
**„Jes, tiu, kiu edziniĝas kun tiu, kiun deziras ĉiuj aliaj.“**

337. Direktoro: „Ĉu vi telefonis al mia edzino, ke ĉi vespere mi ne venos hejmen?“
„Jes.“
„Kion ŝi diris?“
„Ĉu ŝi povas fidi tion.“

**338. „Bedaŭrinde, ke mi ne scipovas iun fremdan lingvon.“**
**„Kial?“**
**„Vi vidus, kion ĉion mi tiam dirus al mia edzino!“**

339. „Mia edzo trompas min, sed mi suferas silente.“
„Do vi suferas duoble.“

**340. Junulo trovis kvarfolion, donis ĝin al sia karulino kaj ŝi feliĉege diras: „Eble ni havos baldaŭ edziĝofeston.“**
**Junulo surprizite: „Mi opiniis, ke kvarfolio alportas feliĉon.“**

341. Edzino: „Se ne estus vi, ni estus ideala geedza duopo.“

**342. „De kio vi havas tiun bluaĵon sub la okulo?“**
**„Hieraŭ mi helpis al iu fraŭlino kiu estis en akvo, venis mia edzino kaj batis min.“**
**„Ŝi estas senkora. Kaj kie tio okazis?“**
**„En nia banĉambro.“**

343. Edzino: „Tiuj viaj eternaj paroloj pri futbalo jam enuas min. Ĉu vi ne volas komenci paroli pri io alia, ekzemple pri seksumado?
La edzo: „Ja vi ne deziras, ke mi sabaton post sabato opukiĝu pri seksumado?“

**344. „Kion komunan vi havas en la geedzeco?“**
**„Jam nur tiun televidantenon.“**

345. Edzo trovis edzinon en tikla situacio kaj koleriĝas. La edzino trankviligas lin: „Ne insultu, vinon hieraŭ vi fortrinkis, cigaredojn forportis, kafo plu ne estas, do kion mi povis oferti al la vizitanto?“

**346. Koleras iu viro: „Neniam ekzistis, ekzistas kaj ekzistos viro, kiu ne interdisputis kun sia bopatrino.“**
**Patrino de lia edzino: „Tamen ekzistis - Adamo!“**

347. Geedziĝa nokto. Edzo demandas la edzinon:
„Pri kio vi pensas?“
La novedzino: „Pri tio, pri kio vi, karulo.“
„Ĉu vere?, do mi iros al fridujo por la biero.“

**348. Novedzo fine kuraĝas diri: „Nun, kiam jam pasis nia geedziĝfesto, mi diros al vi, ke vi havas ankaŭ iujn difektojn.“**
**„Ne klopodu, mi konas mem ĉiujn. Tio estas tiuj difektoj, pro kiuj mi ne ricevis pli bonan viron, nur vin.“**

349. „Mia edzo ne drinkas, ne fumas...“
„Ĉu via edzo ne plu fumas?“
„Nur post bona tagmanĝo kaj tio estas ĉe ni tre malofte.“

**350. „Ĉu povas virino fari viron milionulo?**
**„Jes, se li antaŭe estis miliardulo.“**

351. Edzino al la edzo: „Kiel donacon al festotago mi pruntos al vi ŝlosilon de domo, vi povas iri al amikoj en drinkejon. Sed je la oka estu hejme!“

**352. „Ne edziĝu en junio, edziĝu en julio."**
**„Kial?"**
**„Vi gajnos unu tutan monaton."**

353. „Sinjoro, mi donos al vi efikan medikamenton kontraŭ via stomakdoloro"
„Sinjoro kuracisto, ĉu ne estus pli bone, se vi malpermesus al mia edzino kuiri?"

**354. Edzino: „Kiam vi fine dekutimiĝos diradi daŭre: „Mia domo, mia aŭto, mia kabano? Vi parolas kiel egoisto."**
**„Do bone, kaj kie mi havas nian kalsonon?"**

355. Inter amikinoj: „Ĉe ni edukas infanojn edzo."
„Kaj kion faras vi?"
„Mi edukas la edzon."

**356. „Mia patro estas tre kuraĝa."**
**„Tiu mia estas timema. Kiam la patrino ne estas hejme, li dormas ĉe najbarino."**

357. Post geedziĝnokto novgeedzoj vekiĝas. Ŝi demandas: „Kion mi kuiru al vi okaze de nia unua kuna tagmanĝo?"
Li: „Kuiru, kion vi deziras, nur ne eskalopon. Ja tiun mi ŝatas plej multe."

**358. „Amikoj, finfine mi malkovris ilon, kiu plibeligas mian edzinon."**
**„Kaj kio estas tio?"**
**„Botelo da vodko."**

359. „Sinjorino Juna, tiuj infanoj en ĉareto estas vere ĉarmegaj. Ĉu estas eĉ ĝemeloj?"
„Jes, estas."
„Ne diru! Kaj ambaŭ estas viaj?"

**360. Virinmodelo en ateliero: „Mia edzo estas tia avarulo, ke mi jam havas preskaŭ nenion por malvesti."**

361. Edzino: „Mi ne scias, kial vi elpensas daŭre tiom da mensogoj."
Edzo: „Ĉar daŭre vi demandas min ion."

**362. Edzino: „Ĉi nokte mi sonĝis teruran sonĝon. Mi kantis kaj..."**
**La edzo: „Tio estis vere terura."**

363. Kiu ne pravas kaj cedas, estas saĝa. Kiu cedas kaj pravas, estas edziĝinta.

**364. „Kuracisto al mi rekomendas vojaĝi, Johano. Kien ni iros?“**
**„Al alia kuracisto, karulino.“**

365. Inter franduloj: „Kio plej multe bongustas al vi?“
„Matenmanĝo ĉe fremda virino.“

**366. „Ĉu vi freneziĝis? Vi havas sesdek jarojn kaj deziras edziĝi al dekokjara knabino? Ja tio estas sinmortigo.“**
**„Pli bone mortigi sin per bela brilfrotita tranĉilo ol per aĝa rusta forketo.“**

367. „Kial vi mienas tiel malgaje?“
„Mi atendis en stacidomo kaj la edzino de banloko ne alveturis. Mi timas, ke ŝi estas hejme jam ekde hieraŭ!“

**368. Al sinmortigonto, kiu staras en fenestro de la oka etaĝo kaj preparas sin salti suben, vokas lia amiko: „Ne frenezu, pensu pri la infanoj kaj la edzino!“.**
**Iom poste: „Ne, pri la edzino ne!“**

369. Je la tria horo matene eniras edzo al dormĉambro kaj malgajege anoncas:
„Kara, paku viajn aĵojn kaj kuru al Johano Balano! Mi malgajnis vin dum kartludo.“

**370. Revenas sinjoro nokte hejmen kaj tie bonvenigas lin hundo per terura bojado.**
**Li diras al la edzino: „Kion vi parolis al tiu hundo pri mi?“**

371. „Kio hieraŭ okazis ĉe vi, ke estis tia terura bruo kaj krio?“ – demandas najbarino.
„Nu, mi trovis en poŝo de edzo mamzonon, kaj li ĵuris ke ĝi estas lia.“

**372. Demandas onklino sian tridekjaran nevon: „Ĉu vi ne pripensas geedzecon?“**
**„Ja mi pripensas, se mi ne pripensus, jam delonge mi estus edziĝinta.“**

373. Edzino dum balo al sia edzo: „Ĉu vi deziras finfine peti min pri danco?“
La edzo: „Memkompreneble, ja mi ne estas ĉi tie nur por amuziĝi.“

**374. „Kara, ĉu vi dezirus edziniĝi al mi?“**
**„Jam dufoje mi diris, ke ne.“**
**„Ho, pardonu min, ĉu tio estis vi?“**

375. Revenas edzo hejmen kaj demandas: „Kion vi kuiris por tagmanĝo? Mi malsatas kiel lupo.“
„Mi fakte ne scias. Forgluiĝis glumarko de konzervaĵo.“

**376. Edzino: „Dum la tuta vivo mi nur kuiras, rostas, fritas por vi kaj kion mi mem havas de tio?“**
**„Vi nenion, sed mi stomakulcerojn.“**

377. Riproĉas la edzino al edzo: „Kial vi donis al vestgardistino dudek kronojn?“
„Rigardu, kian mantelon ŝi donis al mi.“

**378. Edzino al la edzo: „Nun mi iros por kvin minutoj al najbarino, ne forgesu ĉiun duonhoron turni viandon en la bakujo.“**

379. „Kiel vi fartis dum geedziĝ-festo?“
„Malbone. Ni estis dektri ĉe la tablo.“
„Eble ja vi ne estu tiom superstiĉa.“
„Mi ne estas, sed ja manĝo estis nur por dek.“

**380. Edzo: „Morgaŭ mi aĉetos skiojn kaj ni iros dimanĉe en montaron.“**
**Edzino: „Vi ĝojigis min. Sed tiujn skiojn ne aĉetu, ni prefere iru per aŭtobuso.“**

381. „Laŭdire vi ekkonis vian edzinon dum libertempo.“
„Ne, tie mi edziĝis, vere mi ekkonis ŝin nur hejme.“

**382. „Karulo, kion vi dezirus se faladus stelo?“**
**„Ke ĝi ne trafu min!“**

383. „Sinjoro advokato, mi volus divorci, sed diskrete.“
„Kion vi celas?“
„Nu, por ke mia edzino pri tio ne eksciu!“

**384. „Dum tri tagoj mi ne povis dormi pro tusado de mia edzino.“**
**„Do alvoku kuraciston!“**
**„Nenecesas. Mi forveturos por 19 tagoj por deĵorvojaĝo.“**

385. Malicemo estas, kiam edzino kredencas al vi bieran fromaĝon, vinajn kolbasojn kaj glason da mineralakvo.

**386. Edzino al la edzo: „Ordiĝu iom!“**
**La edzo: „Kial, ĉu vi iun atendas, aŭ ni ien iros?“**

387. Edzino al la edzo: „Antaŭ vi mi havis ok adorantojn kaj ĉiuj estis pli saĝaj ol vi.“
„Ili ankaŭ pruvis tion.“

**388. „Mia edzino estas kiel neĝplago."**
**„???"**
**„Ĉiam ŝi surprizas min, kiam mi tion malplej atendas."**

389. Sinjoro N. rakontas al amikoj: „Mi ne volas fanfaroni, sed mia edzino estis ĉiam laborema. Jam dum edziĝonokto ŝi trikis al mi trikveŝton."

**390. Post geedza kverelo diras la edzino paciĝeme: „Konfesu, karulo, ke ni kulpas ambaŭ. Ĉefe vi."**

391. Kiam vi havas pli longtempe deŝiritan butonon, edziĝu aŭ eksedziĝu.

**392. Edzino antaŭ la spegulo: „Beleco de virino estas potenca armilo."**
**La edzo: „Jes, sed de kie mi daŭre prenu monon por armado?"**

393. Plej belaj vortoj de edzino: „Tagmanĝo estas sur la tablo."

**394. Edzino al la edzo ĉe fino de kverelo: „Do diru al mi, kial vi edziĝis al mi?"**
**„Ĉar mi ĉiam estis miopega."**

395. Novedzo: „Ni estas kune nur la unuan tagon kaj jam vi kverelas kun mi."
„Tiun tagon mi atendis tri jarojn."

**396. Edzino al la edzo: „Kion vi farus, se forkaptus min alia viro?"**
**„Neniam mi forgesus vin."**

397. „Kion diris al vi edzino, kiam vi venis hejmen nur matene?"
„Mi ne scias precize, ĉar kiam mi estis foriranta en la laboron, ŝi ankoraŭ parolis."

**398. Eĉ ateisto adoras virinon, al kiu li povas kredi.**

399. Filozofo pri geedzeco: „Insulo de amo, ĉirkaŭita per oceano da elspezoj."

**400. Edzino al la edzo: „Vi havas teruran sklerozon. Certe vi forgesis ion aĉeti, sed mi ne povas rememori, kion."**

401. Inter amikinoj: „Ĉu vi jam aŭdis, ke Anja edziniĝos?"
„Ne. Mi eĉ ne scias, ke ŝi estas graveda."

**402. Iam havis infanoj pli multe da gefratoj. Nuntempe ili havas pli multe da patroj.**

403. „Kial vi eksedziĝis kun via edzino?“
„Kaj kun kiu alia mi eksedziĝu?“

**404. Patrino al la filino, kiu antaŭ du monatoj edziniĝis: „Kia estas via edzo?“
„Scivolemega. Ĉiam, kiam mi kuiras, li volas scii, kio tio estas.“**

405. Pri la una amo oni havas malbonajn rememorojn, precipe tiam, kiam oni eĉ kun ĝi edziĝis.

**406. Patro al la filino: „Vi freneziĝis. Nia aŭtomobilo disfalas, tra tegmento pluvas, fridujo ne funkcias, stuko forfalas kaj vi deziras edziniĝi kun poeto!“**

407. Inter amikinoj: „Mi ĝojas, ke la edzon elektis al mi miaj gepatroj. Almenaŭ ili ne povas fari al mi riproĉojn.“

**408. Patro al siaj idoj: „Manjo, estas tempo, ke vi jam edziniĝu. Kaj Joĉjo, mi esperas, ke vi ne estos tiel stulta, ke vi edziĝos.“**

409. „Kial ne sufiĉas al vi mono por mastrumaĵo?“
„Stariĝu sur la pesilon kaj ekvidos.“

# Infanoj

**410. Gepatroj sendis sian filon al avo por 14 tagoj. Post ĉi tiuj 14 tagoj ili sendis al la avo telegramon: „Nepon ne sendu reen, ĉi tie furiozas uragano.“**
**La avo respondis: „Mi sendas la nepon, prefere sendu uraganon.“**

411. Demandas maljuna kamparano en Prago junulon: „Mi petas, kiel plej bone mi sukcesus veni en muzeon?“
La junulo: „Lasu vin remburi!“

**412. Admonas maljunulo knabeton: „Knabeto, knabeto, ĉu vi ne komencis fumi iom tro fure?“**
**„Kial tro fure? Ja post momento estos tagmezo.“**

413. Patro al la filo dum promeno: „Rigardu, tie flugas cikonio.“
La filo kolermiene: „Ne komencu denove kun tiuj biologiaj fabeloj.“

**414. Patro punas la filon kaj la patrino diras: „Ĉu mi ne diris al vi jam kelkfoje, ke vi kalkulu ĝis dek, ĝis kiam finiĝos via kolero?“**
**La patro: „Mi kalkulas, sed dume mi genuas sur li, por ke li ne foriru.“**

415. Patrino: „Ne, tiu filmo estas al junularo malpermesita, mi ne lasas vin iri. Preferu atendi, kiam oni elsendos ĝin en televido.“

**416. „Mi gratulas, mi aŭdis, ke al vi naskiĝis ido. Ĉu tiu estas knabo?**
**„Ne“**
**„Ĉu knabino?“**
**„Jes, kiel vi tion divenis?“**

417. Knabeto staras antaŭ spegulo kaj pudras sin. Lia fratineto rigardas tion kaj diras: „Vi ne rajtas pudri vin. Nur virinoj pudras sin. Viroj devas lavi sin.“

**418. Patrino al al filo: „Memoru, kion vi povas fari hodiaŭ, ne prokrastu ĝis morgaŭ.“**
**Filo: „Bone, mi manĝos tiun pecon da torto, kiun vi kaŝis por morgaŭ.“**

419. „Kiun profesion havos via filo post kiam li finos la lernejon?“
„Mi ne scias – sed li amas bestojn, do eble li estos bučisto.“

**420. Demandas filineto la patrinon: „Kial vi tiel frue edziniĝis?“**
**„Pri tio kulpas vi.“**

421. Najbarino al knabeto: „Kiel vi akiris frateton?“
„Mi ne scias, la gepatroj ankoraŭ nun pri tio kverelas.“

**422. „Panjo, kiu estas filmstelo?“**
**„Aktorino.“**
**„Kaj ĉu aktoro estas filmluno?“**

423. Super infanĉareto: „Tio estas belegaj ĝemeloj. Ĉu estas ambaŭ knabetoj?“
„Nur tiu dekstra, tiu maldekstra estas melono.“

**424. Juna viro interesiĝas en entrepreno pri laborloko.**
**Estro: „Ni tre volonte dungus vin, sed ĉe ni estas nenio por fari.“**
**Junulo: „Bonege, tio konvenas al mi.“**

425. „Imagu, nia avino forveturis je libertempo kaj niajn infanojn lasis je nia zorgo!“

**426. Knabeto ne volas obei la patrinon kaj lia patro diras al li: „Mi estas pli aĝa ol vi kaj vian patrinon mi obeas.“**

427. Diras maljunulo en emeritdomo: „Mi dezirus vivi ankoraŭ dudek jarojn.“
„Kial?“
„Mi dezirus ĝisatendi, kiam mia nepo alveturigos ĉi tien mian filon.“

**428. Knabeto ĉe tablo kolere: „Kial ĉiuj manĝoj, kiuj al mi ne bongustas, estas sanaj?“**

429. Knabeto plendas al amiko: „Mia patrino krias je mi kvazaŭ mi estus ŝia edzo.“

**430. Knabo demandas: „Onklo, ĉu vi estas edziĝinta?**
**„Ne.“**
**„Kaj kiu diras al vi, kion vi faru?“**

431. En gastejo mendas knabeto bieron. Kelnero miras: „Ĉu vi trinkas bieron?“
„Ne, sed por fruktsuko mankas al mi unu krono.“

**432. Iras patrino tra parko kaj vidas, ke ŝia deksesjara filino ĉikaŭbrakas iun junulon. Ekvokas je ŝi: „Tuj lasu tiun fraŭlon!“**
**„Mi ne forlasos, mi vidis lin unua!“**

433. Miras tabak-vendisto: „Ĉu tiom da cigaredoj vi aĉetas por via patro?“
Knabo: „Ne, tio estas por nia tuta klaso.“

**434. Najbaro: „Kion vi festis hieraŭ, ke vi dancis en ĝardeno?“**
**“Ni ne festis, la filo sukcesis renversi abelujon.“**

435. „Sinjorino Nováková, mi miras, kiel modele vi edukas viajn infanojn.“
„Tio estas facila. Ĉiam mi imagas, ke mi edukas fremdajn infanojn, kaj fremdajn infanojn oni ja edukas facile.“

**436. Eta knabo vane provas atingi sonorileton. „Atendu, mi helpos al vi,“ diras unu maljunulo kaj premas la sonorileton.**
**„Bone, avo, kaj nun ni kuru.“**

437. „Peĉjo, kiun vi amas pli multe, la patron aŭ la patrinon?“
„La patron, tiu ne estas dum la tuta tago hejme.“

**438. „Franĉjo, kial vi nomiĝas Novák kaj via patrino Machová?“**
**„Verŝajne tial, ĉar la patrino edziniĝis kaj mi ne.“**

439. Joĉjo vane petas patrinon, ke ŝi donu al li monon por kinejo. „Panjo, kiam vi donos al mi monon, mi diros al vi ion interesan pri paĉjo.“
„Bone, jen mono. Kio estas kun paĉjo?“
„Li faras kun nia najbarino la samon, kiel vi kun nia najbaro.“

**440. „Panjo, ĉu estas vero, ke cikonioj forflugas por travintri en varmaj teritorioj?“**
**„Jes, fileto.“**
**„Do kiel eblas, ke mi naskiĝis en januaro?“**

441. Patrino revenis hejmen kaj demandas la filon:
„Kia krio estas en al apuda ĉambro?“
La filo: „Avo klarigas al la patro, kiel ĝuste plenumi mian hejmtaskon.“

**442. Nepo: „Avo, iru kun mi en cirkon, rajdas tie belrajdantino tute nuda.“**
**Avo entuziasme: „Mi iros tre volonte, jam delonge mi ne vidis ĉevalon.“**

443. Venis vilaĝestro en domon kaj demandas: „Pedro, ĉu estas la patro hejme?“
Pedro: „Jes, li estas en stalo, li estas tiu kun ĉapelo.“

**444. „Paĉjo, kiel funkcias cerbo?“**
**„Lasu min, mi havas en la kapo nun aliajn aferojn!“**

445. Fanfaronas knabeto: „Ĉe ni laboras servistino kaj ni alparolas ŝin: avino.“

**446. Demandas patrino la filon: „De kie vi havas tiujn belegajn rozojn?“**
**„De sinjoro Novák.“**
**„Ĉu li scias pri tio?**
**„Memkompreneble, li kuris post mi trans tri stratoj.“**

447. „Panjo, iu viro surstrate diris al mi, ke li estas mia patro.“
„Tion povus diri ĉiu.“

**448. Sinjorino demandas terure malpuran knabon: „Ĉu hejme vi ne lavas vin?“**
**Knabo: „Kial? Ni ekkonas nin laŭ voĉo.“**

449. Knabeto respekte salutas fianĉon de sia pli aĝa fratino. Tiu demandas: „Ĉu vi konas min?“
„Jes, vi estas tiu pasero en la mano.“

**450. Demando de patrino: „Mi havas dekkvinjaran filinon. Kiel mi klarigu al ŝi iujn aferojn pri sekso?“**
**„Ŝajniĝu, ke vi scias minimume tiom, kiom ŝi.“**

451. „Marko, paĉjo hodiaŭ diris al mi, ke ni devenas de simioj. Ĉu tio povas esti vero?“
„Mi ne zorgas pri viaj familiaj rilatoj.“

**452. Knabeto al la patrino: „Tio estas maljusta, patron vi lasas trankvile dormi ĉe televidilo kaj min, kiu volonte rigardus, vi pelas en liton.“**

453. Fanfaronas knabeto: „Mi perlaboris 5 kronojn. Mia onklino donis al mi du kronojn, por ke mi violonludu kaj poste plu tri kronojn, por ke mi finu.“

**454. „Avo, kiam vi fariĝis avo?“**
**„Kiam vi naskiĝis.“**
**„Se mi ne naskiĝus, ĉu vi ne estus avo?“**
**„Ne.“**
**„Kion vi donos al mi pro tio?“**

455. „Sekigitan lakton oni hejme produktas tiel, ke dum du semajnoj oni ne trinkigas bovinon kaj poste senpolvigas bovinmamon.“

**456. Koleras patrino: „Kie vi tiel terure kotmakulis vin, ja nenie ĉirkaŭ estas iu pluvmarĉeto.“**
**Filo: „Neniu problemo, sufiĉas nur diligente serĉi!“**

457. Knabeto aŭskultas kun gepatroj en teatro koncerton kaj atenteme rigardas violonĉeliston. Poste mallaŭte li demandas la patron:
„Paĉjo, kiam tiu sinjoro finsegos tiun aĵon, ĉu ni iros hejmen?“

**458. „Paĉjo, kio estas deficito?“**
**„Se vi havas malpli multe ol se vi havas nenion.“**

459. Kiam patro post pli longa tempo revenis el hospitalo, mienis lia filo seniluzigite.
La patro: „Ĉu vi ne ĝojas?“
La filo: „Jes, sed kie estas la bebo?“

**460. Knabeto estas kun sia patro en zooĝardeno. Ĉe cervoj li entuziasme ekkrias: „Ekrigardu, paĉjo, tiu cervo havas sur la kapo vesthokon el nia antaŭĉambro.“**

461. „Mi gratulas, heredanto naskiĝis al vi.“
„Nur filo, amiko, heredi eblas nenion.“

**462. Knabineto vundis sian fingron kaj tre ploris. Poste ŝi ĉesis. Patrino: „Ĉu tio ne doloras plu?“**
**La knabineto: „Ĝi doloras, mi ploros plu, sed nun mi iom ripozos.“**

463. Knabeto: „Mi ludas jam la duan violonĉelon. La unuan disrompis mia patro.“

**464. Pluvas. Antaŭ kabano sidas patro kun filo kaj demandas lin: „Ĉu vi scias, kiel estiĝas pluvo?“**
**„Mi scias, pluvnubo ne plu povas elteni tion.“**

465. Patro revenas hejmen el laborejo. En antaŭĉambro diras al li la filo: „La patrino estos surprizita, antaŭ duonhoro ŝi ektelefonis al vi en oficejon kaj daŭre ŝi parolas kun vi.“

**466. Plenkreskanta filo al la patro: „Kiom perlaboru edziĝinta homo?“**
**„Minimume trioble pli multe.“**

467. Sinjorino demandas surstrate knabeton: „Kial vi ploras?“
„Ni havas por tagmanĝo tranĉaĵojn kun terpoma kaĉo.“
„Ĉu vi ne ŝatas ĝin?“
„Mi ŝatas ĝin, sed mi ne povas trovi la vojon hejmen.“

**468. Plendas viro: „Oni konstante havigadu ion por infanoj. Pasintsemajne tio estis skioj, hodiaŭ lambastonoj.“**

469. Plendas juna patrino: „Fileto laŭdire ludos kun konstruludaĵo, nur kiam li ricevos kvindek kronojn po horo.“

**470. Malgranda knabineto demandas: „Onklino, kial vi ne havas infanojn?“**
**„Cikonio ne alportis ilin al mi.“**
**„Ho jes, se ankoraŭ vi kredas je cikonio!“**

471. „Kial vi deziras por naskiĝtago tiun simion?“
„Por eksperimento, paĉjo. Mi deziras observi, kiel ĝi ŝanĝiĝas al homo.“

**472. Patro: „Memoru, ke per bonkonduto en la vivo vi perdos nenion.“**
**Filo: „Nek lokon en tramo?“**

473. En familio naskiĝis trinaskitoj. Trijara frateto demandas: „Ĉu ĉi tie restos ĉiuj, aŭ oni sendis ilin al ni, por ke ni elektu?“

**474. „Franĉjo, kiam vi jam finfine komencos manĝi per manĝilaro?“**
**„En kiun manon mi poste ekprenus tranĉaĵon?“**

475. Knabineto diras al sia frateto: „Mi preferus esti knabo ol knabino.“
„Do vi plendas malfrue! La patrino antaŭ nelonge finkudris por vi jupon.“

**476. „Julia, vi devas jam lerni dormi sola! Ja vi jam estas sufiĉe aĝa.“**
**„Nu, panjo, vi estas eĉ pli aĝa kaj daŭre dormas kun paĉjo!“**

477. „Ĉu via filo pripensas estontecon?“
„Daŭre. Ĉion li prokrastas por alia tago.“

**478. Knabeto demandas la patron: „Kiam mi jam scipovas paroli, kion mi lernu nun?“**
**„Silenti, knabeto“**

479. Patrino demandas sian malsanan filon: „Kie somere vi malvarmumis tiel terure?“
„Mi ne scias, verŝajne nokte, mi sonĝis, ke mi konstruas neĝulon.“

**480. „Franĉjo, kio plaĉis al vi plej multe en zooĝardeno?“**
**„La unua pavilono apud enirejo.“**
**„Kion oni havis tie?“**
**„Kolbasetojn kaj limonadon.“**

481. Eduko estas eksperimento fari el mia infano ion alian ol estas mi.

**482. „Paĉjo, kial tiu aglo tiel longtempe rondflugas sur unu loko?“
„Mi ne scias, verŝajne jam mankas al ĝi benzino.“**

483. Turisto demandas knabeton: „Kie ĉe vi oni lasas razi kaj tondi sin?“
„Sur la kapoj.“

**484. „Rigardu tra la fenestro, ĉu ankoraŭ falas neĝo.“
„Neĝo ne plu, nun nur homoj.“**

485. Patrino al Peĉjo: „Hodiaŭ vi tro kolerigis min. Mi diros tion vespere al la patro.“
Peĉjo: „Tiuj virinoj! Ili kapablas respekti neniun sekreton!“

**486. Malgranda filineto demandas la patron: „Kial vi manĝas, kiam vi ne plu estos pli granda?“**

487. Anja vizitis sian avinon en kamparo kaj vidis unuafoje fazanon. Ŝi demandas tre mirigite: „Avinjo, ĉu ĉe vi surhavas kokinoj kostumojn?

**488. „Panjo, tiu gulaŝo ne bongustas al mi.“
„Nur silentu kaj manĝu, post dudek jaroj vi parolos al via edzino, kiel eminenta kuiristino mi estis.“**

489. Revenas patro el laborejo kaj domzorgisto raportas: „Via filo rompis fenestron.“
La patro venis en loĝejon kaj diras al filo: „Diru nenion, ĉion mi scias.“
„Bone, do diru al mi, kiam oni kronis Karolon la Kvaran imperiestro?“

**490. Patro al sia sesjara filo: „Kiomfoje mi jam diris al vi, ke vi ne ludu kun alumetoj?“
„Mi ne ludis, mi bezonis ekbruligi cigaredon.“**

491. Sinjoro demandas antaŭ domo knabineton: „Ĉu loĝas en tiu ĉi domo sinjoro Birdo?“
„Jes, en la kvara etaĝo, kaj li nomiĝas sinjoro Fringo.“

**492. „Beata, ĉu jam kuras via frateto?“
„Ne... Sed piedojn li jam havas.“**

493. Patrino: „Nun bele dormu, Peĉjo, kaj se vi nokte vekiĝus, voku –panjo– kaj la paĉjo tuj venos.“

**494. „Paĉjo, kion oni havis, kiam ankoraŭ ne estis televido?“
„Sanktan trankvilon, fileto.“**

495. „Paĉjo, kie situas Bermuda triangulo?“
„Vi devas demandi la panjon. Ŝi ordigas ĉion.“

**496. Sinjoro N. koleras je sia filo: „Ĉu vi ne povis diri, ke vi ekzercas violonludi? Jam duonhoron mi oleas hinĝojn.“**

497. „Paĉjo, kio estas gajnlisto?“
„Tio estas listo de loteribiletoj, kiujn aĉetis iu alia.“

**498. Patrino: „Mi diris al vi, ke vi lavu plankon!**
**Filo: „Mi lavis ĝin.“**
**Patrino: „Do, kial tio ne estas videbla?“**
**Filo: „Ĝi jam sekiĝis.“**

499. Onklino donacas al Peĉjo atlason kaj diras: „Estimu ĝin, ĝi estas ankoraŭ el tempo de mia juneco!“
„Ĉu estas en ĝi jam Ameriko, onklino?“

**500. „Panjo, sur la ĉielo estas granda kometo. Ĉu ni povas iri rigardi ĝin?“**
**„Jes, sed ne iru tro proksimen al ĝi!“**

501. Patrino: „Ĉu kuracisto stetoskopis vin bone?“
Filo: „Mi opinias, ke ne. Li nur tenis mian manon kaj poste ekrigardis, ĉu funkcias lia horloĝo.“

**502. „Ĉu vi senŝeligis la pomojn, Manjo?“**
**„Jes, avino.“**
**„Kaj kie estas la ŝeloj?“**
**„Mi formanĝis ilin.“**

503. Patrino al la fileto: „Kial vi havas tiel malpurajn manojn?“
„Vi ja ordonis al mi, ke mi frotegu mian kolon.“

**504. Avinjo skribas: „Alveturigu al ni la infanojn por ferioj. Mi tre ĝojas. Kaj ne forgesu alporti kun ili grandan kvanton da medikamentoj kontraŭ kapdoloro.“**

# Krimuloj kaj juĝistoj

505. Viro en trajno rimarkas ke en lia poŝo havas manon ŝtelisto. Tiu elturniĝas: „Pardonu, mi pensis ke tio estas mia poŝo. Ni havas similan pantalonon.“

**506. Ĉe tribunalo: „Akuzito, kial vi tiel terure ebriiĝis?“**
**„Pro memdefendo. Atakis min soifo.“**

507. Rabisto al juvelisto: „Manojn supren kaj donu al mi tiun diamantan kolieron! Kaj la prezetikedon for, ĝi estu donaco!“

**508. Al akuzita edzino: „Kial vi batis vian edzon per seĝo?**
**„Ĉar levi tablon mi ne kapablis.“**

509. Ekzekutisto kondukas kondamniton al ekzekuto. Pluvas, furiozas vento, hajlas. La kondamnito diras: „Kia malbonega vetero!“
La ekzekutisto: „Feliĉa vi! Sed mi devas en tiu veteraĉo reveni!“

**510. Esploristo, alvokita en loĝejon, kie okazis rabatako: „Antaŭ ĉio ni deprenos fingropremaĵon.“**
**Sinjorino nekuraĝe: „Mi ne scias, antaŭ mallonga tempo mi banis min.“**

511. Tribunalestro al malliberulo, kiu forkuris el malliberejo: „Kial vi forkuris?“
„Mi deziris edziĝi.“
„Vi havas strangan koncepton de libereco!“

**512. Juĝisto: „Akuzito, hontu! En tia maljuna aĝo ankoraŭ ŝteli televidilon!“**
**„Estimata juĝisto! Dum mia juneco televidiloj ankoraŭ ne ekzistis!“**

513. Juĝisto: „Akuzito, ĉu vi estis iam punita?“
„Jes, antaŭ dek jaroj.“
„Kaj kion vi faris ĝis nun?“
„Mi estis do arestita!“

**514. „La mono kapablas ŝanĝi vivmanieron de homo.“**
**„Jes, precipe, kiam li malkaŝas kiel li gajnis ĝin.“**

515. Juĝisto: „Akuzito, kial vi edziĝis al du virinoj?“
La akuzito: „Mi aĉetis kabanon kun granda ĝardeno kaj poste mi konstatis, ke unu edzino ne kapablos prizorgi ĝin.“

**516. Advokato: „Sinjoro Novák, kial vi deziras eksedziĝi kun via edzino?“ „Ĉar profetistino profetis al ŝi, ke ŝi frue vidviniĝos.“**

517. Vokas arestito fraŭlinon tra kradita fenestro: „Fraŭlino, ĉu vi havos tempon post 6 monatoj, la 24-an de aprilo 2009 je la dekkvara?“

**518. Juĝisto: „Akuzito, se vi diros al ni, kie estas kaŝita la rabita mono, vi ricevos malpli altan punon.“ „Sed tio estas ĉantaĝo, sinjoro juĝisto.“**

519. Juĝisto: „Akuzito, kial vi ne redonis oran ringon, trovitan en parko?“ „Ja sur ĝi estis skribite – por ĉiam via.“

**520. En bankon perforte eniras rabisto kaj ekkrias: „Manojn supren!“ Momenton li atendas kaj poste demandas: „Ĉu vi ĉiuj jam havas la manojn supre? Sen okulvitroj mi vidas malbone.“**

521. Ekzekutisto venis al kondamnito: „Ĉu mi povus ekzekuti vin jam hodiaŭ? Mi havos liberan sabaton.“

**522. „Kio kaŭzis ke vi estis malliberigita?“ „Fakte malvarmumo. Mi ternis kaj la nokta gardisto en la vendejo vekiĝis.“**

523. Ĉe tribunalo: „Akuzito, kial vi ne deziras advokaton?“ „Mi decidis, ke ĉi-foje mi parolos veron.“

**524. Advokato: „Kial vi deziras eksedziĝi?“
Kliento: „Ĉar ekde la unua tago post la geedziĝo ŝi ĵetas je mi diversajn aĵojn.“
„Kiel longe vi estas edziĝinta?“
„Dek du jarojn.“
„Kaj kial vi deziras eksedziĝi nur nun?“
„Nur antaŭ dek kvar tagoj ŝi komencis trafadi min.“**

525. Juĝisto: „Akuzito, kial vi prirabis dufoje la saman vendejon?!“ „Ĉar tie oni havis surskribon: Se vi estos ĉe ni kontentaj, vizitu nin denove.“

**526. Juĝisto: „Akuzito, ĉu ekzistas iu mildiga cirkonstanco, kial vi faris enrompon en tiun aŭton?“ „Jes ja, tiu aŭto estis parkita tuj antaŭ tombejo kaj mi opiniis, ke la posedanto mortis.“**

527. Ĉe tribunalo: „Mi falis en tiun vitrinon ne tial, ĉar mi estis ebriiĝinta, sed post vangofrapo de iu fraŭlino, al kiu mi maldece ekkriadis.“

**528. Arestito, kondamnita por dek jaroj, forkuris kaj haltis hejme. Lia edzino ektimis: „Dio mia, ĉu estas jam la jaro 2019?“**

529. Kiom estas 2 plus 2?
Inĝeniero: „Tio estas precize 4,0000000.“
Ekonomiisto : „Tio estas io inter 3 kaj 4, sed mi ne certas.“
Juristo: „Kiom vi deziras, ke tio estu?“

**530. „Oni ŝtelis vian aŭton kaj vi eĉ ridas pri tio?“**
**„Jes ja, certe ke mi ridas, en ĝi ja estis ankaŭ mia bopatrino!“**

531. Ĉe tribunalo: „Ke li aperis nokte ĉe mi en dormejo, tio ne surprizis min. Strange estis, ke li alveturis tien per traktoro.“

**532. Juĝisto: „Vi estas liberigita pro manko de pruvaĵoj, ke vi ŝtelis oran horloĝon.“**
**Akuzito: „Do, ĉu mi povas nun ĝin laŭleĝe lasi al mi?“**

533. Advokato: „Kiun motivon por eksedziĝo vi havas?“
„La edzo telefonis al mi, ke li foriras kun vicdirektoro deĵorvojaĝe kaj la vicdirektoro estis ĉe mi.“

**534. Ĉe eksedziĝa tribunalo: „Kiel vi volas pruvi, ke la edzo estas al vi malfidela?“**
**„Mi konstatis, ke eĉ la lasta infano ne estas lia.“**

535. Defendas sin akuzito: „Sinjoro juĝisto, trifoje dum lasta tempo mi trovis fremdan viron en ŝranko.“
„Jes, sed vi ne kondutis konvene.“
„Kaj ĉu vi ne kolerus, se vi nenie povus pendigi vian veston?“

**536. „Hodiaŭ matene mi aĉetis ĉe vi pafilon. Ĉu eblus ĝin redoni?“**
**„Ĉu ĝi ne funkcias?“**
**„Mi ne scias, sed antaŭ momento mian edzon koliziis aŭto.“**

537. Telefonas al policejo tremanta voĉo: „Alvenu tuj en gastejon Nigra Kato. Oni ĉi tie mortigis kuiriston.“
Policisto: „Dio mia, kion tiel teruran li povis kuiri?“

**538. Ĉe tribunalo: „Akuzitino, kiel eblas, ke via edzo, kiu malfacile iradas kun helpo de bastonoj, povis tiel bati vin?“**
**„Antaŭe tiujn bastonojn li ne bezonis.“**

539. Ĉe tribunalo: „Mia edzo konsideras min esti hundo.“
„Ĉu li batas vin?“
„Ne, li deziras, ke mi estu al li fidela.“

**540. Sinjorino al policisto: „Oni ŝtelis mian veturilon.“**
**„Kaj ĉu vi vidis ŝtelistojn?“**
**„Ne, sed mi notis la numeron de la aŭto.“**

541. „Ĉu vi ne timas, dum la prirabado de la trezorejoj?“ demandas juristo la ŝteliston.
„Certe jes, mi ĉiam timas, ĉu ĝi ne estos malplena!“

**542. Tribunala proceso en Gronlando. Juĝisto demandas akuziton: „Diru al ni, kion vi faris nokte de la 14-a de novembro ĝis la 12-a de februaro?“**

543. Ĵurnalisto dum vizito de prizono demandas al unu krimulo:
„Kaj pro kio vi estas ĉi tie?“
„Ĉar oni ne volas ellasi min!“

**544. Akuzito ĉe tribunalo, kontraŭ atendo, estas liberigita.**
**Li komencas lamenti: „Kion mi nun faru? Mian loĝejon mi jam luis.“**

545. „Akuzito, ĉu vi scias, kio estis en tiu trezoreto, kiun vi ŝtelis en oficejo?“
„Ne, sinjoro juĝisto. Mi volis malfermi ĝin dum mia naskiĝtago.“

**546. Ĉe tribunalo: „Akuzitino, vi diris al ni falsan aĝon.“**
**„Tio ne estas falsa, tio estas nur iomete el pasinteco.“**

547. Juĝisto: „Vi eniris kun celita armilo en bankan halon. Kaj kio sekvis?“
Akuzito: „Mi ekkriis: ‚Kiu konsentas, ke mi prenu monon, levu manon.‘ Ĉiuj levis ilin kaj mi nur plenumis ilian unuaniman deziron.“

**548. Ekzistas du specoj de punoj: laŭ kulpoj kaj laŭ meritoj.**

# Kuracistoj kaj pacientoj

549. Flegistino en malsanuleja ĉambro: „Sinjoro, vekiĝu! Doktoro ordonis, ke mi donu al vi dormopilolojn!“

**550. Sonorigas ĉe doktoro skeletulo. Malfermas flegistino kaj diras: „Ho, vi venas tro frue!“**

551. „Kuracisto diris al mi, ke mi havas altan sangopremon.“
„Kaj ĉu vi havas ankaŭ kapturniĝon?“
„Tion li ne diris al mi.“

**552. Pacientino: „Sinjoro doktoro, mi neniel povas ekdormi. Kion vi konsilas al mi ?“**
**„Trinku konjakon.“**
**„Kaj ĉu mi ekdormos post tio?“**
**„Ne, sed pli bone pasigos tempon.“**

553. „Sinjoro doktoro, kion vi faras, kiam vi havas neniujn pacientojn?“
„Mi murdas la tempon.“

**554. Kuracisto, pasia ĉasisto, revenis el arbaro hejmen kaj lia edzino demandas: „Kiel vi sukcesis?“**
**„Unu leporo kaj tri novaj pacientoj.“**

555. Post operacio vekiĝas paciento el narkota stato kaj aŭdas, kiel kurcisto laŭdas: „Operacio sukcesis, sangpremo kaj pulso estas nomalaj.“
Paciento: „Tio ĝojigas min, ke mi povas morti tiel sana.“

**556. „Petro ankoraŭ longe restos en la malsanulejo.“**
**„Ĉu lia malsano estas tiom grava?“**
**„Fakte ne, sed mi vidis la flegistinon, kiu deĵoras tie nokte.“**

557. Haŭtkuracisto: „Fraŭlino, ĉi tie helpos nur razado kaj tiuj ruĝaj makuloj malaperos.“
Fraŭlino ektimante: „Tio estas terura, ĉu mi devas razi min?“
„Vi ne, sed via amanto devas razi sin.“

**558. Kuracisto: „Kiam vi pagos al mi por la kuracado?“**
**Paciento: „Fakturon sendu al mia patro.“**
**La kuracisto: „Kial al la patro?“**
**La paciento: „Vi ja diris, ke mia malsano estas hereda.“**

559. Kuracisto miras: „Kial vi tiom dikiĝis?“
Pacientino: „Ĉiam, post kiam ni kverelas, edzo aĉetas al mi grandan ĉokoladon.“

**560. Kuracisto: „Antaŭ ĉio vi devas ĉesi trinki alkoholaĵojn kaj ne fumi.“**
**Paciento suspekte: „Ĉu ĉi tie estis antaŭ mi mia edzino?“**

561. En diagnozejon enkuris kvarpiede paciento kaj mordis seĝpiedon. Kuracisto karesis lin surkape kaj diris: „Ĉi tie estas okulsekcio. En nervosekcion vi devas iri simuli unu etaĝon pli supren!“

**562. Usona paciento diras al sia kuracisto:**
**„Diru al mi puran veron, sinjoro doktoro. Mi estas preparita je ĉio.“**
**„Do bone. Mil tricent dolarojn!“**

563. Psikiatro kuracis junan sinjorinon kontraŭ ŝtelemo. Post iom da tempo li demandis ŝian edzon: „Ĉu vi rimarkis ian pliboniĝon?“
„Jes, grandan. Nun ŝi alportas hejmen nur necesajn aĵojn.“

**564. En atendejo ĉe dentisto: „Kial vi metas vaton en orelojn?“**
**„Por ke mi ne aŭdu, kiam mi krios.“**

565. Koleras kuracisto: „Ĉu vi scias, ke mi donas konsultojn nur ĝis la kvina?“
Paciento: „Mi scias, sed tiu hundo, kiu mordis min je la kvina kaj tridek minutoj, ne sciis tion.“

**566. „Kial vi aĉetis tiun barometron?“**
**„Por kontroli, ĉu bone reagas mia reŭmo.“**

567. Demandas kuracisto pacienton: „Kiel vi dormas?
„En piĵamo, nudpiede kaj en mallumo.“

**568. Oni diras: „Salo super oro.“ Sed provu alporti al dentisto por denta kroneto anstataŭ oro dek dekagramojn da salo.**

569. Pacientino: „Mi suferas pro memparolo.“
Kuracisto: „Ne gravas, pro tio oni ne mortas.“
Pacientino: „Sed mi ne povas aŭskulti min plu.“

**570. Kuracisto: „Pro kio vi havas sur la kruroj tiujn kontuzaĵojn? Ĉu vi ludas futbalon?**
**Paciento: „Ne, kartoludojn.“**

571. Kuracisto demandas pacienton, gravan funkciulon: „Ĉu vi parolas dum dormo?“
„Ne, sed ofte mi vidas, ke kiam mi parolas, ekdormas aliaj.“

**572. Kuracisto demandas pli aĝan pacientinon: „Kion vi sentas, kiam mi premas ĉi tie?“**
**„Rememorojn de tiu tempo, kiam mi estis juna.“**

573. „Sinjoro doktoro, mia edzino estas jam du jarojn konvinkita, ke ŝi estas kokino.“
„Kaj tion vi diras al mi nur nun?“
„Ĉu vi scias, kia manko de ovoj estis pasintjare?“

**574. Demandas kuracisto: „Kion vi preferas rezigni – virinojn aŭ vinon?“**
**„Tio dependas de aĝo.“**

575. Kuracisto: „Juna sinjorino, mi diros al vi gajan novaĵon.“
La pacientino: „Fraŭlino.“
La kuracisto: „Tiuokaze mi diros al vi malgajan informon.“

**576. Ĉe psikiatro: „Sinjoro doktoro, deprenu de mi tiujn terurajn sonĝojn.“**
**Kuracisto: „Kaj pri kio vi sonĝas?“**
**„Ĉiu nokte pri la sama afero. Ke mi estas edziĝinta kaj ĉiam al mia edzino.“**

577. Kuracisto: „Ĉu helpis al via fileto tiuj piloloj?“
Juna patrino: „Tute jes, li ruligas ilin dum la tuta tago sur kapkuseno kaj ne ploras.“

**578. Paciento en hospitalo: „Flegistino, mi neniel povas ekdormi, ĉu vi havas ĉi tie iun pacientinon kun sama problemo?“**

579. „Sinjoro doktoro, ĉu mi kuŝu kelkajn tagojn en lito?“
„Certe ne, pli bone kelkajn noktojn.“

**580. Diras iu kuracisto: „Ankoraŭ mi ne renkontiĝis kun simulanto.“**
**La alia kuracisto: „Kiu estas via specialiĝo?“**
**„Dentisto.“**

581. Edzino de paciento demandas time kuraciston: „Sinjoro doktoro, kiel rezultis la operacio?“
„Bone, mi eĉ nek unufoje tranĉis min.“

**582. „Doktoro, mi havas impreson, ke ĉiuj malamas min.“**
**„Ĉiuj ne, nur tiuj, kiuj vin konas.“**

583. Kuracisto: „Vi havas akvon en genuo.“
„Sed kiel ĝi povis sukcesi veni tien, ja dum la tuta longa jaro mi ne trinkas akvon.“

**584. Kuracisto: „Kion? Kvin jarojn edziniĝinta kaj daŭre sen infanoj? Malvestiĝu!“**
**Pacientino honteme: „Ho ne, sinjoro doktoro, la unuan infanon mi dezirus havi kun mia edzo.“**

585. Kuracisto: „Vi devas rezigni kafon, fumadon, virinojn, alkoholon, kaj ĉion, kio kolerigas vin.
Paciento: „Plej multe kolerigas min viaj paroloj.“

**586. Kuracisto: „Vi devas manĝi multe da fiŝo, ili enhavas fosforon.“**
**Paciento: „Sed mi deziras saniĝi, ne lumi.“**

587. En aviadilo oni anoncas per interna komunikilo:
„Ĉu estas kuracisto inter pasaĝeroj?“
Unu viro stariĝas kaj iras en pilotejon. Post iom da tempo nova anonco:
„Ĉu estas inter pasaĝeroj piloto?“

**588. „Sinjoro doktoro, donu al mi iujn medikamentojn. Mi ne povas nokte dormi.“**
**„Kaj kie vi laboras?“**
**„Mi estas nokta gardisto.“**

589. Kuracisto: „Kiel vi sukcesas kun gimnastiko? Ĉu vi jam tuŝas dikfingron de la piedo?“
„Ĝis nun ne, sed mi jam komencas vidi ĝin.“

**590. Kuracisto: „Ĉu vi scias, ke profunda spirado bakteriojn tuj detruas?“**
**Paciento: „Sed kiel klarigi al la bakterioj, ke ili spiru profunde?“**

591. „Sinjoro doktoro, kiel mi povus dekutimiĝi fumi?“
„Provu maĉgumon.“
„Mi jam provis, sed maĉgumon oni ne povas ekbruligi.“

**592. Psikiatro: „Kiam unuafoje vi rimarkis, ke vi estas hundo?“**
**„Tio estis jam antaŭ longa tempo. Mi estis ankoraŭ malgranda hundido.“**

593. „Sinjoro doktoro, ĉu malsanige manĝi nur unufoje tage?“
„Kiam tio estas ekde mateno ĝis vespero, jes.“

**594. Kuracisto difinas sanon: „Tio estas, kiam ĉiutage doloras vin io alia.“**

595. Klientino en vestaĵvendejo: „Mi bezonas veston minimume je du numeroj pli grandan, por ke kuracisto kredu al mi, ke mi sekvas dieton.

**596. „Sinjoro doktoro, kion fari, kiam dormopiloloj ne efikos?**
**„Poste vi devos la tutan vesperon rigardi televidon.“**

597. En kurso de la unua helpo: „Laŭ kio vi ekkonas, ke iu dronas?“
„Laŭ tio, ke li banas sin vestite.“

**598. „Sinjoro doktoro, mi dankas al vi, ke vi kuracis mian megalomanion. Ekde tiu ĉi tempo mi estas ega, ideala, eĉ fenomena modelego de modesteco.“**

599. Kuracisto al pacientino: „Ĉi tie mi skribis al vi recepton.“
„Sinjoro doktoro, ĉu ankaŭ vi ŝatas kuiri?“

**600. „Mi alportas du novaĵojn. Unu bonan kaj unu malbonan. Ni havis por vi hepaton, sed iu forŝtelis ĝin el mia ŝranketo.“**

601. Paciento: „Lastatempe mi iel malfacile ekdormas, sinjoro doktoro, precipe ĉe televidilo.“

**602. „Mi ne scias, kion fari. Doktoro malpermesis al mi promeni, sidi, kuŝi. Genui mi ne povas, mi havas reŭmatismon.“**

603. Kuracisto: „Pri via diagnozo mi ne estas tute certa. Kaŭzo verŝajne estas en tro granda konsumo de alkoholaĵo.“
Paciento: „Ne gravas, mi venos, kiam vi el tiu ebrieco vekiĝos.“

**604. Kuracisto al pacientino: „Vi povas vesti vin. Sed mi diras al vi, ke vian sanon mi dezirus por mi kaj vian figuron por mia edzino.“**

605. Edzino de kuracisto al vizitanto: „Ĉu mia edzo jam montris al vi sian kolekton de ostoj, kiujn li dum Kristnasko eltiris el koloj de pacientoj?“

**606. Kuracisto perkutas malgrandan, dikan infanon kaj diras al la juna patrino:**
**„Via knabeto malmulte moviĝas.“**
**„Ĉu malmulte? Jam kvinfoje li elfalis el infanĉareto.“**

607. Paciento al kuracisto: „Sinjoro doktoro, mi estas abstinulo, nefumanto, impotentulo. Kaj nun mi estas scivolema, kion vi malpermesos al mi.“

**608. En banloko oni faris enketon pri temo: „Mia plej bona travivaĵo post resaniĝo.“ Venkis respondo: „La vojo hejmen.“**

609. Paciento en montara sanatorio: „Sinjoro doktoro, mi tre malbone spiras.“
„Ĉu ankaŭ ĉi tie? En tia belege pura aero?“
“Ja jes. Mi estas kutimiĝinta vidi, kion mi spiras.“

**610. Kuracisto en sanitara konsultejo: „Mi ne sentas min bone, flegistino. Sed mi ne scias, ĉu mi estas malsana aŭ hipoĥondro.“**

611. Kuracisto: „Kiel efikas tiuj pulvoroj, kiujn mi preskribis al vi por dormo?“
„Tre bone! La edzino post ili dormas tiel profunde, ke ŝi ne vekiĝas eĉ kiam mi revenas el drinkejo.“

**612. En sanitara konsultejo plenigas flegistino karton por pacientino: „Ĉu edziniĝinta?“**
**„Jes, duoble.“**
**„Ĉu vi havas infanojn?“**
**„Jes, ses. Du kun la unua edzo, du kun la dua kaj du mi mem sola.“**

613. Dentisto: „Vi ja scias, ke mi boras sendolore. Sed homoj alkutimiĝis ĉe dentisto krii.“

**614. „Sinjoro doktoro, mi sonĝas konstante pri futbalo.“**
**„Ĉu pri io alia, ekzemple pri virinoj, vi ne sonĝas?“**
**„Ne, oni povus dume enpafi golon.“**

615. Kuracisto al paciento, kiu en diagnozejo malvestas sin: „Banu vin pli ofte.“
„Mi banas min ĉiun duan tagon.“
„Do ŝanĝu jam la akvon!“

**616. En apoteko: „Vendu al mi arsenon. Tio estas por mia bopatrino.“**
**„Ĉu vi havas recepton?“**
**„Ne, sed ŝian foton.“**

617. Nove alvenantan animon en ĉielon oni demandas: „Ĉu kuracisto?“
„Jes.“
„Do iru en tiun pordon, kie estas surskibo LIVERANTOJ.“

**618. Juna anhelanta virino haltigas taksion: „En hospitalon!“**
**Ŝoforo rapidege ekas. Virino atentigas lin: „Vi ne devas hasti, mi estas tie flegistino.“**

619. Kuracisto: „Vi povas esti kontenta, vi havas feran sanon.“
Pacientino: „Do tial mi tiom pezas.“

**620. Kuracisto: „Kontraŭ tusado uzadu ĉi tiun medikamenton trifoje tage, kaj evitu malvarmajn trinkaĵojn.“**
**Paciento: „Kiomfoje tage mi evitu malvarmajn trinkaĵojn?“**

621. Paciento: „Sinjoro doktoro, antaŭ unu jaro vi konsils al mi, ke kontraŭ reŭmatismo mi evitu malseketecon.
„Ĉu tio helpis?“
„Jes, sed mi venis ĉi tien demandi, ĉu mi jam povas lavi min.“

**622. „Unu kuracisto rekomendis al mi, ke mi veturu kuraci min al maro kaj alia krucisto, ke mi multe promenu.“**
**„Do vi iru piede al maro.“**

623. Kuracisto demandas vunditon: „Ĉu aŭto?“
„Jes.“
„Ĉu vi veturis tro rapide?“
„Ne, mi iris tro malrapide.“

**624. „Kia estas diferenco inter la gripo kaj amo?“**
**„Gripo kuŝigas en liton unu homon, amo du.“**

625. Kuracisto: „Kiel vi fartas?“
Paciento: „Malbone, gustas al mi eĉ ne tio, kion vi malpermesis al mi.“

**626. „Tiu sklerozo estas terura afero. Kio okazis antaŭ dudek jaroj, mi memoras precize, kaj kion mi deziris diri al vi antaŭ dek minutoj, mi ne povas rememori.**
**„Ne gravas, vi diros tion al mi post dudek jaroj.“**

627. Paciento: „Ĉiuvespere mi renversiĝadas de flanko al flanko kaj ne povas ekdormi. Kion mi faru?“
Kuracisto: „Provu kuŝi trankvile.“

**628. Flegistino tuŝas atenteme pacienton kaj mallaŭte diras al li:**
**„Vekiĝu, ni nun opercios vin, do ni devas dormigi vin.“**

629. Paciento post operacio de cekumo: „Sinjoro doktoro, ĉu vi ne difektis mian voĉon?“
„Kia ideo! Kial vi opinias tion?“

„Mi estas ventroparolisto.“

**630. Flegistino flustras al kuracisto en diagnozejo: „Atentu tiun ĉi pacienton. Li estas vegetarano kaj pasintfoje li englutis ĉi tie kvin lignajn spatelojn.“**

631. Surskribo sur la pordo de amulanco:
„PACIENTOJ KUN LA INFLAMO KAJ ŜMIRMONO HAVAS PRIORITATON“

**632. „Sinjoro doktoro, nia apotekisto konsilis al mi...“ komencas nekuraĝe sinjoro N.**
**„Do! Unue vi interkonsiliĝas kun via apotekisto! Kaj kiun stultaĵon via sinjoro apotekisto konsilis al vi?“**
**„Ke mi iru al vi.“**

633. Ĉe dentisto: „Sinjoro doktoro, vi elŝiris ja malĝustan denton.“
„Jes, sed mi estas jam proksime.“

**634. Kuracisto: „Ĉu via filo daŭre tiom balbutas?“**
**Patrino de malgranda paciento: „Ne, nur kiam li parolas!“**

635. „Sinjoro doktoro, mia edzo opinias, ke li estas UFO.“
„Bone, do sendu lin al mi.“
„Jes, sed kiel li ĉi tie surteriĝos?“

**636. Kuracisto: „Sinjorino, via edzo bezonas trankvilon, ĉi tie estas dormigaj piloloj.“**
**„Kiam mi donu ilin al li?“**
**„Al li ne, uzu ilin vi mem.“**

637. Kuracisto: „Sinjoro, pli multe moviĝu!“
„Sed mi estas ja landa ĉampiono pri kurado por dek kilometroj!“
„Do vidu, se vi aldonos iomete, vi povos iĝi eĉ monda ĉampiono!“

**638. Inter amikinoj: „Nur unu homo kapablas kaŭzi al mi doloron!“**
**„Kiu estas tiu?“**
**„Mia dentisto.“**

639. Kuracisto: „Ĉi tiujn gutojn vi gutigu en la okulojn po unu trifoje tage.“
„Ĉu antaŭ aŭ post manĝo, sinjoro doktoro?“

**640. Viro eniras en apotekon: „Ĉu vi havas venenon kontraŭ ratoj?“**
**„Jes. Por kiom da personoj tio estu?**

# Lernantoj kaj studentoj

641. „Marteno, kial mankas al vi rezulto de „2 x 1“ en hejmtasko?“
„Ĉar patro havis en la oficejo fuŝitan kalkulilon.“

**642. Instruisto: „Kio estas civilizacio?“**
**Lernanto: „Tio estas, kiam ni, ekzemple, dezirante ekkoni veteron, anstataŭ rigardi el fenestro, ni ŝaltas radioaparaton.“**

643. Instruisto: „Kio estas insulo?“
Lernanto: „Ĝi estas peco de kontinento, kiu estas, krom unu flanko, ĉirkaŭita de akvo.“
„Ĉu vi intermiksas ĝin kun duoninsulo?“
„Ne, mi pensis tiun superan flankon.“

**644. Alkuris knabo al policisto: „Bonvolu iri rapide kun mi.“**
**Policisto: „Kio okazis?“**
**Knabo: „Nia instruisto malĝuste parkis aŭton.“**

645. Sidas du etaj lernantoj en lernejo kaj unu diras al la dua: „Ankoraŭ 54 jaroj kaj ni rajtos pensiiĝi.“

**646. Patro de familio plendas, ke la dekstra mano doloras lin. Lia amiko demandas: „Kial?“**
**„Mia filo devis skribi tricentoble – ‚mi devas skribi miajn taskojn sen fremda helpo‘ kaj mi devis tion tricentoble subskribi.“**

647. Gepatroj dezirus por siaj infanoj tiajn taskojn, kiujn ili mem kapablus solvi.

**648. Nuntempe lernantoj havu kelkajn patrojn. Por ĉiu lernofako po unu.**

649. En lernejo: „Kiel ni ekkonas aĝon de kokino?“
„Laŭ dentoj.“
„Ja kokinoj ne havas dentojn!“
„Sed ni havas.“

**650. Instruisto: „Por kio havas la homo okulojn?“**
**Lernantino: „Ke li povu per ili plori.“**

651. Instruistino: „Peĉjo, ĉu via patro ankoraŭ helpas al vi kun hejmtaskoj?“
„Ne plu, post tiu lasta kvino li perdis kuraĝon.“

**652. „Kion vi pensas, sinjoro profesoro, kiom mi aĝas?“**
**„Pardonu sinjorino, sed mi estas profesoro de muziko, ne de arkeologio.“**

653. En lernejo: „El kio konsistas arbo?“
„El radiko, trunko kaj krono.“
„Kaj el kio konsitas la krono?“
„El dekheleroj.“

**654. „Diru sinjoro profesoro, ĉu ankaŭ idiotoj estas homoj?“**
**„Kompreneble! Ili estas tute samaj homoj kiel ekzemple mi aŭ vi!“**

655. „Ĉu vi faris ekzamenojn por altlernejo?“
„Jes, tiu ekzameno estis tre facila kaj eĉ pia.“
„Kial pia?“
„Ĉe ĉiu mia respondo profesoro diris: ‚Dio mia!‘ “

**656. En lernejo: „Kiu besto estas la plej utila?“**
**„Bovino. El tiu eblas utiligi ĉion: lakton, viandon, felon, kornojn, hufojn kaj finfine eĉ nomon.“**

657. Instruisto: „Por kio necesas bovina felo?“
„Por ke bovino ne disfalu.“

**658. „Kiel finiĝis tiu ekzameno de historio de via filo, najbarino?“**
**„Malbone, sed li ne kulpas. Oni demandis lin aferojn, kiuj okazis antaŭ lia naskiĝo.“**

659. „Kion vi faris hodiaŭ en la lernejo?“
**„Dum leciono de kemio faris instruisto eksperimenton kun eksplodaĵo.“**
**„Kaj kion vi faros en la lernejo morgaŭ?“**
**„En kiu lernejo?“**

**660. Patrino al instruistino: „Ĉu vi povas klarigi al mi, kial povis mia filo ricevi kvinon el matematiko?“**
**„Jes, malpli bona noto ne ekzistas.“**

661. Filo post reveno el lernejo diras al la patro: „Mi ricevis kvinon el geografio, ĉar mi ne sciis, kie situas Afriko.“
La patro cerbumas kaj diras: „Afriko ne povas esti de ni malproksime. En nia fabriko laboras unu negro kaj li alveturadas bicikle.“

**662. „Hodiaŭ mi estis en lernejo laŭdita. Laŭdire mi skribas kiel kuracisto kun tridekjara praktiko.“**

663. „Diru Roberto, kiajn bestojn vi havas hejme?“
„Hundon, katon kaj frostitan kokidon.“

**664. Instruisto eniras en klason kaj ekvidas cigared-stumpon: „Kies estas ĉi tiu stumpo?“**
**„Via, sinjoro instruisto, vi ekvidis ĝin kiel la unua.“**

665. Johano estis unuafoje en lernejo, kiam revenis deklaris:
„Mi jam ne plu iros tien! Legi mi ne scipovas kaj paroli oni ne permesas al mi!“

**666. Instruisto: „Nomu al mi minimunme du dramojn de Ŝejkspiro.“**
**Lernanto: „Romeo kaj Julieta.“**

667. En lernejo: „Ĉi-vespere estos luneklipso. Al ĉiuj mi rekomendas observi ĝin. Komenco estos je la dudeka kaj tridek minutoj.“
„Je kiu televidprogramo?“

**668. Inter najbarinoj: „Nia knabo alportis hieraŭ el lernejo kvaron.“**
**„Ĉu li tiel malboniĝis?“**
**„Ne, li pliboniĝis.“**

669. Instruisto en lernejo: „Hodiaŭ vi skribos skribekzamenon. Mi esperas, ke neniun mi kaptos kaŝe skribante de kunsidanto.“
Frančjo al najbaro: „Ankaŭ mi esperas.“

**670. Patro: „Tro belajn notojn en via notlibro vi ne havas.“**
**„Sed tiujn ja skribas instruistino, ne mi!“**

671. Post duono de la unua leciono de naĝkurso unu el partoprenantoj foriras. Instruisto vokas al li: „La leciono ankoraŭ ne finiĝis.“
„Mi scias, sed mi ne plu kapablas trinki.“

**672. En la unua klaso: „Kio estas via patro?“**
**„Paciento.“**
**„Ne, mi deziris scii, kion li faras?“**
**„Li tusas kaj mungas.“**
**„Kaj kiam li ne estas malsana, ne tusas kaj ne mungas, kion li faras?“**
**„Li estas sana.“**

673. „Anna, kio pli proksimas: Ameriko aŭ Luno?“
„Luno, ĉar ĝin ni vidas, sed Amerikon ne.“

**674. Instruistino: „Hieraŭ mi sendis unu lernanton hejmen, ĉar li havis malpurajn manojn. Hodiaŭ venis ĉiuj malpuraj.“**

675. „Ĉu vi povas diri iun ekzemplon de proverbo: Ne ĉio estas oro, kio brilas?“
„Jes, via kalvaĵo.“

**676. En lernejo: „Kio estas pluralo de vorto bovo?“**
**„Brutaro.“**

677. En lernejo: „Kiam oni skribas majusklon?
„Kiam oni estas miopa.“

**678. En lernejo: „Kiu frukto havas ŝelon?“**
**„Ovo.“**

679. Instruisto: „Strigo estas mirinda birdo. Dum la tago ĝi vidas nenion, sed dum la nokto ĝi vidas kiel dum tago.“

**680. Instruisto: „Vi uzas en viaj respondoj tro multe da superfluaj vortoj. Miajn demandojn respondu koncize –jes- aŭ –ne-. Do: kio estas vapormaŝino?“**

681. Demandas avo knabeton de unua klaso: „Kial vi ne deziras viziti lernejon?“
„Kion mi faru tie, kiam mi scipovas nek legi, nek skribi.“

**682. En lernejo: Kio estas pluralo de la vorto vagono?“**
**„Trajno.“**

683. Suspiras Frančjo: „Mi dezirus vivi en epoko de Karolo la Kvara. Historio finiĝus sur la trideka paĝo.“

**684. En lernejo: „Kial akvo estas tiom grava?“**
**„Se ne ekzistus akvo, ni ne lernus naĝi kaj ni ĉiuj dronus.“**

685. En la unua klaso demandas instruisto, kio lernantoj deziras esti, kiam kreskos. Unu el lernantoj: „Mi deziras esti ĝirafo.“
„Kial?“
„Por ke la patro ne povu tiri miajn orelojn.“

**686. En lernejo: „Kiel nomiĝas homo, kiu travivas la tutan tagon en restoracio?"**
**„Restaŭristo."**

687. „Kial vi ne estis hieraŭ en la lernejo?"
„Mia fratino edziniĝis."
„Do venonte tion ne ripetu!"

**688. „Vi eĉ ne scias, kian ĝojon mi havas de tio, ke pro tiu kvino por hejmtasko mi ne ricevos punbatadon."**
**„Kial?"**
**„Ĉar la patro kalkulis ĝin."**

689. En lernejo: „Kio estas trompo?"
„Kiam vi ekzamenas min."
„Kiel eblas tio?"
„En lernolibro estas skribite: „Trompon faras tiu, kiu utiligas nesciadon de iu alia, por fari domaĝon al li."

**690. En lernejo oni skribis ekzamenon pri la temo: „Kiel vi travivis ĉi jarajn feriojn?" Plej rapide finis Franĉjo, kiu skribis: „Dankon, bone."**

691. Instruisto: „Franĉjo, vi ĉiam venas al lernejo malfrue. Ĉu vi povas agordi vian vekhorloĝon?"
„Mi faras tion, sed ĝi sonoras, kiam mi dormas."

**692. En lernejo: „Ĉu vi lernas hejme?"**
**„Jes."**
**„Kaj kiom longe?"**
**„Ĝis la patro ekdormas."**

693. Studento skribas hejmen: „Karaj gepatroj, sendu al mi purajn poŝtukojn, sed enpaku ilin tiel, ke ili ne makuliĝu de kolbasoj."

**694. Dancinstruisto al fraŭlino: „Mi instruos vin nun novan dancon. La unua figuro: deiru desur mia piedo."**

695. Instruisto: „Ĉu vi povas diri al mi, kion prezentas via desegnaĵo?"
„Kiel Franĉjo falis de sur arbo."
„Arbon mi vidas, forrompitan branĉon ankaŭ, sed Franĉjon ne."
„Tiun jam forveturigis ambulanco."

**696. Profesoro: „Kiuj viroj rimarkinde ŝanĝis historion de Francio?“**
**Studento: „Historiistoj.“**

697. Instruisto: „Kio okazas dum suneklipso?“
Lernanto: „Rigardas tion multe da homoj.“

**698. Inter amikoj: „Mia edzino lernas pianludi, mia filino lernas violonludi.“**
**„Kaj kion lernas vi?“**
**„Paciencon.“**

699. Instruisto: „Se vi ne havas violkoloron, kiamaniere vi atingos ĝin?“
Lernanto: „Mi pruntoprenos ĝin de mia samklasano.“

**700. Instruistino: „Kial vi ne subskribis vian skribekzamenon?“**
**Lernanto: „Ĉar vi diris al ni, sinjorino instruistino, ke anonimajn leterojn oni neniam legu.“**

701. Instruisto de kemio demandas: „En kio ni fluidigas grasojn?“
Lernanto: „En poto.“

**702. „Joĉjo, ja vi havas terure malbonajn notojn!“**
**„Sed mi ja ne kulpas paĉjo, ilin skribis instruistino!“**

703. Instruisto: „Kial ni ne elkliniĝu el fenestro de vagono dum vojaĝo?“
„Por ke ni ne difektu telegrafajn kolonojn.“

**704. Estinta studento renkontas sian profesoron kaj demandas: „Kion vi nun faras?“**
**„Mi verkas libron. Mi resumas rezultojn de mia trijara esplorado.“**
**„Kiel ĝi nomiĝas?“**
**„Influo de luno je ov-demetemo de kokinoj.“**
**„Interese. Al kiuj rezultoj vi venis?“**
**„Ke luno je tio havas neniun influon.“**

705. Muzikinstruistino admonas neatenteman lernanton: „Se vi ne ludos precize, mi diros al viaj gepatroj, ke vi havas talenton!“

**706. Instruistino: „Kio estas higieno?“**
**Lernanto: „Tio estas, se ni lavas nin pli ofte, ol ni devas.“**

707. En lernejo: „Ĉiuj ellernis poemon, nur vi ne. Pune vi lernos ĝin ĝis morgaŭ kvinfoje.

**708. „Kian formon havas Italio?“**
**„Ĝi havas formon de gumboto.“**
**„Kial de gumboto kaj ne de boto?“**
**„Ĉar ĉrikaŭ ĝi estas akvo.“**

709. En lernejo: „Ĉion vi faras malrapide. Ĉu vi entute kapablas fari ion rapide?“
„Memkompreneble. Mi rapide laciĝas.“

**710. Instruisto en la unua klaso: „Se vi formanĝus dudek prunojn kaj poste vi formanĝos denove dudek prunojn, kion vi havos?“**
**„Doloron de ventro.“**

*El lernejkajeroj:*

711. Ni havis hejme akvarion, fiŝetojn kaj virkaton. Restis nur virkato.

**712. Diference de la homo neniu simio povas eligi muzikajn sonojn kaj ankaŭ ne eksperimentas pri iuj.**

713. Homo manĝas tial, ke li satmanĝu, kaj ankaŭ tial, por ke al iu alia nenio restu.

**714. Patrino devas vidi ĉion, kion ŝi deziras aĉeti, kaj poste ŝi aĉetas ĉion, kion ŝi vidas.“**

715. Kiam mia frato estas laboronta, sentas sin malforte.

**716. Libera estas homo, al kiu mankas edzino.**

717. Taglumo estas pli bona ol la artefarita, ĉar ĝi estas senpaga.

**718. Amiko havas ŝvelan vangon, ne pro dento, sed pro mano.**

719. Mi jam scipovas ludi ĉion, krom dueto.

**720. Per sia kantado li intence malhelpadis lecionon pri kantado.**

721. Li regule venadas al la lernejo neregule.

**722. Franĉjo ellernis naĝi tiel rapide, ke apenaŭ li komencis, jam devis fini.**

723. En la arbaro ni trovis multe da nemanĝeblaj fungoj, do ni lasis ilin tie al bestoj kaj arbar-gardisto.

**724. Li ne skribas kion mi diras, sed nur tion, kion bezonas.**

725. Kemio estas unusola lernofako, kie estas espero por detruo de lernejo.

**726. Senfino estas eble kiel leciono de matematiko. Ĝi ankaŭ ne havas finon.**

727. „Patrino ne permesas al mi porti orajn aĵojn. Ĉenetojn kaj orelringojn ŝi perdas dume mem."

**728. Maĉado faciligas englutadon de nutraĵo kaj de malfacilaj vortoj.**

729. Signifo de burgoj komencis dekadenci per evoluo de pafarmiloj kaj perfiduloj.

**730. Armeo estas ĉio, kio iras kaj veturas en verda koloro.**

731. Dum leciono li kondutas kiel dum paŭzo. Dum paŭzo li kondutas kiel dum leciono.

**732. Dum lecionoj de historio li principe diradas malĝustajn datojn.**

# Lordoj

733. Lord Wawerly estas tiel granda snobego, ke li veturas en alia aŭto ol lia ŝoforo.

**734. Ŝipo ekas droni kaj kapitano komandas: „Ĉiuj en savboatojn!
Lordo Waweley elmetis pipon el la buŝo kaj demandas: „Kaj kiu estas destinita por fumantoj?“**

735. Lordo: „James, kie mi havas la ĉapelon?“
„Sur la kapo, sinjoro.“
„Dankon, tio sufiĉas, ĉi-foje mi jam trovos ĝin mem.“

**736. Fanfaronas lordo Wawerley: „Imagu, kiel mia edzino bone zorgas pri siaj aĵoj. Hieraŭ mi hazarde malfermis ŝian ŝrankon kaj vidis tie ulon, kiu gardis ŝiajn vestojn.“**

737. Venis servanto al lordo: „Sinjoro, mi permesas al mi sciigi vin, ke la sinjorino forkuris kun ŝoforo.
La lordo: „Ne gravas. Mi deziris ja maldungi lin.“

**738. Lordo Wawerley rekomendis serviston al sia amiko. Post iom da tempo li demandas, kiel estas la amiko kontenta.
„Ĝis nun mi ne vidis lin en sobra stato.“
„Ĉu li estas daŭre ebria?!
„Li ne, sed mi jes.“**

739. Lordo al servisto: „Ĉu havas televidilo pordeton?“
„Ne, sinjoro.“
„Tiuokaze mi dum la tuta vespero rigardis en fornon.“

**740. Lordo Forsyte fanfaronas en sia klubo: „Ĉi nokte mi kreskigis kornojn al sep ĝentlemanoj.“
„Kiel tio eblas?“ diras klubanoj.
„Jes, mi travivis ĉi tiun nokton kun mia edzino.“**

# Najbaroj

741. Najbaro diras dum la vizito ĉe amiko:
„Vi havas vere belajn kaj kostajn aĵojn hejme. Kio kostis vin plej multe?“
„Mia edzino.

**742. Najbaro frapis ĉe najbarino kaj petis: „Ĉu vi povas ion fari por mi?“**
**„Tre volonte, najbaro.“**
**„Ĉesu kanti.“**

743. Inter najbarinoj: „Tiu N. el teretaĝo ne havas la kapon en ordo.“
„Kial?“
„Imagu, kiam ni renkontiĝas, ĉiam li bonkondute salutas min, en tramo liberigas al mi sidlokon, kaj hieraŭ li portis mian plenan mansakon ĝis mia pordo.“

**744. „Ĉu estas vero, ke vi vangofrapis najbaron?“**
**„Ne, kaj se tiajn kalumniojn li disvastigados, li estos vangofrapita ankoraŭ unu foje.“**

745. „Ĉu vi scias, ke via najbaro diskonigas pri vi terurajn mensogojn?“
„Ne gravas, malpli bone estus, se li disvastigus veron.“

**746. „Najbaro, malfermu la pordon!“**
**„Kaj se mi ne malfermos?“**
**„Ja mi ne povos realigi mian intencon.“**
**„Kiun intencon?“**
**„Vangofrapi vin.“**

747. „Najbaro, helpu rapide, edzo pendas en lifto inter etaĝoj.“
„Ĉu li ne povis pendiĝi, kiel honesta homo, hejme?“

**748. Najbaro frapas sur muron: „Kion vi tie faras?“**
**„Mi violonludas.“**
**„Tio estas io alia, mi opiniis, ke ĉe vi tiel terure knaras tablo!“**

749. „Najbaro, ĉu vi forgesis, ke mi pruntis al vi antaŭ unu jaro mil kronojn?“
„Kiel mi povus! Do tio estas mia plej bela rememoro!“

**750. Inter najbarinoj: „Kial vi tiel rigardas mian tolaĵon? Ĉu la vian vi ne pendigas ekstere?“**
**„Mi pendigas, sed antaŭe mi lavas ĝin.“**

751. Edzo al sia edzino:
„Ĵus mi invitis najbarojn. Kuiru iun bonan por vespermanĝo"
„Ĉu eble mi prefere pretigu ion, por ke ili plejeble frue foriru?"

**752. „Interesus min, kion faras najbaroj, kiam ili ne rigardas televidon."**
**„Verŝajne ili legas televidan gazeton."**

753. „Kial vi estas tiel malgaja, najbaro?"
„Do mi havas kvin filinojn sed nek unu bofilon."
„Ne gravas, mi havas unu filinon kaj jam la kvinan bofilon."

**754. „Kiam mi hieraŭ pianludis, najbaro frakasis al mi per ŝtono fenestron."**
**„Kia senpripensemo! Tiam li aŭdos vin eĉ pli bone."**

755. Inter najbarinoj: „Mia edzo hejme eĉ fingron ne movigas."
„La mia movigas ĝin, kiam li montras, kion mi faru."

**756. „Sinjorino Nováková, ĉu estas via edzo hejme?"**
**„Jes, sinjoro najbaro."**
**„Do mi venos alifoje."**

757. „De kio via najbaro tiel terure dikiĝis?"
„De legomoj."
„Ĉu tiom da ili li manĝas?"
„Ne, li vendas ilin."

**758. Sinjoro N. sonorigas ĉe najbaroj: „Ĉu mi povas rigardi ĉe vi televidon? Ĝuste komenciĝas futbala matĉo kaj ĉe ni brulas."**

759. Inter najbarinoj: „Imagu, mia edzo hieraŭ vespere rompis al si la manon en du lokoj."
„Do al tiuj lokoj mi ne plu lasus lin iri."

**760. Ĉe pordo de unu loĝejo sonorigas du fortaj viroj: „Ni venis por forporti de ĉi tie fortepianon."**
**„Sed ni ne venigis vin."**
**„Vi ne, sed viaj najbaroj jes."**

761. „Najbaroj invitis nin en ilian kabanon. Ĉu ni iros?
„Memkompreneble. Ĉu vi scias, kiel ili ĝojus, se ni ne venus?"

# Nigra humuro

**762. Savinto: „Kial vi volis pendiĝi?“**
**„Mi sentis min terure malĝoje.“**
**„Ĉu vi opinias, ke surŝnure vi sentos vin pli ĝoje?!**

763. „Kiel longe vi eltenus esti sub akvo?“
„Ĝis tiu tempo, kiam oni trovus min.“

**764. En zoologia ĝardeno kuŝas en unu kaĝo kune lupo kaj ŝafido. Iu vizitanto demandas mirigite: „Kiel vi tion atingis – lupo kaj ŝafido en unu kaĝo?“**
**„Simple. Ŝafidon ni donas trifoje tage freŝan.“**

765. Knabeto demandas avinjon:
„Avinjo, kien vi iras?
„En tombejon, fileto.“
„Kaj biciklon kiu alportos reen?“

**766. „Kiel vi fartas, amiko?“**
**„Tre bone. Mia edzino estas anĝelo.“**
**„Feliĉulo! La mia ankoraŭ vivas.“**

767. Viro kuŝas sur mortlito, li kalkulas jam tempon, kiu ankoraŭ restas al li kaj subite eksentas logan odoron de siaj ŝatataj kukoj. Li rekolektis lastajn fortojn, alrampas en kuirejon kaj manatingas unu kukon. Tiam alkuras edzino, batas lian manon kaj krias: „Lasu ĝin, ĝi estas por entombigo!“

**768. Memmortigulo saltas el deka etaĝo. Li elsaltas kaj kalkulas etaĝojn:**
**„10, 9, 8, 7, 6, 5, 6, 5, 6, 5... stultaj ŝelkoj! “**

769. Venas blindulo en vendejon, li prenas sian gvidhundon kaj ekturnas ĝin super kapo.
Vendistino: „Dio mia, kion vi faras?“
Blindulo: „Mi nur trarigardas, kion vi havas ĉi tie.“

**770. Iras viro de entombigo kaj renkontas unu amikon. Amiko demandas: „De kie vi iras?“**
**„Mi entombigis bopatrinon.“**
**„Kaj kial vi havas tiom gratvunditan vizaĝon?“**
**„Nu, vi scias, ŝi defendis sin...“**

771. Renkontiĝas du doktoroj en tombejo: „Do, kolego, ĉu vi ankaŭ faras inventaradon?“

**772. Venas muntisto en malsanulejan ĉambron, kie estas ĉiuj pacientoj dependaj de spiratoroj. Post momento li diras al ili: „Profunde enspiru, mi iras ŝanĝi elektrajn sekurigilojn.“**

773. „Via rentgena foto montris, ke unu via vertebro estas rompita,“ diras doktoro al paciento. „Sed ne havu zorgojn, ni jam korektis tion per Photoshop.“

**774. Mortofalĉisto veturpetas. Unu ŝoforo haltas kaj demandas: „Do, kien?“**
**„Nur ĝis tiu vojkurboĝo!“**

775. Knabo vokas trans barilo najbarinon: „Sinjorino, ĉu vi povus alporti al mi mian sagon?“
„Kompreneble, kie ĝi estas?“
„En dorso de via kato.“

**776. „Mia orelo doloras min,“ plendas junulino sur benko en parko al junulo. Tiu kisas ŝian orelon kaj demandas: „Ĉu ĝi ankoraŭ doloras?“**
**„Ne plu!“**
**Post momento doloras ŝin kolo. Junulo kisas ĝin kaj demandas: „Ĉu ĝi doloras?“**
**„Ne plu!“**
**Sur apuda benko sidas maljunulo, li alvenos al la junulo kaj demandas: „Pardonu, ĉu vi kuracas ankaŭ hemoroidojn?“**

777. Flegistino: „Sinjoro doktoro, la simulanto el ĉambro 2 ĵus mortis.“
Doktoro: „Do tion li jam troigis!“

**778. Iras du maljunuloj survoje kaj subite preter ili veturas per motorbiciklo senkapa viro. Ili iras plu kaj subite preterveturas alia senkapa viro. Post kvina ripeto diras unu maljunulo al la dua: „Provu meti la falĉilon sur duan ŝultron.“**

779. „Kio estas maksimuma dikeco?“
„Kiam vi kuŝas sur plaĝo kaj Greenpeace ektiras vin en maron.“

**780. „Kiel nomiĝas homo, al kiu mankas maldekstra okulo, maldekstra orelo, maldekstra mano kaj maldekstra kruro?“**
**„All right.“**

781. „Ĉu vi scias, kio atendas ŝaktiston post morto?“
„Tri tagoj da libertempo kaj denove subteren.“

**782. Kuŝas bopatrino sur mortolito, rigardas tra fenestro kaj diras al sia bofilo:**
**„Vidu, Rudko, rigardu la belegan tagon ekstere kaj kiel bele brilas la suno. Homo eĉ ne emas morti.“**
**Bofilo alkuras al fenestro, surtiras kurtenon kaj diras: „Ne distriĝu panjo, koncentriĝu.“**

783. Avino falas el kvara etaĝo. Sube amasiĝas ĉirkaŭ ŝi multaj homoj. Venas ŝia nepo kaj demandas: „Avino, kio okazis?“
Avino: „Mi ne scias, mi ĵus alvenis.“

**784. Lastaj vortoj antaŭ morto:**
**1. Ĉi tie estas forta glacio, ni trairos.**
**2. Aha, vidu, kolubro!**
**3. Hundeto, alvenu al mi!**
**4. Ĉu mi povas manĝi ankoraŭ iomete da bonega fungosupo?**
**5. Vi - kaj mafiano? Mi ne kredas!**
**6. Iru ni bati lin, li estas ja sola.**
**7. Kaj nun fotografu min sur tiu alta roko.**
**8. Ne timu, ĝi ne estas ŝargita.**
**9. Karulino, ĉu vi ne volas ŝofori?**
**10. Strange, mi sentas gason, ŝaltu la lumon!**

# Restoracioj

785. Admonas estro kelneron: „Komprenu finfine, ke vi laboras en restoracia vagono kaj vi ne rajtas elĵetadi ebriulojn tra la pordo!“

**786. En restoracia vagono plendas pasaĝero: „Terure, jam 150 kilometrojn mi atendas stufaĵon.“**

787. Kelnero en restoracio al gastino: „Estimata sinjorino, ni havas ankaŭ limakojn.“
„Mi scias, hieraŭ unu priservadis min.“

**788. Kelnero: „Sinjoro, tiu ĉi tablo estas rezervita.“**
**Gasto trankvile: „Bone, forportu ĝin kaj alportu al mi la liberan.“**

789. Estro al kelnero: „Ĉu tiu duopo ĝis nun elektis nenion al si?“
Kelnero: „Ne, ŝi kalkulas kaloriojn kaj li monon.“

**790. Demandas kelnero gaston: „Ĉu tiu ĉi ĉapelo estas via?“**
**„Jes, kaj kie vi ĝin trovis?“**
**„Vi forgesis ĝin ĉi tie, kiam vi hieraŭ foriris sen pago.“**

791. „Kion bonan vi konsilus al mi, sinjoro kelnero?“
„Alian restoracion.“

**792. En restoracio: „Kelnero, tiu supo estas nemanĝebla.“**
**„Ĉu ĝi estas trosalita aŭ tropiprita?“**
**„Ne, mankas ĉi tie kulero.“**

793. Gastigantino demandas: „Ĝis kiam vi deziras resti?“
„Dum mi ne tedos vin.“
„Ĉu tiel mallonge?“

**794. Sinjorio Novák trovis en supo du harojn. Li diris al kelnero: „Eble trakombu supon antaŭ surtabligo?!“**

795. Oni demandas gastigantinon: „Kiu estas via plej ŝatata gasto?“
„Sinjoro Novák, ĉiam li pardonpetas, ke li ne povas veni.“

**796. Ulo venas en gastejon kaj demandas kelneron: „Ĉu ĉi tie estas jam iu el tiuj idiotoj?“**
**„Ne, sinjoro, vi estas la unua.“**

797. Gasto: „Kelnero, ĉu vi havas ankoraŭ hepaton?“
„Jes, sed ĉu vi kapablas imagi, kiel ĝi post tridek jaroj de servado en gastejo aspektas?“

**798. Gustumisto gustumas diversajn vinojn, kun certeco difinas specojn kaj vinjaron. Ĉe la lasta glaseto li ektiminte ekkrias: „Ja tio estas petrolo!“**
**„Sed kiu petroljaro?“**

799. „Pardonu, sed tiu ĉi tablo jam estas rezervita!“ – atentigas kelnerino gaston.
„Ne gravas, do forprenu ĝin kaj alportu alian!“

**800. „Kelnero, kial oni aŭdas tian bruon el tiu saloneto“**
**„Tie estas kongreso de abiturientoj. Sinjoroj asertas, ke post tridek jaroj, kaj sinjorinoj, ke post dudek jaroj.“**

801. „Kion vi faras ĉi tie antaŭ gastejo?“
„Gastejestro elĵetis min.“
„Kial?“
„Mi ĝenis lian edzinon.“
„Kion vi ankoraŭ atendas?“
„Ĉu li elĵetos ankaŭ ŝin.“

**802. Iras viro preter gastejo kaj vidas, ke el ĝi oni elĵetis homon, kiu tuj revenas reen, estas denove elĵetita kaj derizas eniri. La viro demandas lin, kial li daŭre revenas, kiam oni daŭre elĵetas lin. La homo diras. „Mi devas eniri, mi estas gastejestro.“**

803. „Kelnero! Ĉu tio ĉi estas eskalopo? Ja estas ridinde!“
„Tion mi volonte aŭdas. Kutime homoj nur sakras kaj malĝojas.“

**804. Demandas gasto kelneron: „Tiu sinjoro ĉe la tria tablo havas bandaĝitan tutan kapon. Ĉu okazis al li iu malfeliĉo?“**
**„Ne, li estas hindo.“**

805. Gastino en gastejo: „Per kio oni nutris tiun kokidon?“
Kelnero: „Mi ne scias, kial vi deziras scii tion?“
„Mi dezirus ankaŭ tiel bele malgrasiĝi.“

**806. En restoracio: „Ĉu vi mendos bifstekon, kiel kutime?“**
**„Jes.“**
**„Ĉu vi atendos, kiel kutime?“**
**„Jes, dentisto malpermesis al mi dum tri horoj maĉi.“**

807. „Kelnero, kiun vinon vi povas oferti al ni por deka datreveno de nia edziĝofesto?“
„Ĉu vi deziras festi aŭ forgesi?“

**808. Kelnero al gastoj: „Tiu konjako estas vere 50 jarojn aĝa.**
**La gasto: „Tute mi kredas al vi, sed se ĝi tiel malnova, kial daŭre tiom kosta?“**

809. Gasto: „Kelnero, kiom tiu kokido aĝas?“
La kelnero: „Kun kokido ni surtabligas terpomojn, rizon, sed neniam biografion.“

**810. Gasto post tagmanĝo: „Kial tiu gulaŝo nomiĝas „turka“?“**
**„Tiu hundo nomiĝis Sultano.“**

811. Kelnero al gasto: „Ĉu unu bieron plu?“
Gasto al sia edzino: „Kion vi opinias karulino, ĉu mi ankoraŭ soifa?“

**812. „Kiel gustis al vi en ĉina restoracio?“**
**„Tre bone, nur tiuj bastonetoj kuŝas al mi iel malkomforte en stomako.“**

813. Gasto ricevas post duonhoro kafon. Li gustumas ĝin kaj diras: „Kelnero, tiu kafo estas jam tre malvarma.“
„Kaj kion vi dezirus, ja vi mendis ĝin antaŭ duonhoro.“

**814. „Kelnero, en tiu supo naĝas muŝo.“**
**„Verŝajne ĝi kaŝis sin, kiam mi kaptis la kvin aliajn.“**

815. „Kelnero, mi manĝis unu porcion de truto, sed en fakturon vi metas prezon de tuta.“
„Tio estas ĉe ni kutimo, sinjoro.“
„Do mi feliĉas, ke mi ne manĝis bovan gulaŝon!“

**816. Gasto en restoracio plendas, ke li trovis en supo fadenon. Kelnero ĝojas: „Do ekzistas ankoraŭ en la mondo honestaj trovintoj.“**

817. En restoracio: „Kelnero, ĉu vi havas ankoraŭ ion por manĝi?“
„Bedaŭrinde ne plu.“
„Do alportu al mi almenaŭ bieron.“
„Bedaŭrinde, bieron ni servas nur al manĝajo.“

**818. Ulo en restoracio al kelnero: „Mi ĝojas, denove vidi vin. Ĉu vi jam finis strikon?“**
**„Kiun strikon?“**
**„Tiun, kiun vi komencis tuj post kiam mi mendis manĝon.“**

# Ŝoforoj

819. Sinjoro Novák nervoze promenas antaŭ domo. „Mi timas pri la edzino," li klarigas al najbaro.
„Kaj kio estas kun ŝi?"
„Nia aŭto"

**820. En vitrinon de vendejo kun rezervaj aŭto-eroj karambolis aŭto. Ŝoforo per trema voĉo demandas: „Sinjoro estro, ĉu vi jam havas bremsgarnojn?"**

821. Post karambolo ŝoforo vekiĝas el senkonscio kaj treme demandas: „Kie mi estas, ĉu en edeno?"
Lia edzino: „Tamen vi vidas, ke mi estas kun vi."

**822. Ŝoforo veturigas petveturistinon kaj subite la aŭtomobilo haltas. Ŝoforo diras: „Mi timas, ke mi ne havas plu benzinon."**
**Fraŭlino: „Ĉu tiel frue? Ankoraŭ ni ne estas en arbaro."**

823. Soldato – petveturanto haltigas aŭtomobilon kaj demandas ŝoforinon: „Ĉu vi deziras senpage soldatakompanon?"

**824. Policisto: „Sinjoro ŝoforo, kiel vi povis tiel ebria sidiĝi ĉe stirilo?"**
**Ŝoforo: „Tio estis malfacila, sed amikoj helpis al mi."**

825. Ŝoforo enveturis en kontraŭdirekton. Tuj haltigas lin policisto. La ŝoforo diras: „Verŝajne ion mi preterlasis. Mi vidas, ke ĉiuj aliaj jam revenas."

**826. Haltas veturilo de aŭtolernejo ĉe benzinpumpilo. Ŝoforino petas dudek litrojn da benzino. Bezinpumpisto diras: „Antaŭ ĉio haltigu motoron."**
**La ŝoforino: „Motoro estas haltigita, tiel tremas instruisto."**

827. „Mi aŭdis, ke en urbo aŭto surveturis fumtubiston."
„Tio estas terura, eĉ sur tegmento oni ne plu povas senti sin certa."

**828. „Kiom daŭras al vi vojaĝo al Prago, sinjoro Ikso?"**
**„Dependas. Kutime kvin horojn, sed se mi prenas petveturantinon, eĉ du noktojn."**

829. En aŭtoriparejo: Ĉu vi povas munti pli fortan kornon?"
„Sed ĉi tiu estas bona."
„Jes, sed ne funkcias miaj bremsoj."

**830. Aperis du viroj kun bandaĝitaj kapoj ĉe kuracisto. Tiu demandas, kio okazis al ili.**
**La unua: „Mi ne volis pruntedoni veturilon al mia edzino."**
**La dua: „Mi al mia edzino pruntedonis ĝin."**

831. Policisto haltigis veturilon kaj postulas de ŝoforo: Mi petas vian ŝoforateston."
La ŝoforo: „Kion vi kun tiuj konduklicencoj faras? Ĵus hieraŭ mi transdonis unu al vi."

**832. Veturas komencanto sur ŝoseo kaj aŭskultas trafik-informojn en radio. Subite li aŭdas: „Atentu, atentu, sur ŝoseo unu veturilo estas en kontraŭdirekto."**
**La ŝoforo miras: „Ĉu unu? Ĉiuj!"**

833. „Kiun vi veturigis hieraŭ en aŭto?" – demandas edzino.
„Direktoron kaj vicdirektoron."
„Kaj ekde kiam unu el ili portas mamzonon?!"

**834. Edzo al ŝoforino: „Ŝanĝu jam la rapidumon, ĉu vi ne aŭdas, kiel la motoro bruegas?"**
**„Ĉu tio estas la motoro? Mi opinis, ke ni surveturis hundon."**

835. „Mi havas malfeliĉon. Mi rapidas hejmen kaj ne povas funkciigi motoron."
„Do veturu per buso."
„Tio ne eblas, ĝi ne eniĝus en mian garaĝon."

**836. Policisto al novŝoforino: „Tiel frakasi veturilon! Kion vi faris?"**
**„Mi deziris deflankiĝi en flankan straton."**
**„Kaj ĉu estis tie iu baro?"**
**„Ne, tie estis neniu flanka strato."**

837. Sinjoro N. pruntis al sia edzino aŭton. Kiam ŝi longe ne revenis, li iris serĉi ŝin. Dumvoje li demandas najbaron. „Ĉu vi vidis mian edzinon?"
„Jes, apud la arbaro ŝi kolektas iun ferrubon."

**838. Diras viro en laborejo: „Hodiaŭ mia edzino savis vivojn al kelkaj piedirantoj."**
**„Kiel tio eblas?"**
**„Ŝi frakasis aŭton jam en la garaĝo."**

839. Ŝoforo al kunveturanto: „Bonvolu ekrigardi, ĉu funkcias la dekstra direktomontrilo."
Tiu kliniĝas kaj diras: „Ĝi funkcias...ĝi ne funkcias...ĝi funkcias...ĝi ne funkcias.

**840. Ŝoforanta virino vidas sur kolonoj ĉe ŝoseo elektromuntistojn kaj diras malŝate al sia edzo: „Malkuraĝuloj!"**

# Vojaĝoj kaj turismo

841. Vaganto esta homo, kiu nomiĝus turisto, se li havus monon.

**842. Koleras kanibalestro: „Kie estas tagmanĝo?“**
**Kuiristo: „Mi pardopetas, estro, mankas turistoj.“**

843. Iras du kanibaloj tra arbaro. Unu demandas: „Ĉu vi vidis mian edzinon?“
„Ne.“
„Ne mensogu! Kaj kion vi maĉas?“

**844. Edzo telefonas al la edzino: „Mi invitis al tagmanĝo esplorvojaĝiston, kiu vivis longtempe inter kanibaloj.“**
**„Ĉu vi pensas, ke kokido gustos al li?“**

845. Turisto al portisto: „Kiom da mono kostus forporto de miaj kofroj?“
„Tridek kronojn.“
„Tio estas tro multe.“
„Do lasu ilin ĉi tie kaj iu forportos ilin senpage.“

**846. Turisto en trajna stacidomo en vilaĝaĉo senespere serĉas horaron.**
**„Ni ne bezonas ĝin,“ diras la stacidomestro. „Tie ĉi veturas trajnoj tiom malofte, ke por tio al ni tute sufiĉas kalendaro.“**

847. Revizoro postulas en kupeo de pasaĝero veturbileton, sed tiu oponas: „Kiun veturbileton? Laŭ la horaro mi jam delonge estas hejme.“

**848. Klarigas gvidanto: „Tio estas ŝtonoj, kiujn ĉi tien alŝovis glacimontoj.“**
**Unu el turistoj: „Kaj kie estas nun la glacimontoj?“**

849. Ŝi sendis de libertempo telegramon: „Daŭre pluvas, mi ne povas eĉ eliri el hotelo.“
Respondo: „Tuj revenu! Ĉi tie pluvas pli malmultekoste.“

**850. Rapidanta turisto renkontas paŝtiston kaj demandas lin: „Ĉu mi trafos aŭtobuson en la urbon je la sepa?“**
**Paŝtisto: „Certe, kaj se vi renkontos mian virbovon, vi trafos tiun je la 6:30.“**

851. En Hamburgo demandas turisto mariston:
„Kie mi povus havigi al mi ion por drinki kaj iun virinon?“
La maristo: „Ĉu vi vidas tie tiun preĝejon? Do tie ne, sed ĉie aliloke jes.“

**852. Oni demandas vaganton: „Sur kio vi dormas en kabano?“**
**„Sur tablo.“**
**„Ĉu ne premas vin tio?“**
**„Ne, ĝi estas el mola ligno.“**

853. Laŭdas sinjorino Nováková: „Ĉi-jara libertempo ĉe la maro estis belega. Estis tie du virinoj, kiuj pezis pli multe ol mi.“

**854. „Via pasporto estas falsa. Sur la foto estas senhara viro, kaj vi havas harojn.“**
**„Pasporto ne, nur haroj estas falsaj.“**

855. Nia turisto staras antaŭ roma Koloseo kaj cerbumas: „Mi ĉiam diras, kiu ne havas sufiĉe da mono, ne komencu konstrui.“

**856. „Fraŭlino, se vi irus kun mi al la kabano, mi povus proponi al vi mian specialaĵon.“**
**„Kian?“**
**„Vodko kun sofo.“**

857. Grupeto da vagantoj vespermanĝis fungojn. Post tempeto demandas unu el ili: „Amikoj, ĉu vi estas certaj, ke ĉiuj-ĉi fungoj estas manĝeblaj?“
Plua trankviligas lin: „Tion ni ekkonos pli poste, kaj finfine, ni ĉiuj ja ne havos lokon en la tendo.“

**858. Esplorvojaĝisto rakontas pri sia restado inter kanibaloj. Unu el aŭskultantinoj: „Vi estis do konstante per unu piedo en tombo.“**
**„En tombo ne, sed en poto jes.“**

859. „Johano, ĉu vi scias, ke mia edzino jam ŝoforas?“
„Kaj ĉu ŝi ne timas?“
„Ŝi ne, sed tuta nia urbo jes.““

**860. En tramo: „Pardonu, en kiu stacio mi devas elvagoniĝi, se mi deziras iri al Vodičkova strato?“**
**„Tio estas facila, unu stacion antaŭ mi.“**

861. Turisto en Kaŭkazo demandas lokan loĝanton, kiom li aĝas.
Respondo: „120 jarojn.“
„Ĉu 120 jarojn? Certe dum tiu tempo vi vidis grandan parton de la mondo.“
„Ne. Mi havas tre severan patron kaj tiu forlasas min nenien.“

**862. „Se vi donos al mi monon por libertempo ĉe maro, mi pensos tie nur kaj nur pri vi.“ „Kaj ĉu vi ne povus pensi nur kaj nur pri tiu maro hejme?“**

863. Dum veturo al lago: „Ĉu vi ne opinias, ke ni vojeraris?“
„Ne, kial?“
„Ŝajnas al mi, ke ĉi tiun kuŝantan hundon ni trafis jam antaŭ unu horo.“

**864. En vojaĝ-oficejo: „Ekskurso estas plene okupita, sed mi povas vicigi vin kiel anstataŭanton.“**
**„Kaj kiel grandan esperon mi havas?“**
**„Grandan. Kiam ni anoncos prezojn, duono de interesiĝantoj nuligos sian mendon.“**

865. „Per tiu ĉi aŭtobuso mi veturas jam dek jarojn.“
„Ĉu vere? Kaj kie vi enaŭtobusiĝis?“

**866. Post libertempo: „Imagu, mi estis en montarhotelo, kie ĉambro kostas 1800 kronojn!“**
**„Kaj kiel longe vi estis tie?“**
**„Proksimume kvin minutojn.“**

867. Pordisto vekas gaston en hotelo: „Ĉu vi deziris frumatene veturi en Pragon?“
„Jes.“
„Do trankvile dormu. La trajno jam forveturis.“

**868. „En trajno rigardis min konduktoro, kvazaŭ mi ne havus veturbileton.“**
**„Kaj vi?“**
**„Mi rigardis lin, kvazaŭ mi havus ĝin.“**

869. Turisto: „Kie eblas bani sin?“
„Iru daŭre ĉi-direkte ĝis al la ponto kaj poste dekstren aŭ maldekstren.“

**870. En stacidomo: „Rapidtrajno al Brno veturas post dek minutoj. Sed preferu veturi per persona trajno, kiu alveturos post tri horoj.“**
**„Kial?“**
**„Tiu rapidtrajno ne haltas ĉi tie.“**

871. Pasaĝero en trajno al konduktoro: „Tio estas terura, ni malfruas jam du horojn.“
Konduktoro: „Ne timu, via veturbileto validas tri tagojn.

**872. Konsilo al singardaj turistoj: „Se vi vojaĝas en neevolulitan landon, ne trinku akvon, en evoluita lando klopodu ne spiri.“**

873. Turisto demandas maljunan virinon pri plej mallonga vojo al burgo.
„Tra ĉi tiu arbaro, poste trans marĉon kaj vi estas antaŭ la burgo.“
Turisto: „Ĉu trans marĉon, ĉu tio ne estas danĝera?“
„Certe ne, juna sinjoro. Mi sendis trans ĝin jam kelkajn turistojn kaj neniu venis plendi.“

**874. Konduktoro en trajno al vojaĝanto: „Sinjoro, vi devas aĉeti rapidtrajnan alpagon.**
**„Do veturu malpli rapide, mi ne hastas tiom.“**

875. Demandas esplorvojaĝisto en Afriko ĉe iu rivero indiĝenon: „Ĉu eblas ĉi tie bani sin? Ĉu kanibaloj ne atakos min?“
„Trankvile banu vin, kanibaloj tre timas krokodilojn.“

**876. „Paĉjo, kial mi ne povas daŭre stiri nian aŭton? Ja mi estas jam sufiĉe aĝa!“**
**„Vi jes, sed nia aŭto ne estas!“**

# Virinoj

877. „Ĉu vi aŭdis hieraŭ vespere la teruran bruon?“
„Ne.“
„Kaj kion vi faris?“
„Nenion, mia edzino ion rakontis al mi.“

**878. Virino en vendejo: „Mi bezonas iun donacon por mia edzo, sed ĝi estu malmultekosta kaj mi povu uzi ĝin.“**

879. Inter amikoj: „Post kiom da tempo vi sukcesis silentigi la edzinon?“
„Mi ne scias, mi estas edziĝinta nur 10 jarojn.“

**880. „Kara Denisa, pro vi mi irus eĉ ĝis la fino de la mondo.“**
**„Do feliĉan vojaĝon!“**

881. Kuracisto: „Mi gratulas al vi, vi estas graveda.“
„Kaj de kiu, sinjoro doktoro?“

**882. „Vi virinoj eĉ ne scias, por kio vi dankas al bestoj.“**
**„Por kio?“**
**„Vi havas peltmantelon el kastoro, kolumon el vulpo, mansaketon el krokodilo, ŝuojn el serpento kaj fine tiun azenon, kiu ĉion pagas.“**

883. Junan, ekskluzivan virinon antaŭ edziniĝo kun tre riĉa kaj tre maljuna viro demandas ŝia amikino: „Ĉu vi deziras travivi kun li la tutan vivon?“
„Jes, sed nur lian.“

**884. „Kiom da jaroj vi havas, fraŭlino?“**
**„Dudek kvin kaj kelkajn monatojn.“**
**„Kiom da monatoj?“**
**„Sesdek sep.“**

885. „Patro, ĉi tie en la libro mi legas: Edzino plorsingultis, taŭzis siajn harojn, brustbatis sin, kaj fine svenis. Kion signifas tio?“
„Veršajne ŝi deziris de sia edzo je Krisnasko pelton.“

**886. Parolado apud tombo: „...la mortinto lasis junan tridekjaran vidvinon...“**
**Inter plorsingultoj aŭdiĝas: „Dudeknaŭjaran.“**

887. Knabino invitas amikon: „Certe venu al ni posttagmeze. Ni havas novan hundon."
„Ĉu ĝi mordas?"
„Ĝuste tion mi volas ekscii."

**888. „Sinjoro Zam, ĉu vi opinias, ke kisoj povas damaĝi?"**
**„Kompreneble! ...se ilin sekvas geedziĝo."**

889. „Sinjorino Juna, vi estas unusola, kiu ne koleras pri ĉi-jaraj malvarmegaj frostoj."
„Jes, ĉar nia frostujo difektiĝis."

**890. „Kiam du faras la samon, tio ne estas la samo."**
**„Tio estas malnova vero. Kial vi diras tion?"**
**„Kiam lavas sin viro, li aspektas pli bone, kiam lavas sin virino, estas male."**

891. Inter pensiuloj: „Mia edzino havas jam sesdek jarojn kaj havas vangetojn kvazaŭ persikojn."
„Tio ja ne eblas."
„Ĉu vi iam vidis sesdekjarajn persikojn?"

**892. En la ĉielon venas nova animo. Ĉe pordego oni demandas ĝin: „Kiujn lastajn vortojn vi aŭdis?"**
**„Mian edzinon, kiam ŝi diris: ‚Kiam vi lasos min stiri, vi estos anĝelo.'"**

893. Sinjorino antaŭ vitrino: „Kia belega pelto! Ĝin mi dezirus havi!"
Ŝia edzo moroze: „Do naskiĝu kiel pantero!"

**894. Mi vendos grandan enciklopedion. Mia edzino konas ĉion kaj eĉ plej bone.**

895. „Kial vi disiĝis kun via nova amanto?"
„Mi petis lin diveni, kiom mi aĝas."
„Kaj?"
„Li divenis tuj per unua provo."

**896. „Dum libertempo mi interkonatiĝis kun bela kaj inteligenta knabino."**
**„Kiun el ili vi elektis?"**

897. Sur pordo de unu preĝejo de Parizo aperis surskribo:
„Se vi havas multe da pekoj, eniru."
Post iom da tagoj aperis sub la unua surskribo plua, skribita per ruĵo:
„Se vi havas neniun, telefonu al numero 875487532."

**898. „Ĉu estas via edzino ŝparema?“**
**„De tempo al tempo jes. Hieraŭ ŝi havis sur torto por sia kvardeka naskiĝtago nur dudek ses kandelojn.“**

899. Edzino: „Kial vi asertas al viaj amikoj, ke mi scipovas bone kuiri? Tio ne estas vero.“
„Sed tio estas unusola afero, kio estas je vi nevidebla.“

**900. Patro laŭdas la filinon al ŝia amanto: „Atentu, kiel bele ŝi ludas fortepianon, kaj same bone ŝi kuiras.“**
**La amanto: „Ne gravas, mi povas manĝi en restoracio.“**

901. Suspiras iu virino: „Ĉiuj viroj estas nuraj delogantoj.“
„Ĉiuj eble ne?“
„Do tiuj ne estas viroj.“

**902. Diras junulo al amiko: „Hieraŭ mi estis invitita al familio de mia karulino. Nun mi jam scias, kial ĉiuj antaŭ tagmanĝo preĝas.“**

903. „Kiel plaĉas al via edzino en la nova loĝejo?“
„Unue ŝi ne povis kutimiĝi, sed nuntempe estas ĉio bone. Ŝi jam kverelis kun ĉiuj najbarinoj.“

**904. Virinoj estas demonoj, kiuj tra pordego de paradizo lasas nin eniri en inferon.**

905. „Mia edzino scipovas pardoni,“ fanfaronas viro.
La alia: „Mia ankaŭ, sed estus bone, ke ŝi nur tiel ofte ne ripetu, kion ĉion ŝi pardonis al mi!“

**906. „Kial vi ne saltis por via edzino, kiam ŝi estis dronanta?“**
**„Mi ne sciis, ke ŝi dronas, ŝi kriis tute same kiel hejme.“**

907. „Ĉu vi ne plu deziras edziĝi kun tiu juna, bela instruistino?“
„Ne. Kiam mi venis malfrue al rendevuo, ŝi postulis de mi ekskuzilon subskribitan de gepatroj.“

**908. „Mia edzino asertas, ke estas tre sanige manĝi nekuiritan legomon.“**
**„Nu jes, la mia ankaŭ ne ŝatas kuiri.“**

909. Gvidanto al turistoj: „Kaj se sinjorinoj ĉesus paroli, vi aŭdus, kiel fortege ĉi tie muĝas akvofaloj.“

**910. „Tute mi ne bedaŭras monon, kiun mi donis por sanigo de la edzino.“**
**„Ĉu ŝi saniĝis?“**
**„Ŝi ne revenis.“**

911. La plej bona edzino estas tiu, kiu estas al sia edzo fidela kaj ĉe tio ŝi estas al li agrabla kvazaŭ ŝi trompus lin.

**912. „Ĉu vi konas iun, kiu kapablas fari el malnova ŝranko malgrandan ŝranketon por laboriloj?“**
**„Jes, mia edzino. Tiu kapablas noktomeze fari el geedza lito oratortableton.“**

913. Fraŭlino post iom da tempo de kantlernado:
„Ĉu mi jam povas kanti publike?“
„Jes, se tie kantos amaso da homoj samtempe, vi povas trankvile aliĝi.“

**914. Pli aĝa fraŭlino en kompanio: „Ĉu vi scias, kiom mi aĝas?“**
**Ĝentlemano: „Mi ne scias, sed vi kuraĝe toleras tion.“**

915. „Kion faras via edzino?“
**„Ŝi kantas.“**
**„Kaj via knabo?“**
**„Li ankaŭ kriegas.“**

**916. Inter amikoj: „Mia edzino pasintsemajne jubileis kvardekan naskiĝtagon.“**
**„La mia festas la kvardekjariĝon jam la kvinan jaron.“**

917. Edzino al la edzo: „Post kiam vi finos la kurson, ĉu vi skribos stenografie tiel rapide, kiel mi parolas?“
„Jes, sed ne tiel longe.“

**918. „Fraŭlino, kial vi rigardas min tiel, kvazaŭ vi havus liberan loĝejon?“**

919. „Kiel mi hodiaŭ, en la dua datreveno de nia konatiĝo, plej multe ĝojigus vin, karulo?“
„Per du horoj da silento.“

**920. „Ĉu havas via edzino iun kroman okupon?“**
**„Jes, ŝi serĉas klaĉojn en la tuta ludomo.“**

921. Koleras edzino: „Al naskiĝtago vi donacis al mi peltmantelon, al festotago denove peltmantelon kaj al Kristnasko ankaŭ peltmantelon. Ĉu vi havas nenian fantazion?!“

**922. „Karulino, kiel nomiĝas tiu manĝo, kiun mi ĵus manĝis?“**
**„Ĉu ĝi al vi tiom bongustis?“**
**„Ne, sed se oni demandus min en hospitalo...“**

923. „Sinjorino, kiom da infanoj vi havas?“
„Tri.“
„Kiel ili nomiĝas?“
„Franĉjo.“
„Ĉu ĉiuj?“
„Jes, Franĉjo Novák, Franĉjo Vondra kaj Franĉjo Dvořák.“

**924. Ĉu vi kapablas imagi virinon, al kiu viro rakontus dum mil kaj unu nokto fabelojn?**

925. „Ĉiam mi havigas en banloko ion novan. Pasintjare tio estis vesto, ĉi jare ĉi tie Peĉjo.“

**926. Kiam estas virinoj kune, ili klaĉas. Kiam estas viroj kune, ili informas sin.**

927. Kiam sidas sur sofo viro, li regeneras sin. Kiam sidas sur sofo virino, ŝi malzorgas la mastrumaĵon.

**928. Inter du maljunaj virinoj: „Mi malamas tiujn arogantajn knabinojn. Ili estas tiel abomene junaj!“**

929. Kiam sur strato falas graveda virino, ĉiuj bedaŭras infaneton, nur ŝi ŝtrumpojn.

**930. En sukeraĵejon venis juna virino: „Kiu deserto havas malplej multe da kalorioj?“**
**Vendistino: „Ĉi tiu.“**
**„Do enpaku al mi dek pecojn.“**

931. „Mi aĉetis al mi bonegajn ŝuojn.“
„Ĉu ili estas komfortaj?“
„Mi ne scias, mi ne sukcesis surmeti ilin.“

**932. Diras fraŭlino: „Ĉi matene mi sentis min tiel malbone, ke se mi ne estus veninta al frizistino, certe mi irus al kuracisto.“**

933. „Mi aŭdis, ke Manjo konfesis al sia fianĉo ĉiujn siajn amaventurojn.“
„Tio estas fantasta kuraĝo!“
„Ĉu kuraĝo? Tio ne, sed kia fantasta memoro!“

# Viroj

**934. Edzo ĉe fotisto: „Ĉi tie mi havas foton de via edzino.“**
**„Vi ŝajne fotis tion per centono de sekundo, ĉu?“**
**„Kial?“**
**„Ĉar ŝi havas fermitan buŝon.“**

935. Profetistino al kliento: „En proksima tempo vi havos gefianĉiĝon, sed iu virino malhelpos al vi.“
„Mia edzino, tiu miksiĝas en ĉion.“

**936. Galanta viro estas tiu, kiu neniam forgesas naskiĝtagojn de siaj amikinoj, sed ĉiam, kiomajn naskiĝtagojn ili havas.“**

937. „Mi vidis en iu filmo, kiel senvestiĝis apud fiŝlago kvin aktorinoj samtempe.“
„Tio estis maldeca ago de reĝisoro.“
„Jes, mi ne sciis, kiun unue mi rigardu.“

**938. Viro: „Sinjoro, vi nomis min idioto. Ĉu vi spritis aŭ diris tion serioze?“**
**„Tute serioze.“**
**„Bone tiukaze! Tiajn spritaĵojn mi ne toleras.“**

939. Diras direktoro al sia amiko: „Antaŭ nelonge mi venis hejmen iel enpensiĝinta kaj kiam mia edzino deziris novan vestaĵon, mi respondis: ‚Jes, karulino, sed unue ni finos tiun diktaĵon.‘ “

**940. „Marek, onidire vi geedziĝis. Ĉu tiu via edzio estas bela?“**
**„Nu, tio estas afero de gusto. Al mi ĝi ekzemple ne plaĉas.“**

941. Viro sur nudisma plaĝo: „Fraŭlino, ĉu mi povas ion fari por vi?“
„Jes, vestu vin!“

**942. „Karulino, ĉi nokte mi sonĝis, ke mi perdis vin en montaro dum terura neĝŝtormo.“**
**„Ho, kiel romantika! Kaj kiel vi trovis min?**
**„Kiu diras, ke mi serĉis vin?“**

943. „Preter mi povas iri amaso da belaj virinoj kaj mi tute ne emocias.“
„Ne fanfaronu.“
„Mi ne fanfaronas, mi plendas.“

**944. Plendas sinjoro Novák: „Estas terure, kiel homo ŝanĝiĝas dum jaroj. Iam, kiam mi logis koleginon, mi timis, ke ŝi rifuzos. Kaj nuntempe mi timas, ke ŝi povus jesi.“**

945. Novedzo: „Vespere mi ŝatas esti en familia medio.“
Malnova edzo: „Vi pravas. Ankaŭ al mi edzino vespere nenien permesas iri.“

**946. Viro fanfaronas inter amikoj: „Perfekte mi dresis la edzinon. Ĝuste je la dek dua devas esti tagmanĝo sur la tablo.“**
**„Kaj kiam vi malfruas?“**
**„Do mi estas sen tagmanĝo.“**

947. „Sinjoro Novák, vi estas modela homo. Vi donas al infanoj nur bonajn ekzemplojn.“
„Por malbonaj mi ne estas plu kapabla.“

**948. „Kion vi havas sur la frunto?“**
**„Temposignon.“**
**„???“**
**„Hieraŭ mi ne venis ĝustatempe hejmen.“**

949. Ideala viro estas galanta ankaŭ al sia propra edzino.

**950. Diris iu sinjorino: „Mia edzo malamas du aferojn: malordon kaj ordofaron.“**

951. „Patrino, kial oni diras, ke reĝo Salomono estis el ĉiuj la plej saĝa?“
„Ĉar li havis multe da edzinoj kaj tiuj konsiladis al li.“

**952. Laŭdas sin iu viro inter amikoj: „Plej bone estas esti edziĝinta. Ĉio estas ordigita, kuirita, lavita, gladita...**
**„Kaj ĉu ĉion-ĉi faras via edzino?“**
**„Ne, mi mem.“**

953. Edzo: „Viaj riproĉoj iras tra unu orelo internen kaj tra la dua eksteren.“
La edzino: „Ŝajne ja en via kapo ili ne povas je io teni sin.“

**954. Avino al la nepino: „Antaŭe viroj edziĝadis multe pli malfrue ol nun.“**
**La nepino: „Nuntempe ili edziĝas multe pli ofte.“**

955. „Tiu Novák havas eminentan edzinon.“
„Kial?“
„Kelkfoje mi vidis, ke ŝi helpis al li lavi kuirejan vazaron, gladi tolaĵon...“

**956. „Mi maljuniĝas.“**
**„Kial vi opinias tiel?“**
**„Antaŭe mi renkontis barojn per nazo, nunteme per ventro.“**

957. „Oni ne kredus, pro kio homoj iras al kuracistoj.“
„???“
„Novák iris antaŭtagmeze al kuracisto kaj revenis kun lavita veturilo.“

**958. Inter najbarinoj: „Mi trovis jam multe da purigaj rimedoj por planko, sed plej bona estas edzo.“**

959. „Karulino, ĉu vi scias, kiu diferenco estas inter taksio kaj tramo?“
„Ne.“
„Tre bone. Do ni veturos per tramo.“

**960. „Videblas, ke vi estas mezaĝa viro.“**
**„Kial?“**
**„De ĉiuj malfacilaĵoj vi kulpigas mankon da vitaminoj.“**

961. Viro venas en laborejon kaj fanfaronas: „Mi havas filon, li havas kvindek centimetrojn kaj kvar kilogramojn.“
Kolegoj demandas: „Kaj la edzino?“
„Ankaŭ ŝi havas filon.“

**962. Inter amikinoj: „Tiu mia edzo estas tiel sentema, ke kiam en teatro oni prezentas ion malgajan, li ploras.“**
**„La mia ploras jam dum aĉeto de biletoj!“**

963. „Kie estas via edzo?“
„Li restis hejme kun sia kvarpieda amiko.“
„Ĉu vi havas hundon?“
„Ne, sofon.“

**964. Plendas pli aĝa sinjoro en trajno: „Tiu nuntempa junularo estas tute ne edukita.“**
**Alia sinjoro: „Kial vi plendas, ja lasis vin sidiĝi juna fraŭlino.“**
**„Jes, sed mia edzino ankoraŭ staras.“**

965. „Kion vi pensas Jana, ĉu amas min Petro?“
„Certe ke li amas vin. Ja kial ĝuste vi devus esti escepto.“

**966. Inter amikinoj: „Tiu mia karulo havas en la kapo nur aŭton.“**
**„Estu kontenta. Almenaŭ vi havas malmultekostan garaĝon.“**

967. Amikoj babiladas en trinkejo:
„Nu, kion vi faris dum via vojaĝo al Londono?“
„Mi tre bone amuziĝis. Imagu, ĉiuvespere nova knabino: Margareth, Cinthya, Annelise, Robert ...“
„Robert ?!“
„Nu jes, Robert. Vi devus vidi, kia nebulego estas nokte en Londono!“

**968. Modo estas justa. Iam ĝi faras klaŭnojn ankaŭ el viroj.**

969. Viro levas la okulojn de gazeto: „Ĉu vi diris ion?“
„Jes, sed tio estis jam hieraŭ.“

**970. Plendas en laborejo iu viro: „Tio estas terura: lunde por intermanĝo panon kun graso, marde por intermanĝo panon kun graso, markrede tion saman kaj hodiaŭ denove pano kun graso.“**
**„Kial vi ne riproĉas tion al edzino?“**
**„Tio ne helpus, mi preparas la intermanĝojn al mi mem.“**

971. Filo al la patro: „Mi serĉas amaventurojn kaj belajn virinojn. Ne klopodu al mi malhelpi en tio, mi iros laŭ mia propra vojo!“
„Kiu malhelpus al vi en tio, prenu min kune!“

**972. „Paĉjo, paĉjo, kie troviĝas la piramidoj?“**
**„Demandu al panjo, hejmon ŝi mastrumas!“**

973. Du amikoj renkontiĝas. La unua plendas:
„Mi ĉiam kredis ke mia edzino estas al mi fidela“
„Kaj kial vi ŝanĝis opinion?“
„Translokiĝinte el Romo al Venecio, mi malkovris havi la saman poŝtiston!“

**974. Viro sen virino – ĉevalo sen brido.**

975. „Mi jam estas dekdu jarojn edziĝinta kaj mi daŭre estas enamiĝinta.“
„Kaj en kiun?“

**976. „Kio faras virojn esti pli belaj?“**
**„Mallumo.“**

977. Viro kompare kun aŭto:
0 - 20 jaroj: viro estas kiel FIAT - eta kaj lerta
20 - 30 jaroj: viro estas kiel PORSCHE - rapida kaj energia
30 - 40 jaroj: viro estas kiel MERCEDES - perfekta
40 - 50 jaroj: viro estas kiel ŠKODA - promesas pli ol kapablas plenumi
50 - 60 jaroj: viro estas kiel TRABANT - devas esti permane startita
pli ol 60 jaroj: oni devas ŝanĝi markon

**978. „Joĉjo, kion vi faras tiom longe en banejo?“**
**„Mi lavas miajn piedojn.“**
**„Tio estas jam trian fojon dum lasta duonjaro! Ĉu vi havas iun amatinon?“**

979. „En kiu gazeto ni povus trovi artikolon kun titolo ‚Virino elĵetis edzon tra fenestro‘?“
„En gazeto: Pli bela loĝado.“

**980. „Kio okazis al viro, kies IQ ĵus malaltiĝis je 60%?“**
**„Lia edzino mortis.“**

981. Venas viro en librovendejon kaj demandas:
„Ĉu vi havas libron Viro, reganto de virinoj?“
„Pardonu, sed sci-fi estas en dua etaĝo.“

**982. „Hieraŭ ni kverelis kun edzino, sed mi diris al tio la lastan vorton!“**
**„Nekredeble, kaj kion vi diris?“**
**„Do aĉetu tion...“**

983. Patro: „Kiam mi havis 20 jarojn, mi studis kaj ne kuradis post knabinoj!“
„Sed patro, tio estas alie...“
„Silentu! Kiu estas ĉi tie patro?!“
„Ambaŭ, patro, ambaŭ...“

**984. „Kial vi volas edziĝi kun tiu virino? Ĉe ŝi vi devos ĉesi fumi, drinki...“**
**„Mi scias, sed se mi ne edziĝus kun ŝi, mi devus ĉesi manĝi.“**

985. En vendejo estas viro kun krianta bebo: „Alberto, trankviliĝu, ĉio estos bona, nur paciencon.“
Vendistino: „Tio estas bonege, ke vi parolas kun via fileto kiel kun plenkreskulo. Tiel elkreskos el li pacienca, egalanima homo.“
Viro: „Sinjorino, vi eraras. Mi estas Alberto!“

**986. Kiam viro malfermas al virino pordon de aŭto?**
**1. Kiam li havas novan aŭton.**
**2. Kiam li havas novan virinon.**

987. Unue kreis Dio viron kaj poste li ricevis pli bonan ideon - krei ankaŭ virinon...

**988. Kelkaj veroj pri Chuck Norris:**

1. **Chuck Norris venkis konkurson kun stacionara biciklo.**
2. **Kiam Chuck Norris malfruiĝas, tempo prefere malrapidiĝu.**
3. **Chuck Norris kapablas fari truon en akvon.**
4. **Chuck Norris kapablas aplaŭdi per unu mano.**
5. **Chuck Norris kaŭzas al cigaredo kanceron.**
6. **Chuck Norris dormas kun kuseno sub pistolo.**
7. **Chuck Norris kapablas startigi aŭton sen motoro.**
8. **Chuck Norris kapablas nul-onigi.**
9. **Tempo atendas neniun. Se li ne estas Chuck Norris.**
10. **Kiam Dio diris „estu lumo“, Chuck Norris atendis, ĝis li petos.**

# Diversaj

989. Amiko al amiko:
„Vi eminente kuiras. Ĉu tio estas via hobio?“
„Ne, instinkto de memkonservado.“

**990. Maljuna indiĝeno estis malgaja. Oni demandis lian edzinon kaj ŝi respondis: „Li aĉetis novan bumerangon kaj nun li ne povas forĵeti la malnovan.“**

991. Laŭdas vizitanto: „Vi havas vere belan librokolekton. Sed mi nenie vidas pentraĵon. Ĉu vi ne ŝatas pentroarton.?“
„Jes, sed kiu pruntus nuntempe pentraĵon?“

**992. Sinjoro Novák volas aĉeti dometon, sed al li ne plaĉas multe da fabrikfumtuboj en ĉirkaŭaĵo. Posedanto de dometo trankviligas lin: „Dum labortagoj ĉi tie estas tiom da fumo, ke fumotuboj ne estas videblaj.“**

993. Gvidanto en muzeo: „Kaj ĉi tio estas tibiostoj de Kristofo Kolumbo.“
Vizitantino: „Tiel malgrandaj! Ne eblas, mi aŭdis, ke Kolumbo estis belkreska viro.“
Gvidanto: „Jes, sed ili estas ankoraŭ el lia infanaĝo.“

**994. Teatro-ŝatanto rakontas al amiko siajn novajn travivaĵojn:**
**„Tiu aktorino tiel terure ludis Desdemonon, ke la tuta publiko entuziasme aplaŭdis, kiam Otelo mortstrangolis ŝin.“**

995. Indiana virino al gentestro: „Donu al mi aglan plumon, alikaze mi diros al aliaj virinoj, ke vi donis ĝin al mi.“

**996. Filo: „Patro, kial indianoj ĉe interkonsento fumis pipon?“**
**Patro: „Ĉar post du fumenspiroj ili ne plu havis forton militi**.“

997. „Mi aŭdis, ke via edzo tre bone parolas Esperanton.“
„Jes, kvazaŭ li naskiĝus tie.“

**998. Ekĝemas sinjorino: „Kaj jen, mi proksimiĝas jam malrapide al mia kvardekjaro.“**
**Ŝia konatino: „Kaj el kiu flanko?“**

999. Patro riparas akvovarmigan provizujon en kelo kaj vokas al la filo supren:
„Ĉu jam fluas varma akvo?“
„Jes, ĝi fluas, sed ĝi estas malvarma.“

**1000. Babilas du esperantistoj: „Hieraŭ venis al mi du atestantoj de Jehovo.“**
**„Ĉu ili sukcesis konvinki vin?“**
**„Ne, sed mi esperantigis ilin.“**

1001. „Ekde kiu tempo vi portas okulvitrojn?“
„Ekde tiam, kiam mi volis mortigi muŝon kaj ĝi estis rustiĝinta najlo.“

**1002. Skoto venis al bakejo: „Mi petas unu bulkon, sed paku ĝin en hodiaŭan gazeton.“**

1003. En nova urboparto: „Kiam ĉi tie oni laste purigis stratojn?“
„Mi ne scias, mi loĝas ĉi tie ne pli longe ol kvin jarojn.“

**1004. „Tre interesa afero, kial la homoj sur fotoj de via laborejo ridas tiel senĝene?“**
**„Vi ne mirus, se konus, kiel aspektas nia fotografisto.“**

1005. Sur plaĝo anoncas amplifiko: „Ni petas sinjorinon en blua bankostumo kun ruĝaj punktetoj veni en vestŝanĝejon. Ŝi forgesis vesti sin per ĝi.“

**1006. Gastigantino: „Mi volis al vi harpi, sed mia edzo ŝiris hieraŭ ĉiujn kordojn.“**
**Unu el gastoj: „Ne gravas, nur harpu!“**

1007. Trejnisto de poloo-ludantoj: „Nu jes, ni malgajnis, sed neniu el niaj ludantoj dronis!“

**1008. Demandas fremdulo: „Ĉu ĉe vi ne estas senlaboruloj de temp´al tempo?“**
**„Ne, sed de temp´ al tempo nelaborantoj estas ĉi tie.“**

1009. Oni demandas meteorologon: „Ĉu vi povas diri al ni ion plezurigan?“
„Jes, en bufedo oni havas mandarinojn.“

**1010. Je la dua nokte sonoras telefono: „Ĉu tie estas numero 24 39?“**
**Dormema voĉo respondas: „Vi fripono, kiam vi almenaŭ unu ciferon divenos!“**

1011. „Vi havas en pluvombrelo truon.“
„Mi scias. Alikaze mi ne ekscius, ke ĉesis pluvi.“

**1012. Ekkoleris direktoro de arestejo: „Al tiu arestito el la sepa ĉambro pro puno al vespermanĝo donu du viando-tranĉajojn!“**
**„Kial?“**
**„Li estas severa vegetarano.“**

1013. Gvidanto en muzeo al unu el vizitantoj: „Vi eksidis en brakseĝon de Karolo la Kvara."
Laca vizitanto: „Ne gravas, kiam li venos, mi liberigos ĝin."

**1014. „Kie estas tiel longe la kolaŭdacia komisiono?"**
**„En lifto inter la sepa kaj la oka etaĝo."**

1015. Diras maljunulino: „Dum mia juneco, se infano similis al la patro – tio estis heredeco, kaj se li similis al najbaro – do tio estis influo de medio."

**1016. En kupeo junulo intense maĉas maĉgumon. Kontraŭ li sidanta maljunulino rimarkas lin kaj post iom da tempo diras: „Tio estas de vi tre bela, ke vi parolas al mi, sed mi estas tute surda."**

1017. En stacidomo adiaŭas patrino la filinon kaj diras: „Dum via libertempo amuziĝu bone kaj kondutu tiel, ke mi ne devu honti pro vi."
Filino: „Panjo, ĉu vi deziras, ke mi vere bone amuziĝu, aŭ ke vi ne devu honti pro mi?"

**1018. Renkontiĝas du amikoj: „Vi tute ne ŝanĝiĝas. Vi estas la sama kiel antaŭ cent jaroj. Kion vi faras?"**
**„Daŭre tion saman, kiel antaŭ cent jaroj."**

1019. Pro kio vi tiel multe ĝojas?"
„Hodiaŭ mi legis ankoraŭ malpli bonajn spritaĵojn, ol skribas mi."

**1020. „Ĉu vi konas tiun spritaĵon, kiel edzino krias, ke ŝi englutis kudrilon kaj la edzo diras al ŝi – ne kriu, mi alportos al vi alian?"**
**„Ne, tion mi ne konas, rakontu!"**

1021. Li fariĝis pesimisto. Li ekkonis sin mem.

**1022. „Franĉjo, jam fine akvumu tiun laktukan salaton."**
**„Ĉu vi frenezas? Ekstere pluvegas."**
**„Ne gravas, prenu pluvombrelon!"**

1023. Edzino demandis la edzon pri impresoj el renkontiĝo de eksaj samklasanoj.
La edzo: „Malnovaj vizaĝoj kaj novaj dentoj."

**1024. Petas pli maljuna sinjorino junulon, ke li konduku ŝin tra strato.**
**„Tre volonte. Ĉu vi loĝas tie?"**
**„Ne, mi havas tie parkitan motorciklon."**

1025. Avino iras en kelon kaj avo diras al ŝi: „Vi havas sklerozon, tial memoru, ke vi alportu du aĵojn: terpomojn kaj bieron. Du aĵojn!“
Post momento la avino revenas kaj portas ŝovelileton.
La avo: „Kie vi havas balaileton, ja mi diris al vi, ke vi alportu du aĵojn!“

**1026. Aktoro diras al juna najbarino: „Mi estas tute ne kapabla pri tekniko. Ĉu vi kredas, ke mi ne scias kiel estiĝas elektra kurento?“**
**„Tio estas simpla, oni turnas per konektilo.“**

1027. Instruisto riproĉas al malsukcesa lernanto:
„Bonvolu diri al mi, kial vi ne deziras lerni la anglan lingvon? Ja duono da la mondo posedas ĝin.“
„Kaj ĉu tio jam ne sufiĉas?“

**1028. Familio rigardas kur-konkurson en televido. Filino diras: „Mi opinias, ke la unua estos tiu kun ruĝa kaptuko.“**
**Ŝia frato: „Tio ne estas kaptuko, sed lango.“**

1029. Sinjoro Novák alveni al koncerto jam post la akomenco. Kiam li sidiĝis, li demandis najbaron: „Kion ĝuste ili ludas?“
„La Naŭan simfonion.“
Sinjoro Novák terurite: „Dio mia, ĉu tiom mi malfruas?“

**1030. Aktorino demandas reĝisoron: „Ĉu vi opinias, ke en tiu ĉi filmo mi plaĉos al rigardantoj?“**
**„Tute certe. Laŭ la rolo vi mortos tuj komence de la unua akto.“**

1031. „Ĉu vi scias, ke aŭtoron de tiu nova detektiva romano oni mortigis?“
„Ĉu jes? Kaj ĉu oni jam trovis leganton, kiu tion faris?“

**1032. Vizitanto: „Kiel eblas, ke vi havas en biblioteko nur unu libron?“**
**„Tio estas katalogo de libroj, kiujn mi pruntis al konatoj.“**

1033. Sinjoro Novák iras preter frostiginta fiŝlago kaj vidas, ke el truo en glacio elrampas vestita viro. Li demandas lin: „Ĉu vi falis tien?“
La viro kolere: „Memkompreneble, ke mi ne loĝas ĉi tie.“

**1034. En poŝtoficejo: „Sinjorino, vi skribas tute nelegeble. Ĉi tiun telegramon mi ne povas forsendi.“**
**„Trankvile forsendu ĝin. Mia edzo scipovas legi mian skribmanieron.“**

1035. Unusola fidinda meteorologia prognozo laŭdire estas: „Printempo, somero, aŭtuno, vintro.“ Sed eĉ tion ne eblas plene kredi.

**1036. „Mia edzo donas al mi okaze de ĉiu naskiĝtago belan juvelon.“**
**„Vi devas havi jam amason da ili.“**

1037. „Vi estis hieraŭ en la teatro. Kion ili prezentis?“
„Ŝanĝon de programo.“

**1038. Asekura agento proponas al terkulturisto kontrakton de poliso kontraŭ fajrego kaj hajlo. Terkulturisto: „Kontraŭ fajrego jes, sed kiel oni faras hajlon?“**

1039. „Tiu ĉapelo ne taŭgas por vi.“
„Kial?“
„Ĉar la ĉapelo estas nova, sed la kapo maljuna.“

**1040. „Mi ne povus vivi sen televido.“**
**„Mi eĉ ne ekdormi.“**

1041. Inter najbarinoj: „Ĉu plaĉas al vi Cigna lago?“
„Ni preferas Balatonon.“

**1042. Anonco en gazeto:**
**„La firmao serĉas novan libroteniston. Ankaŭ la malnovan.“**

1043. Du musoj estas en kinejo, en projekciejo. La muso manĝas pecon de filmobendo. La alia demandas:
„Kia estas la filmo?“
„La libro estis pli bona.“

**1044. Ŝildeto apud pordo de lifto: „Lifto ne funkcias. La plej proksima funkcianta lifto en la domo kontraŭa.“**

1045. Du avaruloj sidas en restoracio. Unu diras: „Tie tiu belulino koketas kun vi.“
„Mi scias.“
„Do, kion vi atendas?“
„Ĝis ŝi pagos.“

**1046. „Kien vi penegas kun tiu ĉi ŝtono?“**
**„Mi vendas domon, do mi portas pecon por demonstri.“**

1047. Ŝi dum balo: „Vi similas al nokta papilio."
Li: „Ĉu mi dancas tiel leĝere?"
Ŝi: „Ne, vi konstante turniĝas sub lustro."

**1048. Lamentas maljuna Novák: „Mi forgesas ankaŭ tion, ke mi havas sklerozon!"**

1049. Plendas pensiulo: „Mi havas reŭmatismon, sklerozon, astmon, arteriosklerozon...
Lia amiko: „Finu, kaj diru, kion vi ne havas."
„Dentojn."

**1050. „Kiu tiom lamentas en via ĝardeno?"**
**„Tion malatentu, edzo formtranĉas heĝon."**

1051. Sinjorino venis malfrue en teatron kaj demandas biletvendistinon: „Ĉu tre multe mi malfruis?"
„Do, unu akton oni jam forludis."
„Ĉu vere? Kaj kiun?"

**1052. Koleras teksasano en poŝtoficejo: „Ĉu dek dolarojn kontraŭ telefona parolo? Ĉe ni mi povas telefoni eĉ al infero kontraŭ nur 70 cendoj."**
**Telefonistino: „Jes, ĉe vi tio etas loka telefonparolo kaj ĉi tie ĝi estas la interurba."**

1053. Kio estas pigreco? Tio estas kutimo ripozi pli frue, antaŭ ol ni estas lacaj.

**1054. „Kiel eblas, ke vi havas tiom da libroj kaj neniun libroŝrankon?"**
**„Nu, vi scias, libron al vi iu de tempo al tempo pruntedonas, sed libroŝrankon?"**

1055. „En la mondo estas multe da pli belaj aĵoj ol mono."
„Jes, nur se ili ne kostus tiom da mono!"

**1056. „Mi tre bedaŭras, sed reloj de la nova fervojlinio iros tra via garbejo," diras geometro al terkulturisto."**
**„Kion fari, sed ne pensu, ke al ĉiu trajno mi malfermos kaj fermos pordegon."**

1057. Kiam muzika entuziasmulo aŭdas, ke en banĉambro kantas fraŭlino, li almetas al ŝlosiltruo anstataŭ okulo orelon.

**1058. Recepto por ĉina redukta dieto: dum unu semajno trifoje tage kokinan supon, manĝi per bastonetoj.**

1059. Diras granda neĝulo al la malgranda: „Komencas neĝi! Jam baldaŭ vi ekscios, kiel multiĝas neĝuloj.“

**1060. Iujn kantojn oni povas kanti, povas dum ili danci kaj oni povas ankaŭ aŭskulti ilin.“**

1061. „Iam mi estis en tiel aĉa financa situacio, ke mi ne havis monon eĉ por cigaredoj.“
„Tio estis malagrabla.“
„Tute ne, mi ne fumas.“

**1062. Kapitano sur marŝipo: „Ĉiuj, kiuj scipovas naĝi, rapide trans la ferdek-barilo! Aliaj preĝu!**

1063. „Tre facile oni diferencigas bonan kanton de la malbona.“
„Kiel?“
„Bona esta tiu, kiu al ni plaĉis, kiam ni estis junaj, kaj malbona estas tiu, kiun kantas nuntempa junularo.“

**1064. Alŝanceliĝas migrulo trans dezerto al puto kaj gaje ekvokas: „Akvo.“**
**Post tio aperas el la puto iu alia kaj demandas: „Kie?“**

1065. „Amiko, mi estas pli kaj pli idiota!“
„Ne parolu, vi ŝajnas al mi konstante la sama.“

**1066. Surskribo apud fiŝlago: „Banado malpermesita. Monpuno cent kronoj. Vintre kvindek procenta rabato.“**

1067. „Ĉu estas ĉi tie sinjoro Kapreto?“
„Ne, nur sinjoro Kapro.“
„Tio eblus, mi ne vidis lin jam dek jarojn.“

**1068. Korekto en gazeto: „En nia lasta artikolo pri manĝeblaj kaj venenaj fungoj okazis ŝanĝo. Ni petas legantojn, kiuj travivis, ke ili venu en redakcion de tiu ĉi gazeto.“**

1069. „Mia familio estas tre malnova,“ diras aristokrato. „Ni havas ŝuldojn, kiuj devenas jam el la dekunua jarcento!“

**1070. „Vi forgesis vesti vian kalsonon.“**
**„Kiel vi povas tion scii?“**
**„Ĉar vi surhavas nek pantalonon.“**

1071. Du soldatojn, dormantajn sub arbo vekas bruo. Unu demandas: „Kio estas tio, ĉu ŝtormo?"
„Ne, bomboj!"
„Tio estas bone. Mi timis, ke tio estas ŝtormo."

**1072. Du apud biero: „Estas vero, ke pro idioteco oni pagas. Kio estas en tio relativa?"**
**„Eble tio, ĉu por tio pagas vi aŭ por tio oni pagas al vi."**

1073. „Ĉu vi jam forigis la kritikitajn mankojn el via romano?"
„Ĝis nun ne. Mi havis pli gravan laboron."

**1074. „Mi scias, ke la vivo signifas konkuradon, sed kial la unuaj estas ĉiam tiuj aliaj?"**

1075. „Kion oni konsilis al vi en Salono de beleco kontraŭ faltoj sur la kolo?"
„Ŝalon."

**1076. Sinjoro Novák telefonas: „Ĉu tie estas 664356?"**
**„Ne."**
**„Do kial vi levas tion?"**

1077. Gardisto: „Ĉi-semajne jam trifoje mi monpunas vin pro banado en malpermesita loko."
„Mi scias, do ĉu mi povus ricevi malgrandan rabaton?"

**1078. „Hodiaŭ mi sonĝis ion tre belan."**
**„Kion, parolu."**
**„Kial, ni estis ja kune."**

1079. „Ĉu vi diris al la ĉefo ke mi estas stultulo?"
„Ne, li jam sciis tion."

**1080. Policisto demandas virinon, kuŝanta sur veturvojo: „Kio okazis al vi?"**
**„Nenio, mi tenas ĉi tie lokon al mia edzo por parki la aŭton."**

1081. „Fraŭlino, vi havas belegajn dentojn."
„Tion mi heredis de mia patrino."
„Ne diru, sed ili konvenas al vi akurate."

**1082. Plendas komercisto: „Pasintjare mia entrepreno prosperis tiel malbone, ke mi povis fari tute veran impostdeklaron."**

1083. Oni elpensis novan kontraŭkoncipon: pafmortigi cikoniojn.

**1084. „El kio vi havas tiun peltmantelon?“**
**„El leporfelo.“**
**„Ĉu tio estis tiel granda leporo?“**

1085. Filatelisto al amiko: „Imagu, hieraŭ mi aĉetis poŝtmarkon po tri mil kronoj.“
„Mia dio, kien vi skribos?“

**1086. „Kiel oni nomas blondulinon en universitato?**
**„Vizito.“**

1087. Razisto: „Ne dormu! Kiam vi havas kapon sube, mi ne povas razi vin.“
„Do tondu min.“

**1088. „Ĉu vi konas tiun proverbon:** *Dekstra mano ne sciu, kion faras la maldekstra?***“**
**„Jes.“**
**„Tio estas ekkonebla laŭ via violonludo.“**

1089. „Se vi ne estas superstiĉa, venu al vespermanĝo. Sed vi estos la dektria ĉe la tablo.“
„Ne gravas, mi manĝos por du.“

**1090. Kantsocieto enkasigis en urbo kotizojn. En cirkulero estis skribite:**
**„Ni postulas, ke vi kotizu propravole, alie ni estus devigitaj organizi koncerton.“**

1091. En policejo en Skotlando: „Ĉu vi scias do, kiu ŝtelis vian aŭton?“
„Jes, sed ne rapidu kun tio. Mi atendas, ĝis li relakigos ĝin.“

**1092. Fumantoj de pipoj estas ĉiam solidaj civitanoj. Ili travivas tiom da tempo per purigado, plenigado kaj zorgado pri siaj pipoj, ke ili ne havas tempon por io malhonesta.**

1093. La unua cigaredo estas kutime senpaga, la lasta nepagebla.

**1094. Sinjoron N. mordis rabia hundo. Li revenis de kuracisto, kuŝiĝis en liton kaj komencis skribi.**
**La edzino: „Ĉu vi skribas testamenton?“**
**„Ne, liston de nomoj, kiujn mi mordos, se serumo ne efikos.“**

1095. Neniam mi parolas kun mi mem. Mi ne ŝatas paroli kun stultuloj.

**1096. Komandanto demandas enviciĝantajn rekrutojn: „Kiu scipovas kuiri?"**
**Unu rekruto anoncas sin kaj komandanto demandas lin:**
**„Ĉu vi scipovus kuiri en tiel grandaj kaldronoj?"**
**„Mi kuiris ankoraŭ en la pli granda."**
**„Kion vi kuiris?"**
**„Asfalton."**

1097. „Sur kiu flanko vi dormas, sur la dekstra aŭ la maldekstra?"
„Kiel mi sciu tion, kiam mi dormas?"

**1098. „Oni diras pri vi, ke vi estas flegmulo."**
**„Ne graaaaavas."**

1099. „Mi dezirus scii, kiom da geparencoj mi havas."
„Do aĉetu kabanon."

**1100. Mono ne estas ĉio, sed mi volonte konvinkiĝos pri tio.**

1101. „Ĉu vi iam dormis kun homo, kiu dum la tuta nokto ronkis?"
„Mi provis tion, sed mi ne sukcesis ekdormi."

**1102. „Ĉu vi fakte povas pro viaj multaj ŝuldoj dormi?"**
**„Kial ne? Kreditoroj ja ne kutimas veni nokte."**

1103. Demandas futbala arbitranto antaŭ matĉo: „Ĉu mi atingos post matĉo rapidtrajnon al Brno?"
„Memkompreneble. Ni de ĉi tie ĉiam pelas arbitranton ĝis stacidomo."

**1104. „Sinjoro kapitano, vi anoncis, ke nia ŝipo dronas. Sed mi ne scipovas naĝi."**
**„Ne gravas. Ĝi dronas malrapide. Lernu!"**

1105. „Ĉu estas vero, ke via fianĉo laboras ĉe sekreta servo?"
„Jes."
„Kiel li nomiĝas?"
„Mi tute ne scias."

**1106. Inter amikinoj: „Kiel nomiĝas via nova amanto?"**
**„Ludoviko."**
**„Kioma?"**

1107. „Kial vi en la lasta tempo promenas preter municia fabriko?“
„Mi volas dekutimiĝi fumi.“

**1108. Leŭtenanto al rekrutoj: „Antaŭ vi estas nordo, dekstre oriento, maldekstre okcidento kaj kio estas malantaŭ vi?“**
**„Belega vivo en civilo, sinjoro leŭtenanto.“**

1109. Babilas du agrokulturistoj: „Ĉi jare ni havis tritikon altan kiel plenkreska viro.“
„Kaj ni havis ĉi jare maizon kiel telegrafajn kolonojn.“
„Ĉu tiel altajn?“
„Ne, tiel malproksimajn unu de la alia.“

**1110. Post la ĉampioneco de arbekspluatado en Kanado oni demandas venkinton: „Kie vi tiel bone ellernis tion?**
**„En Saharo.“**
**„Ja en Saharo ne estas arboj.“**
**„Nuntempe ne plu.“**

1111. Telefonas sinjorino en helpo-centron: „Bonan tagon, hieraŭ mi aĉetis Vindozon Vista.“
„Ho, tio estas bonega, dankon!“
„Sed hodiaŭ tuta sistemo falis!“
„Mi scias, antaŭ momento vi diris tion...“

# Enhavo


Antaŭparolo al la nova eldono ... 3
Antaŭparolo al la origina eldono ... 3
Aforismoj ... 4
Alkoholo ... 7
Amo ... 11
Bestoj ... 16
Dungitoj kaj vendistoj ... 19
Fiŝkaptistoj kaj ĉasistoj ... 24
Geedzeco ... 26
Infanoj ... 42
Krimuloj kaj juĝistoj ... 50
Kuracistoj kaj pacientoj ... 54
Lernantoj kaj studentoj ... 62
Lordoj ... 70
Najbaroj ... 71
Nigra humuro ... 73
Restoracioj ... 76
Ŝoforoj ... 79
Vojaĝoj kaj turismo ... 81
Virinoj ... 85
Viroj ... 90
Diversaj ... 96

Inĝ. Borský

# 1111 anekdotoj en Esperanto

Dua, ŝanĝita kaj kompletigita eldono
Provlegis kaj kompletigis: Katarína Nosková kaj Indrė Pileckytė
Kovrilo: Ľubomír Kotrha (ilustraĵo) kaj Peter Baláž (aspekto)
Pli da ilustraĵoj de Ľ.Kotrha: http://kotrha.webnode.sk/
Eldonis: ESPERO, Slovakio (www.espero.sk)
Eldonjaro: 2009
Kvanto: 300p.

Kopirajto: Libere vastigebla por nekomercaj celoj

ISBN: 978-80-89366-06-4

# 1111 ANEKDOTOJ EN ESPERANTO

## 20 laŭtemaj ĉapitroj:

Aforismoj
Alkoholo
Amo
Bestoj
Dungitoj kaj vendistoj
Fiŝkaptistoj kaj ĉasistoj
Geedzeco
Infanoj
Krimuloj kaj juĝistoj
Kuracistoj kaj pacientoj
Lernantoj kaj studentoj
Lordoj
Najbaroj
Nigra humuro
Restoracioj
Ŝoforoj
Vojaĝoj kaj turismo
Virinoj
Viroj
Diversaj



ISBN 978-80-89366-06-4